

Beletra Edeno

neregula beletra bit-revuo

n-ro 5 (junio 2024)



Ĉiuj kontribuoj estas bonvenaj.

Redaktis Vejdo (vejdo@163.com)

Kontribuis Hong Jia, Luiza Carol, Nicole Else, Pipi, Rita Mkrťčan, Lu Dong, Elena Popova, Laimundas Abromas, Yin Jiaxin, Herbeto, Viktoro Li, Minosun, Du Mozi, Vejdo, Dorothea kaj Hans-Georg Kaiser, Kang Long, Guozhu, Mikaelo Bronštejn, Maria Nazaré Laroca, Eto, Lily, Yi Qiao, John Huang, Stanislao M Esposito, Rovere Emanuele, Yanke, Bardhyl Selimi, Mandio, Deng Lin

AI-ilustris John Huang, karikatur-desegnis Paula Adúriz

Enhavo

Originala prozo

Hong Jia: Pento de ŝtelisto.....	3
Luiza Carol: Reva kaj songa mondo.....	6
Nicole Else: La maljunulino, kiu ne posedas televidilon.....	10
Pipi: La legendo pri sankta arbo-dio.....	12
Rita Mkrťčan: Songo, Pentraĵo, songo kaj... “rompitaj” iluzioj.....	15
Lu Dong: Amo inter dentpasto kaj dentbroso.....	16
Elena Popova: Lumo.....	17
Laimundas Abromas: Gloro por la kuraĝo.....	19
Yin Jiaxin: Telefonaj mesaĝoj.....	22
Herbeto: Amo inter du ŝlosiloj.....	23

Tradukita prozo

Liu Cixin: Kunporti ŝiajn okulojn.....	24
Wu Ruozeng: Milithundo Heizi.....	35
Cong Weixi: Rememoroj pri blankaj cignoj, Nudigitaj animo kaj karno..	37
Herbeto: Viro kaj virino.....	41
Chiung Yao: En profunda korto (5).....	42
Fratoj Grimm: Kamparano en la ĉielo, Fidela Johano.....	50
Anonimulo: Mortigaj dancŝuoj.....	57
Xu Yaozuo: Sinjorino Saliko.....	70

Originala poezio

Marjorie Boulton: Flagrema amikeco, Via kato.....	74
Mikaelo Bronŝtejn: Kvin sentitolaj poemoj.....	77
Maria Nazaré Laroca: Ok poemetoj.....	80
Eto: Tra longa strato.....	84
Lily: Viv-vojaĝo, rememoro de folio, Printempa pluvo.....	85
Yi Qiao: La monto en foro, Saniĝo tra meditado, Bonstato.....	88

John Huang: Kanado k.a.....	90
Vejdo: Plantado de oro.....	93
Stanislao M Esposito: Sentitola poemo.....	98
Luiza Carol: Saluto trans jarcentoj k.a.....	99
Tradukita poezio	
Rovere Emanuele: Kvin kanttekstoj.....	103
Zhao Yinghuan: Pento k.a.....	107
Shu Ting: Al kverko k.a.....	110
Doruntina Ramadani: Mi kaj mia peza valizo.....	114
Anita Hoxha: Tro malfrue k.a.....	114
Li Qingzhao: Sep ci-poemoj.....	118
Xi Murong: 12 poemoj.....	123
Teatro	
Anonimulo: Najbaroj.....	129



John Huang, prezidanto de internacia Komercia kaj Ekonomia Federacio (IKEF) nordamerika, ĉefredaktoro de la revuo "La Merkato", estas ĉina-kanada esperantisto kaj komercisto. Li estas la oficiala fotisto por du sinsekvaj Universalaj Kongresoj en 2022 kaj 2023. Li esperantistiĝis jam en la 1980-aj jaroj kaj aktive partoprenis multajn Esperanto-agadojn en la sekvaj jardekoj. Li faris la AI-bildojn de ĉi tiu numero de Beletra Edeno.

Foto sur la kovrilo: Serena lago de Banff Nacia Parko de Kanado fotita de John Huang



Karikaturoj desegnitaj de **Paula Adúriz** (Hispanio)

Hong Jia (Ĉinio)

Pento de ŝtelisto

“Ko mortis!” Tiu ĉi malĝojiga novaĵo eksplodeme cirkulis tra la urbeto A. Lasttage, kiam Ko promenis en strato, lin trafis akcidento. Rapide kuranta aŭtomobilo lin faligis kaj puŝis lin malproksimen je kelkaj metroj. Lia korpo kuŝis sur prospere disfloranta arbustaro ĉe la vojrandoj. Lia sango ruĝigis la blankajn florojn. Antaŭ morto Ko funkciigis konfekcian fabrikan, kiu alportis al li grandan profiton. En la urbeto li estis fama riĉulo. Nun li forlasis siajn kadukajn gepatrojn loĝantaj en luksa vilao. Nature la gepatroj estis ekster si de malĝojego. Ili tuttage ploregis kun larmoj fluantaj riverete. Pere de helpo de la urbeto instanco okazis funebra ceremonio en pli-malpli granda skalo. Multaj funebrantoj kovis estimon kaj dankemon al la riĉulo, ĉar antaŭmorte li faris multajn bonojn por la loĝantoj de la urbeto. La plej elstara kontribuo, kiun li faris, estis establi bazlernejon, tiel ke multaj malriĉaj infanoj ekhavis ŝancon viziti lernejon. Kompreneble liaj riĉaĵoj akumuliĝis per lia honesta laborado kaj penado.

La akcidenton analizis kaj juĝis la trafik-policejo, asertante, ke la ŝoforo de la aŭtomobilo portis la tutan respondecon, ĉar la ŝoforo stiris la aŭton post drinkado. Diversaj kompensoj atingis milionon da juanoj. Tiun grandan sumon liaj maljunaj gepatroj gardis. La gepatroj, pro grandaĝo, ne facile moviĝis ĉien. Ili solece vivis en la vasta malplena vilao. Ili evidente fariĝis la celo de tiuj monavidemuloj.

San denaske malŝatis laboron kaj ĉasis komfortan vivon. Liaj gepatroj jam frue mortis pro minaca epidemio. Sen subteno de la gepatroj li vivis iele-trapele. Kaj plie li ne volis lukri per siaj manoj kaj li iom post iom kutimis al ŝtelado. Kiam li sciigis pri la granda sumo, kiun la gepatroj de Ko tenis en soleca vilao, li komencis cerbumi, kiel ŝteli ĝin el la vilao. Antaŭ agado li kaŝe iris al la vilao observi la terenon kaj elpensis planon de ŝtelado. Post kelkaj tagoj, sub la kovro de mallumo sen lunlumo, li transgrimpis la muron kaj sin trudis en la dormoĉambron de la gemaljunuloj, kiuj profunde dormis. Li malpeze eltiris unu tirkeston post alia, sed ne trovis la monon. Li tamen ne perdis esperon. Post kiam li traserĉis la tutan ĉambron, li fine trovis feran keston. Li malfermis ĝin kaj je lia ekstazo ĝi entenis cent mil juanojn. Li hasteme elprenis la monon kaj ŝovis ĝin en la sakon, kiun li antaŭtempe alportis kun si. Kiam li elŝovis sin el sub la lito kaj pretis foriri, du figuroj fulmis preter la fenestron. Li tuj kaŝis sin malantaŭ la fenestrokurtenon kaj retenante sian spiron, li silente observis, kio okazos. La du figuroj, ne volante agi sekrete, eĉ piedbate malfermis la pordon kaj enstrudiĝis. La du gemaljunuloj abrupte sidiĝis sur la lito pro

timego. Vidante la du fortikajn fremdulojn, la maljunulino sin volvis sur la lito, murmurante. La maljunulo panike kriis, “Kiu vi estas?”

Je ekvido de la du uloj San rekonis ilin: unu estis Dan kaj la alia Lu, kiuj ofte ludis en hazadludejo. Eble ili multe malgajnis en ludo kaj mankas al ili mono por plua ludo, San pensis en si. Kial ili malkaŝe prirabas la gemaljunulojn? Kia skandalo! Ĉu ili ne timas, ke la gemaljunuloj denuncos ilin? San ne sciis, kial ili agas tiamaniere.

“Kiu ni estas ne gravas! Ni venas pruntepreni monon de vi,” Dan diris, kun ponardo en la mano. “Ĉu vi havas monon?”

“Jes, jes, kompreneble,” la maljunulo respondis. “Kiom da mono vi...vi bezonas?”

“Ĉiom, kiom vi havas,” Lu feroce diris.

“Momenton. Mi...mi prenu por vi,” diris la maljunulo. Li ellitiĝis kaj treme paŝetinte al la ŝranko, prenis banklibreton. “Jen...jen estas dekmil juanoj en la banko.”

Dan kaptis kaj forĵetis ĝin, kriante, “Ba, vi maljuna testudo! Mi volas kontantan monon! Tuj prenu ĝin!”

“Ho, mi...mi memoras, ke mi metis centmil juanojn en feran keston,” la maljunulo murmuris. Li klinis sin por okulserĉi la feran keston sub la lito. Jen ĝi estis! Li eltiris ĝin. Dan sin ĵetis kaj kaptis ĝin. Malferminte la keston, li trovis ĝin malplena. Li hojllis, “Maljuna diablo, vi eĉ trompas min! Se vi ne donos al mi monon, mi mortigos vin.”

Kun tremantaj kruroj, la oldulo plorvoĉe diris, “Ve-re, mi...mi ne mensogas al vi. Mi...mi ne scias, kial tiu mono estas for. Eble iu ŝtelis ĝin. En la domo nur mi kaj...kaj mia kunulino loĝas. Kial...kial la mono malaperis sennsure?”

Dan rikanis, “Vi maljuna hundo, vi fabrikis tiun mensogon. Ĉu mi kredas vin? Via filo estas fama riĉulo en la urbeto. Li certe restigis al vi abundan monon. Mi aŭdis, ke vi ricevis grandan sumon da kompenso, ĉu ne?”

La oldulo peteme respondis, “Jes, jes, vi...vi pravas. Sed...sed multon da mono mia nevo deponis en la banko por mi. Mi...mi...nur tenas ŝparmonon kaj pension por vivkostoj.”

“Kian glatan langon vi havas, olda bastardo!” kriis Dan, ŝajne perdinte paciencon. “Refoje mi demandas al vi, ĉu vi volantas doni monon al mi!”

“Mi tre volontus, sed...sed...” Antaŭ ol li finis tiujn vortojn, Dan jam ponarde pikis lian bruston. La povrinda oldulo falis teren kaj mortis.

Tiam Lu kaptis la oldulinon, kriante, “Ĉu vi volas vivon?”

“Je...s, jes... sed mi ne scias, kie estas mo...no. Se...se...vi volas, mi...mi...nur donas al vi miajn orajn ringojn kaj braceletojn.” Ŝi etendis sian manon kun oraj ringoj kaj braceletoj sur ĝi. Lu tuj kaptis tiujn orajojn kaj donis ponardan pikon al ŝi. Ŝi tordiĝis kelkan tempon kaj rigidigis.

En la okuloj de San tiuj du murdintoj fakte jam pretis mortigi la viktimojn, ĉu ili povos akiri monon aŭ ne.

Post murdado la du mortigintoj rapide forlasis la vilaon.

San, post la kurteno, propraokule vidis la tutan okazintaĵon. Por eviti implikaĵon li ankaŭ hasteme forkuris.

La sekvan tagon la policejo publikigis anoncon pri du murdoj en la vilao por kolekti priajn informojn.

San restis hejme la tutan tagon. Kun centmil juanoj en la mano, li eĉ ne havis iom da ĝojo. Dum postaj sinsekvaj tagoj li vivis kun maltrankvileco. Najbaro diris, al li, ke policanoj enketas pri la murdigo de pordo al pordo kaj serĉas la vid-atestantoj de la kazo. Tiunokte estis tre mallume kaj neniuj homoj signoj videblis sur la stratoj. La kazo ne povis esti rapide solvita. San ne kuraĝis eliri, timante, ke, se li renkontos policanojn kaj tiuj demandas pri la murdoj, li ne scios, kiel respondi.

En la cerbo de San ofte svarmis ebloj, kiuj embarasis lin. Li pensis, ke se li ne ŝtelus la monon, eble Dan kaj Lu neeble murdus la gemaljunulojn, ĉar ili jam akirus la monon. Kaj se tiam li vokus la nomojn de tiuj du murdintoj, ili neeble mortigus la maljunan paron, kaj se li elvenus, kiam ili pretis fari murdojn, la maljuna paro eble evitis mortigon. Fakte, li pensis, li parte rilatis al la murdoj kaj li kulpis en iuj flankoj. Ĉi tiujn tagojn li emis nek manĝi nek dormi pro la konscienciproĉoj. Li konsideris, ke, se li denuncos la murdintojn al la polico, ankaŭ lia ago de ŝtelado malkaŝigos kaj pro tio li eble ricevos severan punon, ĉar la mono, kiun li ŝtelis, estas granda sumo. Laŭ la leĝaj reguloj li eble estos kondamnita je punlaboro aŭ kelkjara malliberiĝo. Ĉar la polico estis faranta enketon, la kazo fine solviĝos. Do tiam li involviĝos en la kazo kaj lia krimo des pli fariĝos granda. Rimorso ronĝis lian koron kaj li fine decidis malkaŝi la murdadon kaj denunci la murdintojn, kvankam li eble trafos punon. Laŭ la politiko favora al la denunciinto li eble akirus pli malpezan punon.

Kun tia decido en la koro, li iris al la policejo. Antaŭ la pordo de la policejo li hezitis kaj haltigis siajn paŝojn. Li volis akiri garantion, ke li povos ricevi malseveran traktadon por denunciado. Li elpoŝigis telefonilon kaj malkaŝis la krimon. Post kiam li ricevis la jesan respondon, kun levita kapo kaj kolektinta kuraĝon, li grandpaŝe eniris la policejon.



Luiza Carol (Israelo)



Reva kaj la sonĝa mondo

Foje, en iu fora lando, okazis granda epidemio de terura malsano, kiun neniu kuracisto kapablis kuraci. Tiam multaj homoj forpasis. Tra la tuta lando multaj infanoj orfĝis, multaj gepatroj restis sen infanoj... Oni opiniis, ke la bienaj bestoj disvastigas la malsanon. Pro tio, oni mortigis amason da bienaj bestoj kaj enterigis ilin ege profunden en la teron.

Dum tiu terura tempo, rande de iu ege malfeliĉa vilaĝo

aŭtorino, Luiza Carol

estis supervivanta orfa knabino ĉirkaŭ naŭ-jaraĝa, kiu nomiĝis Reva. Ŝi loĝis apud granda densa arbaro.

Estis varmega longa somero. La knabino ne plu ŝatis tranokti en la malgaja forlasita domo, kie ŝiaj gepatroj estis malsaniĝintaj, suferintaj kaj forpasintaj. Ŝi preferis dormi en la korto, ene de eta ligna kabano, kiun ŝia patro estis konstruinta antaŭ longe, por ŝi kaj por ŝiaj pupoj.

Ĝuste antaŭ sia forpaso, la patrino de Reva diris al ŝi:

“Ne timu, filino mia. Restu bonkora, kuraĝa kaj esperoplena. Mi amas vin kaj neniam forlasos vin. Mi baldaŭ fariĝos sonĝpatrino kaj vizitos vin en viaj sonĝoj. Mi neniam ĉesos ami vin.”

Kaj ĝuste tiel okazis. Ĉiunokte, la sonĝpatrino vizitadis sian filinon en ties sonĝoj. En tiuj sonĝoj, ili kune promenis, ludis kaj kantis gajajn kantojn. Reva precipe ĝuis la fabelojn pri aliplanedanoj, kiujn rakontadis ŝia sonĝpatrino. Krome, tiu ĉi instruis sian filinon bani sin ĉiumatene en la pura akvo de proksima arbara fontano kaj nutri sin per bongustaj beroj kaj avejoj troviĝantaj apud la fontano. En la komenco, Reva timis la ombron de la arbaro. Sed la sonĝpatrino konsilis ŝin:

“Ne timu la arbaron, Reva. Ĉiuj lupoj kaj vulpoj iam kaŝiĝantaj tie jam delonge malsaniĝis kaj mortis, post kiam ili estis ŝtelintaj kaj manĝintaj malsanajn porkojn kaj kokinojn. Ankaŭ la ursoj kaj la korvoj mortis, post kiam ili estis manĝintaj el rubuoj. Neniu danĝera estaĵo troviĝas nun en la arbaro.”

Tiam Reva ekkuraĝis kaj iris sentime al la arbaro. Sed ŝi trovis nur tro malmultan manĝaĵon kaj ŝi laciĝis trairante kardejojn kaj marĉojn. La sekvan nokton, la sonĝpatrino diris al ŝi:

“Morgaŭ matene vi trovos novan amikinson en la arbaro. Se vi kaj ŝi kundividus viajn manĝaĵojn, la vivo fariĝos pli facila por vi ambaŭ.”

Kiam ŝi vekigis, Reva saltis pro ĝojo. Ŝi rapide banis sin kaj tuj komencis esplori la arbaron. Ŝi iris pli kaj pli profunden en la arbaron, ĝis ŝi trovis tre junan porkineton, kiu rigardis ŝin scivole. Ĝi estis tre pura kaj odoris je framboj. Reva karesis ĝin kaj pensis: “Kiom delikata ĝi estas! Kiel ĝi atingis tiun lokon? Ĉu ĝi falis el iu kamiono? Kiel ĝi supervivis ĝis nun? Ĉu ankaŭ ĝi havas songĝpatrino helpantan ĝin?”

La porkineto murmuris ion amikeme kaj subite ekkuris, haltante ĉiujn kelkajn paŝojn por rigardi malantaŭen, kvazaŭ ĝi invitis la knabinon sekvi ĝin. Kaj Reva ja sekvis ĝin, scivole. Sub iu granda kverko, la porkineto haltis. Ĝi komencis forpuŝi la falintajn foliojn kaj branĉojn, ĝis ĝi malkaŝis aron da grandaj blankaj fungoj. Reva pensis: “Kiel ĝi sciis, ke la fungoj troviĝas ĝuste tie? Mia patrino diris, ke mi kundividu manĝaĵojn kun mia nova amikino. Tio signifas, ke tiuj fungoj devas esti manĝeblaj ankaŭ por homoj, ne nur por porkoj...”

Tiel Reva kuraĝis gustumi la blankajn fungojn. Tuj evidentiĝis, ke temas pri la plej bongusta manĝaĵo kiun ŝi iam ajn konis. Poste la knabino invitis la porkineton manĝi bongustajn avelojn, kiujn ŝi kolektis. La porkineto tre ĝojis pri tiu frandaĵo, ĉar ĝi ŝategis avelojn, kvankam ĝi estis tro malalta por kolekti ilin el la avelujo kaj ĝis tiam kapablis manĝi nur la malmultajn avelojn falintajn surgrunden. Ekde tiu tago, Reva kaj la porkineto helpis unu la alian trovi manĝaĵojn kaj ili fariĝis tre bonaj amikinoj. Evidentiĝis ke la porkineto loĝis borde de la rivero, apud eta akvofalo kie ĝi banis sin ĉiutage. Ĝi estis tre pura besto kaj Reva ofte pensadis: “Verŝajne ĝia songĝpatrino instruis ĝin esti tiom pura”.

Reva ne permesis al la porkineto sekvi ŝin hejmen, ĉar ŝi sciis ke oni mortigus ajnan beston kiun oni vidus en la vilaĝo. Cetere, Reva vizitis neniun najbaron, ĉar la malsano estis rapidege disvastiĝanta kaj pro tio ŝia songĝpatrino konsilis ŝin kontakti neniun. Kaj neniun najbaron provis viziti ŝin, ĉar delonge oni ne vidis ŝin kaj do oni supozis, ke ŝi forpasis. Fakte neniun havis tempon eĉ pensi pri Reva, ĉar la fia malsano trafis ĉiujn apudajn familiojn.

Dum malfeliĉo, timo kaj despero kreskis en la vilaĝo, Reva sciis nenion pri tio. Ŝi pasigis gajajn tagojn en la arbaro kaj eĉ pli gajajn noktojn en la kabano, kie ŝi travivis belajn songĝojn.

Kiam la somero proksimiĝis al la fino, la songĝpatrino diris al Reva unu nokton:

“Reva kara, vi jam devas rekomenci la lernadon. Morgaŭ matene iru al la loĝejo de la porkineto, poste daŭrigu la vojon kune kun ĝi laŭ la riverbordo suben. Vespere vi ambaŭ renkontos viajn senaĝajn geinstruistojn.”

Dirite kaj farite. La sekvan tagon, la knabino plektis kolĉenojn el bonodoraj floroj por si mem kaj ankaŭ por la porkineto. Tiel ornamitaj, gajaj kaj esperoplenaj, ili

ekiris laŭ la riverbordo suben. Kiam vesperaj ombroj komencis ĉirkaŭi ilin, jen ili alvenis al bela soleca domo kun grandaj fenestroj. La du posedantoj de tiu domo estis atendantaj ilin fronte de la pordo, por bonvenigi ilin kaj plej ame inviti ilin enen. Tuj evidentigis, ke la “senaĝaj geinstruistoj” (kiel oni kutimis nomi ilin) estis tre afablaj viro kaj virino, kiujn antaŭ nelonge la songĝpatrinoj de Reva kaj de la porkineto vizitis songe. La geinstruistoj havis la mirindan eblecon moviĝi laŭvole inter la songa kaj la nesonga mondoj, ĉar ili venis el alia planedo, kie oni posedas multajn kapablojn nekonatajn sur la tero. Ekzemple, ili kapablis moviĝi fulmrapide inter diversaj planedoj, scipovis kuraci multegajn malsanojn de homoj kaj bestoj ktp. Fakte ili ne estis senaĝaj, sed ili povis moviĝi laŭvole tra siaj aĝoj, do ili vojaĝis libere inter infaneco, juneco, mezaĝeco kaj maljuneco. Kiam Reva renkontis ilin, ili ĵus decidis prezenti sin mezaĝaj.

Dum 10 jaroj Reva loĝis en la domo de la “senaĝuloj” kaj lernis de ili centojn da sekretoj de la arbaro. Interalie ŝi lernis, ke iu violkolora dolĉa bero, kiun ŝi ŝatis manĝi ekde kiam ŝi lernis piediri, estis protektinta ŝin kontraŭ la terura malsano trafinta multegajn familiojn. Tiu bero kreskis en arbusto tre proksime de ŝia domo, sed neniu sciis, ke Reva kutimas manĝi ĝin. Okazis io stranga: ĉiufoje kiam la knabino iris al tiu arbusto, neniu rimarkis ŝin. Kaj ĉiufoje kiam ŝi volis preni tiajn berojn hejmen, ŝi iel perdis survoje la korbeton en kiun ŝi estis metinta ilin. Kaj poste, ŝi ĉiufoje forgesis rakonti pri tio, kvazaŭ la arbusto ekzistis nur en ŝia songo...

La knabino ankaŭ lernis ke tiu bongusta fungo kiun la porkineto scipovis malkaŝi estis tre satiga kaj saniga, do ĝi multe helpis ilin supervivi en la arbaro.

Reva lernis rekonigi kaj kolekti multajn sanigajn radikojn, tigojn, fruktojn, semojn, foliojn, fungojn... Ŝi lernis prepari bongustajn kuracilojn, kiuj prezentiĝis kiel teoj, suktoj, supoj, kaĉoj, kukoj ktp. Ŝi lernis ankaŭ kuraci multajn malsanojn de bestoj. Estas nekredeble kiom multe la geinstruistoj sukcesis instrui ŝin dum nur 10 jaroj...

Dum tiuj jaroj, ŝia songĝpatrino ofte vizitis ŝin en songoj. La songĝpatrino de Reva troviĝis en fora loko, kie ŝi estis lernanta multajn sekretojn pri la homa cerbo. Ŝi estis studanta pri la rilatoj inter la songa kaj la nesonga mondoj kaj klopodis kompreni la diversajn manierojn laŭ kiuj oni povas transpasi de unu mondo al alia. Fakte ŝi esperis trovi ie, en iu mondo aŭ en la spaco inter mondoj, sian edzon, kiun ŝi neniam kapablis viziti pere de songo. Kial ŝi ja povis viziti sian filinon sed neniel povis viziti ankaŭ sian edzon, tio estis mistero kiun ŝi ankoraŭ ne komprenis. La lernado de la songĝpatrino estis longdaŭra kaj igis ŝin travivi multajn aventurojn en diversaj mondoj.

Intertempe, la geinstruistoj de Reva sendis la porkineton en iun belan arbaron de alia planedo, kie loĝis unika specio de amikemaj aproj, ĉe la limo inter songa kaj nesonga mondoj. Tie la porkineto maturiĝis rapide, lernis trovi multajn speciojn de

bongustaj fungoj kaj radikoj neekzistantaj sur la tero kaj iĝis la patrino de ĉarmaj aproprorkidoj.

Tiel pasis 10 jaroj. Reva fariĝis bela kaj saĝa junulino. Taŭgatempe, la geinstruistoj forlasis nian planedon. Antaŭ ol foriri, ili brakumis la knabinon kaj diris:

“Reva, fidu ĉiam viajn belajn sonĝojn kaj provu realigi ilin. Post nia foriro, iru kelkajn horojn laŭlonge de la rivero suben. Baldaŭ vi alvenos al bela urbo, kie vi trovos unu el la plej bonaj lernejoj de tiu ĉi planedo.”

Poste ili bondeziris al ŝi kaj adiaŭis, promesante viziti ŝin ofte en sonĝoj. La larĝaj kaj altaj fenestroj de ilia domo malfermiĝis, la blankaj kurtenoj eliris kaj leviĝis kiel vualaj veloj, la tuta domo elteriĝis samkiel malpeza karavelo, kiu iom post iom fandiĝis en la violkolora ĉielo de la tagiĝo.

Reva malfermis la okulojn meze de arbaro. Ŝi estis dorminta sur mola musko. La violkolora lumo de la tagiĝo videblis tra la branĉoj de granda kverko. Kiel ŝi alvenis tien? Kial? Kiom longe ŝi estis dorminta ĉi tie?

Ŝi rigardis siajn piedojn. Ŝi portis la samajn etajn sandalojn kun kiuj ŝi foriris el la vilaĝo. Do ŝi estis denove eta knabino. Ĉe ŝia kolo troviĝis kolĉeno el iom velkintaj floroj, kiuj daŭre bonodoris... Ŝi tuj rekonis la florojn. Ĉu la renkonto kun la senaĝuloj okazis nur en sonĝo? Ĉu ŝi plektis la kolĉenon hieraŭ matene?

Reva sentis sin konfuza kaj hezitema. Ŝi provis trovi la porkineton, sed tiu malaperis. Ĉu dum la nokto ŝi atingis la misteran arbaron de mildaj aproj?

La knabino rememoris la lastajn konsilojn de la senaĝuloj kaj ekiris kuraĝe laŭlonge de la rivero suben, ĝis ŝi atingis urbon.

En la urbo, afablaj homoj gvidis la knabinon al la orfejo. Tien alvenis multaj aliaj infanoj dum la lastaj monatoj. Alvenis ankaŭ multaj plenkreskuloj, kiuj volontulis helpi la pedagogojn kaj instruistojn de la orfejo. Afabla paro da tiaj volontuloj decidis adopti la etan Reva. Ili zorgis, ke ŝi havu normalan vivon, en amema familio.

Reva rememoris dum sia tuta vivo la konsilon de la senaĝuloj: ŝi fidis siajn belajn sonĝojn kaj provis realigi ilin.

Kiam ŝi iĝis plenkreska, Reva fariĝis biologo. Dekojn da jaroj ŝi diligente esploris ĝisfunde la ecojn de ĉiuj violkoloraj beroj, ĝis ŝi sukcesis krei efikan kuracilon kontraŭ la kontaĝa malsano kiu forprenis la vivojn de ŝiaj gepatroj.

En la arbaro kiun Reva transiris tiam, vivas nun unika specio de malgrandaj aproprorkoj mildaj kaj sendanĝeraj. Ili aspektas sveltaj kaj moviĝas rapide. Onidire ili kutimas bani sin tre ofte en malgranda akvofalo, ili estas ege puraj kaj odoras je framboj. Multaj turistoj vizitas la arbaron ĝuste por admiri tiujn amikemajn, sentemajn, inteligentajn kaj ludemajn bestojn.

Nicole Else (Aŭstralio)



aŭtorino, Nicole Else

La maljunulino

kiu ne posedas televidilon

Mi estas 25-jara virino kaj loĝas en apartamentaro en granda urbo. Jam de du jaroj

mi loĝas tie, sed mi devas konfesi, ke mi apenaŭ konas miajn najbarojn. Mi ja foje vidas ilin kaj salutas ilin, sed mi neniam prenas la tempon por vere interparoli kun ili. Dekstre de mia apartamento loĝas maljunulino. Foje mi vidas ŝin. Ŝi kutime surhavas malnovajn vestaĵojn, ne ŝminkas sin, tute ne aspektas bela. Krome mi neniam vidas, ke ŝi havas vizitantojn. Supozeble ŝi estas malriĉa, soleca persono, kiu havas neniun kun kiu paroli. Kion ŝi faras dum la tuta tago? Certe ŝi pasigas multajn horojn sidante antaŭ televidilo.

Je la alia flanko de mia apartamento loĝas bela junulo. Mi scivolos kiun interesan vivon li havas. Mi ofte vidas lin reveni hejmen kun pluraj geamiko.

Nia loka biblioteko organizis specialan eventon: konatiĝu kun viaj najbaroj. Ĝi okazos venontan sabaton. Mi decidis iri. Eble mi povos ekscii pli pri tiu bela junulo. Jen sabato alvenis. Mi konstatas, ke la maljunulino kaj ankaŭ la bela junulo venis al tiu evento. Trideko da personoj estas tie. Tamen ni ne rajtas elekti kun kiu babili. La nomoj de ĉiuj partoprenantoj estas skribitaj sur kartetoj kiuj estas en ĉapelo. Jen mi aŭdas mian nomon, nun mi devas preni karteton por ekscii kun kiu mi babilos dum la venonta horo. Mi esperas, ke estos tiu bela junulo. Ho ne, mi prenis la karton kun la nomo de la maljunulino. Nu supozeble mi pasigos enuigan horon kun ŝi. Kion interesan ŝi povus rakonti kiam ŝi pasigas preskaŭ la tutan tempon sola en sia apartamento?

Jen mi rajtas pridemandi ŝin kaj do, provante ekscii pri kio ŝi interesiĝas, mi demandas kiujn televidelsendojn ŝi ŝatas spekti. Mi surpriziĝas kiam ŝi respondas, ke televidilon ŝi ne posedas. Ŝi ne havus tempon por spekti televidon. Do kion ŝi faras sola la tutan tagon?

“Mi ja posedas komputilon”, diras la maljunulino “kaj ĝi ebligas min komuniki kun multaj personoj. Kvankam mi malofte renkontas personojn, mi ĉiun tagon komunikas kun plej diversaj homoj: kuracisto el Ĉilio, japana instruisto, hungara doktorino, islanda poeto, franca kantisto, ktp. Mi ne sentas min soleca, ĉar mi ege multe komunikas kun personoj skribe.”

“Kiamaniere vi ekkonis tiujn personojn?”

“Pro la fakto ke ni ĉiuj parolas la saman lingvon, tio estas Esperanto.”

“Ĉu vere? Mi pensis, ke neniu parolas Esperanton.”

“Ni ne vere scias kiom da personoj scipovas paroli Esperanton, sed certe estas pli da interesaj homoj kiuj parolas ĝin ol mi havas tempon por komuniki.”

“Kial vi decidis eklerni tiun lingvon?”

“Ĉar mi konstatis, ke lerni la anglan lingvon estas tro temporaba kaj malfacila, mi ja mem ne estas denaske angloparolanto kaj mi esperas, ke Esperanto povas faciligi internaciajn amikecojn kaj helpi homojn pli bone kompreni homojn kiuj malsimilas al ni kaj do fariĝi multe pli toleremaj. Mi ankaŭ tre konscias pri la maljusteco en internacia komunikado, ke denaskaj angloparolantoj povas komforte uzi sian propran lingvon, kiam aliaj tion ne povas.”

Mi ne imagis, ke tiu maljunulino havas tiajn grandiozajn ideojn kiel faciligi internacian komunikadon inter diversaj personoj. Kiom interese!

“Krom Esperanto pri kio vi interesiĝas?”

“Mi interesiĝas pri lingvoj ĝenerale. Nun mi ofte pasigas almenaŭ duonhoron tage studante la ĉinan lingvon. La vortkunmetado en la ĉina fascinas min. Mi eĉ verkis libron por infanoj pri lingvoj.”

“Vi verkis libron? Nekredeble. Mi tute ne sciis, ke mi loĝas apud verkistino!”

“Mi ankaŭ ŝatas krei retejojn. Mi verkis ekzemple retejon pri infanlibroj de brita eldonejo. Tiu retejo estas bone konata de kolektantoj tra la tuta mondo.”

Mi, kiu loĝas apud ŝi, apenaŭ konas ŝin, sed personoj je la alia flanko de la mondo uzas ŝian retejon!

“Kion vi faras vespere? Ĉu televidilo ne mankas al vi vespere kiam vi komencas laciĝi kaj deziras malstreĉiĝi?”

“Mia plej ŝatata okupo vespere estas kunmeti puzlojn de proksimume 1000 pecoj. Antaŭ kelkaj monatoj mi eĉ partoprenis en puzla konkurso. Dum la konkurso mi sukcesis kunmeti puzlon de 500 pecoj en malpli ol 2 horoj.”

“Ĉu vere ekzistas konkursoj pri puzloj kaj vi partoprenis? Mi ne sciis, ke tiaj ekzistas.”

Jen unu horo ege rapide trapasis. Mi miras, ke tiu maljunulino fakte havas tre interesan, neordinaran vivon. Kiom mi eraris pri ŝi. Ŝi interesiĝas pri multo kaj eĉ havas grandiozajn ideojn por ke la tuta mondo estu unu granda familio kaj kunvivu en paco. Ŝi havas fortajn sentojn pri justeco kaj la maljusteco uzi la anglan kiel internacian lingvon. Krome mi ne vere konsciis pri la malfacileco de la angla lingvo. Kaj kio pri mia alia najbaro, la junulo? Nu eble li havas tute ordinaran vivon, laborante en enuiga posteno kaj poste babilante pri futbalo kun kelkaj amikoj. Nu, mi ne vere scias. Eble la biblioteko ree organizos tian eventon, sed eble la junulo surprizus min negative. Eble mi iam havos la kuraĝon rekte alparoli lin kaj provi havi veran konversacion kun li.

Mi ĝojas, ke mi havis la eblecon ekscii pli pri tiu maljunulino.

Konkludo: ne juĝu personojn laŭ aspekto.

Pipi (Ĉinio)



aŭtoro, Pipi

La Legendo

pri Sankta Arbo-dio

En suda Ĉinio estas vilaĝo nomata Banjano. Antaŭ la vilaĝo, proksimume en la distanco de kvindekkelke da paŝoj de ĝi, serpentumas rivereto, ĉe kiu

kreskas tuberoplana granda banjano, alta je dekoj da metroj kaj dika je plurhoma ĉirkaŭpreno, kun granda kaj densa krono. La vilaĝanoj nomas ĝin sankta arbo-dio.

Jen estas la legendo pri ĝi.

Antaŭ tre tre longe en la vilaĝo iam vivis vidvino kun du filoj: unu nomiĝis Feliĉo, la alia Ĝojo. Feliĉo estis naŭjara, kaj Ĝojo estis je du jaroj pli juna kaj pli malalta je unu kapo ol Feliĉo. Ambaŭ estis tre petolemaj.

En somero Feliĉo kaj Ĝojo ofte estis ĉe la rivereto. Sub la banjano ili banis sin en la rivereto, ludis kaŝiĝon, faris transkapiĝojn, amuzis sin en akvo, kaptis fiŝojn kaj mano-en-mane petolis ĉirkaŭ la arbo. Se ili laciĝis de la ludado, surdorse ili etendiĝis laŭ sia tuta longo sur la herbejo punktita de buntaj sovaĝaj floroj kaj dormetis kapon ĉe kapo en la ombro de la arbo. Ho, kia komforto! La loko ŝajnis al ili paradizo. En la trunko oscedis truo, ĉirkaŭ unu kapon granda.

Iun tagon, Feliĉo kaj Ĝojo refoje venis sub la arbon. Apenaŭ ili alproksimiĝis al la trunko, proksimume unu paŝon for de ĝi, subite pafiĝis el la truo birdo, kiu brue frapante per siaj flugiloj kaj en palpebruma daŭro sagis nesciate kien.

Ambaŭ eksaltis el sia haŭto de granda surprizo. "Jen la birdo estas sur la branĉo!" diris Ĝojo, fingromontrante al Feliĉo la birdon starantan sur branĉo.

"Ja estas ĝi," ĝoje diris Feliĉo.

Ĉe tio, Feliĉo elpoŝigis katapulton kaj ŝargis ĝin per ŝtoneto, streĉis elastan rubandon posten, ekcelis la birdon kaj pafis. La birdo tuj falis teren senviva.

Ambaŭ freneziĝis kaj eksaltis de ĝojo.

"Kredeble en la truo estas io. Ni iru kaj rigardu, kio estas en ĝi," diris Feliĉo.

Granda scivoleco tiris ilin al la truo de la arbo.

Feliĉo antaŭe kaj Ĝojo malantaŭe, ambaŭ arkigante la dorsojn iris piedpinte al ĝi.

La truo troviĝis iom alte. Feliĉo povis apenaŭ atingi ĝin per la rigardo. Fine li devis starigi sin sur la fingroj de la piedoj.

Feliĉo alpremis sian vizaĝon al la truo kaj streĉante la okulojn rigardis en ĝin.

"Kion vi vidis?" kun okuloj suprenlevitaj al Feliĉo, Ĝojo senpacience demandis.

"Interne de la truo regas obskuro kaj nenion mi vidis."

"Enŝovu al vi la kapon en ĝin kaj atente rigardu," Ĝojo urĝis.

"La truo estas iom mallarĝa, ke mi ne povas enpuŝi mian kapon en ĝin."

"Lasu do, mi provu," Ĝojo petis.

Pro tio, ke Ĝojo estas je unu kapo malalta ol Feliĉo, por li estas des pli malfacile atingi la truon per la rigardo.

Ĝojo provis salton kelkajn fojojn, sed vane.

Rompante al si la kapon, Ĝojo cerbumis kaj cerbumadis. Finfine saĝa ideo fulmis al li en la kapo.

Li transportis multe da ŝtonoj nesciate de kie kaj kunmetis ilin unu sur alian. Li stariĝis sur la ŝtonamaso kaj liaj okuloj facile atingis la truon.

"Kion vi vidis?" Feliĉo demandis lin.

"Estas tiel mallume, ke mi nenion povas vidi."

"Enŝovu vian kapon internen," Feliĉo aldonis.

Je tio, Ĝojo vere enŝovis sian kapon en la truon.

"Ĉu vi povas vidi?" Feliĉo demandis.

Estis nenia respondo. Post iom da tempo, subite en la truo eksonis obtuza korŝira krio: "Helpon! Helpon! Helpu min!"

"Kio okazis? Kio estas al vi?" Feliĉo demandis.

"Mia kapo kojnumiĝas en la truo, tial mi ne povas eltiri ĝin eksteren!" respondis Ĝojo per trema voĉo.

Ĝojo falis en danĝeron.

Kion fari? Kion mi devas fari? Maltrankvila kiel formiko en arda pota, Feliĉo febre paŝadis tien kaj reen sub la arbo.

Sen alia rimedo, Feliĉo tuj ekforkuris ploranta hejmen kaj petis helpon de sia patrino.

De malproksime la patrino vidis Ĝojon pendantan ĉe la trunko.

Kune kun Feliĉo ŝi kuris en la direkto al la arbo, tiel rapide, kiel ili povis.

La patrino tuj ĵetis sin al Ĝojo sur la talion, kaj eksplodis per larmoj ĉe la vido, ke sia amata filo troviĝas ĉe la rando de morto.

La patrino uzis ĉiujn rimedojn, sed ĉio vanis.

Fine la patrino abrupte ĵetis sin sur la genuojn antaŭ la arbo, kaj kunmetis siajn manojn kaj preĝis: "Ho, Dio, kompatu lin se hazarde li senintence ofendis vin. Dio mia, bonvolu do lin pardoni, senkulpigi, gardi kaj liberigi de mizero. ..."

Estas strange, ke la birdo, kiu kuŝis mortinta sur la tero, tuj reviviĝis kaj kun tirata akra ĉirpo kaj kun rapideco de sago flugis sur la arbon. Samtempe kun tio, Ĝojo eltiris sian kapon el la truo per si mem.

Ĝojo estis ekster danĝero.

"Dankon al la dia beno!" diris la patrino, kiu ridetis sub larmoj.

Sen ia ombro da dubo, la patrino kredis, ke la arbo havas en si ian dian forton, kiu benis kaj savis ŝian filon, kaj sentis, ke ŝi ŝuldis grandan dankon al ĝi.

La patrino tuj pafis sin hejmen, kaj baldaŭ revenis kun longa strio da ruĝa ŝtofo en la mano kaj ĉirkaŭligis per ĝi la trunkon de la banjano. Ŝi kategorie kredis, ke la banjano estas sankta arbo-dio.

De post tiu tago, unu fojon en ĉiu dua semajno la patrino kun Feliĉo kaj Ĝojo iris tien por bruligi al la arbo incensaĵon por ĝin danki pro ĝia beno al Ĝojo.

Tagon post tago, semajnon post semajno, monaton post monato, jaron post jaro, kun la tempo ĉiam pli kaj pli multe da homoj venas al la arbo por preĝi, por ke Dio benu ilin, iliajn familianojn kaj ĉion ĉe ili.

Nun la arbo aspektas pli juna kaj pli prospera ol antaŭe. Ĝi estas plene kovrita de ruĝaj ŝtofostroj, similaj al pompantaj floroj, inter kiuj birdoj gaje ludas kaj melodie kantas.

Rilate la truon, ĝi nun ankoraŭ oscedas kiel antaŭe, kaj tra ĝi ankoraŭ libere flugas birdoj jen enen, jen elen.



desegnita de **Paula Adúriz** (Hispanio)

Rita Mkrtĉjan (Armenio)



aŭtorino, Rita Mkrtĉjan

donacis al ŝi ne florbukedon, sed blankan katidon.

Li pensis, kuŝante en la lito;

-Vivo ofte faras sian "donacojn" al ĉiuj homoj.

Iuj suferas pro malsanoj, iuj pro kruelaj doloroj, iuj pro tragikaj eventoj en la mondo, iuj pro forpasoj de gekaruloj.

Sed feliĉaj momentoj en la sama vivo okazis, aŭ okazas ĉe ĉiu homo.

Ĉi-matene feliĉa sento pro la sonĝo daŭris eĉ kiam Li vekigis.

"Feliĉa" sonĝo havis respugulon en kara vizaĝo de edzino, en trilo de birdoj tra fenestro, en varmaj vortoj de geamikoj, en bela printempa tago, kiu sunigis tutan ĉambiron.

Li pensis, kion Li deziras pli ol ĉi-tio, eble... nur tiun ĉarman katidon el la sonĝo, kiu ekkuŝos apude kaj rigardos Lin per fidela, karesa rigardo.

Pentraĵo, kato kaj... "rompitaj" iluzioj!

Ĉio komencis de surpriza donaco. Ĉu vi ŝatas surprizojn?

Meri neniam ŝatis neatenditajn donacojn, ekskluzive nur la florojn.

Kiam ŝi ekvidis grandegan bildon, kiun en unu bela printempa tago donacis ŝiaj geamikoj, ŝi kaŝis sian malkontenton kaj "montris" ĝojon kaj dankeman rideton.

La bildo, kiu estis pentrita Meri kun unu el ŝiaj amataj katoj, estis belega, sed ĝi estis maloportune granda, kaj, se vi ne forgesis, Meri ne ŝatis surprizojn.

Bildo estis pentrita de unu el ŝiaj fotoĵoj.

Per helpo de unu el geamikoj kaj maŝino, la bildo feliĉe atingis hejmen.

La familianoj, admiritaj pro ĉarma pentraĵo de Meri kaj kato, nur demandis, kie eblas pendigi pezan bildon, ĉar muroj vere povas detruigi.

Alproksimiĝis por rigardi ankaŭ la kato, kiu longe spektis kaj ŝajnas demandis, kial ĝia blanka piedeto iĝis nigra en pentraĵo, kaj kie estas ĝia belega vosto, kiu tute malaperis.

Malkontenton de la kato neniu atentis, kaj la diskuto pri la loko por bildo ne havis rezultojn.

La bildo estis surmetita sur ŝranko, ĝis io poste estos decidita pri pli bona loko, muro, kaj pri malkontentaj "herooj" de la pentraĵo.

Kio okazis nokte, neniu komprenis, ĉar forta pluvo silentigis iun frapobruon.

- Eble io okazis en la strato, pripensis dormantaj familianoj.

Nur matena krieto de Meri ĉion klarigis.

De unu rigardo, ĉio iĝis komprenebla. Sur planko "kuŝis" belega pentraĵo, detruita vitro kaj pecoj de orblanka ornamaĵo. Apude sidis la kato, kiu post ŝia nokta "aventuro" kaj senkulpa dormado, alproksimiĝis rigardi, kial majstrino tiel maltrankvilas.

Meri rapide forkuris laborejon por ne sukcesi "mortigi" katon.

Ne, certe ŝi ĝin ne mortigus, karaj geamikoj, ĉar malobeema kato rigardis ŝin per brilaj okuletoj, same kiel en la bildo, kutime sidanta sur la ŝultro de amata majstrino.

Mikronovelo

Lu Dong

Amo inter dentpastro kaj dentbroso

Dentpastro kaj dentbroso enamiĝis. Sed la dentpastro malpliigis tagon post tago, preskaŭ ĝis nulo. Tiun tagon mastro lastfoje premis la dentpaston kaj ĵetis ĝian tubon en rubujon. La dentbroso ekkriis al la dentpastro: "Mi atendas vin!" Post tiuj vortoj ĝi forte pikis la buŝon de la mastro ĝis sangado. Ekkuntirinte la brovojn li diris: "Kia dentbrosado!" Dirinte tion, li volis ĵeti ĝin en rubujon. La dentbroso kaj la dentpastro ekrigardis unu al la alia kaj sentis ĝojon en la koro. Tiam la mastro aperis kaj petis al la mastro: "Ne ĵetu ĝin. Mi povos uzi ĝin purlavi fekujon!"

Elena Popova (Bulgario)



La Lumo

Avino kun sia nepino sidis solaj sur la benko antaŭ enirejo de sia domo. Antaŭ ili vastiĝis la urbo, ruĝa de sunsubiro. La urbo, plena de tundra bruado, de lacigitaj paŝoj kaj de pensoj pri la venonta nokto. De flamo kaj ombro, de espero kaj senespero, de kontenteco kaj tristeco. Urbo, kies fenestroj ruĝiĝis de la suna kareso. Urbo, kiel ĉiuj en la mondo.

aŭtorino Elena Popova

- Avinjo, - demandis la knabineto, - ĉu la suno iras dormi? Mi ankoraŭ sentas la lumon.

- Ne, karulino mia, ne! La suno malproksimiĝas de ni, sed neniam dormas. Ĝi iras vekti la homojn en aliaj landoj. Se ĝi ĉiam lumus, ni ne povus nin vivteni, samkiel se ĉiam estus mallume. La suno nun donacis malavare mirindan ruĝan veston al la nubetoj kaj ili estas belegaj, sed tio estas nur vesto. Pli grave estas, ke la suno potas la lumon, ĝi donacas parton de ĝi al la mondo kaj neniam sin laŭdas.

En la Biblio estas skribite, ke Dio kreis la Lumon kaj apartigis ĝin de la mallumo jam en la nua tago de la kreado. Kaj la kvinan tagon Dio kreis la birdojn, la sesan – la bestojn kaj la homojn. Sekve Li decidis, ke la homoj, jam kiam ili naskiĝas, devas vidi kaj diferencigi la Lumon de la mamllumo. Bonaĵo estas la Lumo por la homo. Kaj eble pro tio la tagoj havas multe da nomoj. Estas helaj tagoj – tiel oni nomas la festojn, blanka tago – senzorga, fastotagoj – nun tiuj tagoj estas tre multaj. Estas tagoj de malĝojo, nomataj nigraj. Oni diras, ke neniu scias kion portas la tago kaj la nokto, sed ĉiuj esperas, ke ĉiu nova tago portas novan bonŝancon...

La avino enpensiĝis kaj daŭris:

- La popolo ŝatas enigmojn, kiel tiu: “Tage – sanktulo, nokte – ŝtelulo.” Estas homoj, kiuj kaŝas siajn malbonajn aferojn dum la mallumo, ĉar ili timas la Lumon. La maljunulino parolis, la infano aŭskultis kaj penis kompreni ŝiajn vortojn.

Mi nun rememoris legendon kaj mi rakontos ĝin al vi.

- Dum la pasintaj tempoj la mevo posedis la Lumon. Ĝi timis ne perdi sian riĉaĵon kaj enŝlosis la lumon en oran skatolon. kiam ĝi volis, ĝi malfermis la skatolon kaj rigardis en ĝi. Ĝi vidis blujajn marojn, ruĝajn fiŝojn, blankajn riverojn, verdajn arbarojn, buntajn papiliojn... En la silento de la tempo ĝi rigardis la bildon de la

eterneco. La mevo gardis la Lumon, la homoj vivis en mallumo. Ili ne konis la ĉielon, nek la Teron, nek la maron. Ili meditis kiamaniere depreni la skatolon de la mevo.

Iun tagon la korvo ŝajnis sin malsana kaj diris al la mevo, ke nura kuracilo por ĝi estas ekrigardi la Lumon. La mevo permesis al ĝi tion. La korvo ekprenis la skatolon kaj forportis ĝin de la homoj – Ili ekrigardis en ĝi kaj vidis blujajn marojn, ruĝajn fiŝojn... Ili ekkonis la mondon.

La mevo ekploris kaj malsupreniĝis al la akvo serĉi la ŝtelitan skatolon. Ĝi flugis en la silento de la tempo kaj vidis la okulojn de la homoj - ili gardis la Lumon. Tiam la mevo amikiĝis kun la homoj.

- Avinjo, kiu ŝtelis la lumon de mi? Pro kio mi ne povas vidi?

- Mi ne scias... Antaŭnelonge mi rakontis al vi ne nur pri la Lumo, kiu estas videbla, sed ankaŭ pri la Lumo, kiu estas en niaj koroj. Se iu homo estas kun “blanka” vizaĝo, sed kun “nigra” koro, kiel oni diras, ĉu li vidas la lumon?

- Li vivas en mallumo, ĉu ne?

- Jes, - daŭrigis la avino. – Pro tio ekde kiam ekzistas la mondo, estas homoj, kiuj ŝtelas la Lumon. Ili bruligas librojn, bildojn, aŭ ĉesigas la muzikon... La blindulo strebas al la Lumo de la menso pli bone ol la homo, kiu vidas. Kaj tio estas pli grava. La spirita blindeco estas timiga... Vi ankoraŭ estas infano kaj vi ne povas kompreni tion. Vi eklernas pere de la libroj vagi tra la mondo kaj ĝin ekkoni eĉ pli bone de tiuj, kiuj vidas. Oni povas vidi la belecon de la mondo per la koro, ĉar tie estas kaŝita la amo. Vi komprenos, ke se oni estas blindaj aŭ ne, la tago kaj la nokto sekvas sian orbiton, ke la “blanko” kaj la “nigro” ĉiam iras kune. Vi havas bonan koron kaj mi estas certa, ke via vivovojo estos hela...

La avino rigardis al la belaj okuloj de sia nepino:

- Kiam mi ne estos viva, ĉiun matenon kaj vesperon vi deziru al la mondo pacon kaj lumon. Samkiel la Lumo, la amo ne estas vesto, kiun vi povas surmeti kaj kiun vi poste ĵetos. Ĝi estas eterna, ĝi estas kaŝita en la koro kaj la animo de ĉiu homo, sed ne ĉiu komprenas tion.

Ŝi ĉirkaŭprenis la knabineton:

- Zornice, vi devas scii, ke vi estas belega!

- Avinjo, kial vi donis al mi tiun nomon? Ĉu vi ne scias, ke mi neniam povos rigardi?

- Vi estis antaŭnaskita bebo. Pro tio vi travivis longan tempon en speciala lito en la malsanejo, ĝis vi komencis vivi normale. Viaj gepatroj elektis tiun nomon. Se iu ofendus vin aŭ vi havas ian doloron, vi rememoru, ke via nomo estas de la matenstelo, kiu ĉiam lumas kun amo al la Tero. Vi pensu pri ĝi!

La blankharara maljunulino kaj ŝia bela nepino daŭre sidis ĉirkaŭprenitaj sur la benko. La avino meditis voĉe, serĉante solidan apogon por la estonto de la infano.

Forsonis la vortoj de la saĝeco. Restis la espero. Nesentoble la suno kaŝis sin malantaŭ la horizonto. Noktiĝis.

Laimundas Abromas (Litovio)



Gloro por la kuraĝo

Mia najbaro Staseo malfruvespere de ie revenis hejmen. Li eniris sian loĝejon, kuŝiĝis sur la liton kaj ekdormis. Eble li ne de „ie“ revenis, sed post la vica esperantista kunveno. Kaj eble li, kiel ofte okazas, iom eldrinkis por „varmiĝi“, mi tion ne scias. Mi nur diras, ke li revenis,

aŭtoro, Laimundas Abromas

kuŝiĝis kaj ekdormis. Nu, endormiĝi li ankoraŭ ne sukcesis, sed estis preta por profundiĝi en la sonĝon... Tamen subite...

Ĉu pro tio, ke Staseo antaŭ la ekdormo blasfemis: „Al diabloj tiuj humuraĵoj!“, aŭ pro tio, ke li tro multe eldrinkis por „varmiĝo“, antaŭ li, nesciate de kie, aperis... la Diablo. Onidire la diablo envenas la domon eĉ tra la trueto serura. Do, du flagrantaj, ruĝaj, pufiĝintaj okuloj, la kornoj elstarantaj, longa vosto svingata, nigra felo, haregoj virkapraj kaj ĉio cetera. Tiu infera sendito fiksrigardas Staseon per siaj okuloj diablaj kaj atendas por ke mia najbaro timiĝu. Tamen Staseo flankeniĝis al la vando, sekve liberigis lokon, kaj diras al la kornulo:

-Sidiĝu vi apude. Eble ĉe vi, en la infero, bonaj temoj por humuraĵoj aŭ satiroj abundas? Ĉe ni, sur la Tero, jam mankas bonaj temoj. Mi jam priridis, primokis ĉiujn esperantistojn.

La diablo eksentis sin maloportune: ĉiuj tremas antaŭ ĝi, krucosignas sin, sed tiu tute ne reagas, tute indiferentas. Pro tio ĝi ĝustigis:

-Mi estas Diablo, mi venis el la infero, ĉu komprenas vi, kompatinda humoristo, satiristo malfeliĉa?

-Veraj humoristoj eĉ diablön ne timas. Jen, ekfumu, - kaj donas Staseo al la „gasto“ kubanan „Ligeros“.

Diablo ekfumus, laŭdas fortan bongustan fumon, sed cedi ne intencas. Estus hontinde cedi kontraŭ tiu verkistaĉo, kaj diras al Staseo:

-Sufiĉas al vi pri tiuj esperantistoj verki. Mi venis por forpreni vian animon.

-La animoj de la principohavaj humoristoj kaj satiristoj jam delonge estas venditaj al diablo, -respondis Staseo kaj tiretis la nigraharulon je la vosto. - Sidiĝu, mi regalos vin per „Ruskaja vodka“.

Kornulo eldrinkis kelkajn glasetojn, kaj vi mem scias, kia ĝi estas tiu „rusa vodka“.
Diablo komencis ĉirkaŭprenadi Staseon kaj diris:

-Humuristo kaj diablo estas infanoj de unu patro. Donu, frato, viajn lipharojn, ni interkisu unu la alian. Al mi plaĉas tiuj, kiuj eĉ diablon ne timas.

Tamen la veran humuriston per laŭdoj oni ne subaĉetos.

-Mi scias, kornulo, viajn intencojn – vi volas, ke mi verku satiron pri via ĉefo Lucifero. Ĉu ne?

-Cit, - ektimis Diablo kaj timeme ĉirkaŭrigardis. Poste flustre ekparolis:- Nu, eble, estu tiel, tamen kiel vi eksciis ?

-Veraj satiristoj ĉion sentas, ĉion scias, - fiere respondis Staseo.

-Mi vidas, frato, ke vi estas vera satiristo, pro tio mi ne bedaŭras, ke venis al vi. Do, molestas nin, damaĝas nin, kompatindajn diablojn, nia ĉefo Lucifero. Ĝi piedbatas nin, riproĉas, salajrojn ne pagas, pri la premioj mi eĉ ne parolas. Tri diabloj propravole forlasis inferon.

-Estos por mi granda plezuro la kornojn rompi nome al la Lucifero mem, - ĝoje respondis Staseo. –Mi al kutimiĝis por tiaj aferoj. Kaj senkaŭze vi, vostulo, min ofendas. Mi ne estas unu el tiuj, kiuj priridas simplajn esperantistojn. Mia celo estas la klubgvidantoj kaj prezidantoj de la landaj kaj internaciaj organizaĵoj.

-Tion mi scias, - respondis Diablo kaj per la hufoj frapetis la plankon. - Do, jen, ni interkonsentu.

-Ĉu la honorario estos? - scivolis Staseo.

-Nu, mi proponas al vi la postenon de la ĉefo de tenejo de la hejtmaterialoj en la infero. Vi ne tro petu. Tiuj, kiuj priridas nur vicajn geklubanojn, ricevas en la infero laboron de ŝpurigistoj, -fiere parolis Diablo.

-Aŭ donu al mi postenon de Lucifero mem, aŭ forkuru vi, kornulo, al diabloj! – kaj Staseo deturniĝis al la vando.

Malkontentis Diablo, ekĝemis kaj diris :

-Pli bone estru la satiristo ol Lucifero. Estu tiel, kiel vi volas. Tamen estas unu kondiĉo: por ke ekvidu vian talenton aliaj diabloj, antaŭ ol primoki Luciferon, vi verku humuraĵon pri la gvidanto de via Esperanto klubo.

-Pri tiu gapulo, sentaŭgulo? - demandis Staseo.

-Sed li estas ankaŭ aroganta, ordonema, - aldonis Diablo.

-Se vi, vostulo, kornulo, bezonas la garantion de mia talento, vi atendu dum kelkaj minutoj. Mi tiel priridos tiun kanajlon, tiun fihomon, ke eĉ diabloj ridigos.

Staseo prenis kajeron kaj skribilon. Kaj verkis li. Oni estu objektiva kaj agnosku la prioritaton al Staseo – li estis unua kaj ununura satiristo, verkinta humuraĵon pri la kluba gvidanto. Kaj ne ajnan humuraĵon, sed ... ridintan kaj pikeman, mordeman... Oni eĉ volas ekkrii : gloro por la kuraĝo!

Diablo legas humuraĵon kaj ne povas kunpremi la makzelojn. Unuvorte li ridegas diable...

Sed subite okazas la afero, ligita al spiritismo: Diablo forĵetas sian felon kaj antaŭ Staseo ekstaras... kluba gvidanto Salomono. Staras li kaj diras:

-Do, jen, estas afero jena, kolombeto vi mia! Vi intencas okupi la postenon de kluba prezidanto, ĉu ne?... Ne estos tiel! Do, kiel tiuj tri diabloj, vi forlasu Esperanto-klubon „propravole“... Ĥa, ĥa, ĥa...ĥi, ĥi, ĥi...

Staseo maksimume malfermis siajn okulojn kaj ... vekigis. Poste li forviŝis malvarman ŝviton de sur la frunto kaj serioze, sen humuro ekpensis, „Dankon al Dio, ke tio ĉi estis nur la postsekvo de verkoinspira fantazio, nur sonĝo. Des pli dormante.“



desegnita de *Paula Adúriz* (Hispanio)

Yin Jiaxin (Ĉinio)



aŭtoro, Yin Jiaxin

Poŝtelefonoj Mesaĝoj

La virino metis sian poŝtelefonon sur la litkapan ŝrankon antaŭ ol sin bani. La viro, kuŝante sur la lito, estis aŭskultanta disaŭdigon de radio. Subite ekvibris la poŝtelefono de la virino, kaj la viro vidis, ke sur la ekrano montriĝas la vokanto “Bankoservisto”. Li apenaŭ alportis la poŝtelefonon al la banĉambro, kiam la vibrado ĉesis. La viro ne kredis, ke banka servisto voku

sian klienton je tiel malfrua horo. Do li scivole alklakis la poŝtelefonon por esplori. Je sia surprizo la viro trovis, ke la virino restas konstante en kontakto kun tiu ĉi “Bankoservisto”, kaj plurfoje ilia interparolo daŭris eĉ pli ol duonan horon. “Ĉu tiu vere estas banka servisto?” Suspekto aperis en la cerbo kaj li ekhavis nigrajn ideojn.

En tiu momento venis de Bankoservisto mesaĝo, kiu legiĝis: “Kial vi ne akceptis mian telefonvokon?”

La viro ŝajnigis la posedanton de la poŝtelefono, eltajpante vortojn: “Pardonon! Min banante, mi ne aŭdis vibradon de la poŝtelefono. Ĉu vi bonfartas? Kio estas al vi?”

Jen estis respondo: “Mi fartas bone, panjo. Hodiaŭ nia ĉefinstruisto postulis, ke ĉiuj lernantoj morgaŭ pagu po ducent juanojn por studmaterialoj. Mi ne aŭdacas sciigi tion al paĉjo. Li nuntempe estas en acida humoro, ĉar lia kompanio jam bankrotis kaj lia virino ĵus foriris al oni ne scias kien. Mi ne devas al vi sendi mesaĝon por mono, sed mi ne havas alian elirejon.”

Grizaj nuboj balaigis el la kapo de la viro, kaj li al “Bankoservisto” tuj per la poŝtelefono ĝiris kvincent juanojn.

Baldaŭ venis el “Bankoservisto” alia mesaĝo: “Dankon, panjo. Sed vi donis tricent pliajn.”

“Por via eventuala bezono, mi intence donis la pliajn.” la viro respondis mesaĝe.

“Efektive mi ne volas peti de vi la monon, timante ke la onklo, via nova edzo, malĝojos sciinte ĉi tiun aferon.”

Denove per la sama poŝtelefono la viro respondis mesaĝe: “Kara filino, bonvole komuniku min kiam ajn vi havos malfacilaĵon. Parenteze, estu trankvila. Vi plaĉas al onklo. Ja estas li, kiu donis al mi kvincent juanojn.”

“Brave! Bonvolu transdoni mian dankon al onklo,” legiĝis la mesaĝo de “Bankoservisto”.

La viro plue sendis mesaĝon: “En ordo. Onklo kelkfoje esprimis, ke en libera tempo li veturos kune kun mi al via urbo kaj renkontiĝos kun vi.”

“Bonege! Mi kun plezuro kaj malpacienco atendos vin ambaŭ ĝis la renkontiĝa tago.”

Alklakinte la liston de kontaktuloj, la viro memdecide ŝanĝis la nomon “Bankoservisto” por “Kara Filino”, kaj poste transigis kvincent juanojn el sia poŝtelefono en tiun de la virino.

Post kiam la virino eniris en la dormoĉambron, la viro malŝaltis la radioaparaton, dirante al ŝi nenion pri ĵusa okazaĵo. La virino enlitiĝis kaj kuŝiĝi en la sinon de la viro. Brakumante la virinon, la viro estingis la lampon.

En la sekvanta frumateno, dum la viro estis en aŭtobuso al sia fabriko, li ricevis de la virino mesaĝon: “Kara edzo, koran dankon! Mi amas vin!”

Mikronivelo

Amo inter du ŝlosiloj

Ŝi telefonis: “Kie vi estas, mia kara? Mi jam perdis la ŝlosilon kaj ne povis eniri la domon.”

Li respondis: “Mi estas sur la revena vojo, mia dolĉa. Atendu momenton sen maltrankvileco. Mi tuj alvenos.”

Li parkumis la aŭton. Li vidis ŝin sidi malhelpa ĉe florbedo. Ili serĉis la ŝlosilon longan tempo, sed neniu povis trovi ĝin.

Ili vole nevole grimpis la ŝtuparon. Li elpoŝigis sian ŝlosilon kaj malfermis la pordon. Ili sidiĝis sur sofon kaj babilis.

Li diris: “Mia dolĉa, ĉu vi sentas, ke hodiaŭa sceno estas konata al vi?”

Ŝi respondis: “Kompreneble.”

Antaŭ pli ol dek jaroj ŝi same sidis ĉe florbedo malhelpa. Hazarde li preterpasis. Li demandis: “Kial vi sidas ĉi tie en tiel malvarma vetero?”

Ŝi respondis: “Mi perdis la ŝlosilon kaj ne povis eniri la domon.”

Ili serĉis ĝin ĉirkaŭe longan tempon, sed ili ambaŭ ne trovis ĝin. Pro tio li nature kunportis ŝin al sia apartamento. Ŝi loĝis en lia ĉambro kaj poste ili fariĝis geamantoj.

Li diris: “Pardonon, mia dolĉa. Fakte tiun nokton mi trovis la ŝlosilon kaj mi kaŝe enpoŝigis ĝin. Mi mensogis al vi.

Ŝi diris: “Kiel okazis tio tiel? Mia kara, ankaŭ mi petas vian pardonon. Fakter tiun nokton mi tute ne perdis la ŝlosilon kaj mi teni ĝin en la poŝo. Ankaŭ mi mensogis al vi.”

Poste ili ambaŭ elpoŝigis la ŝlosilojn, kiujn ili konservis kiel trezorojn. Ili kunmetis la ŝlosilojn, kiuj vere similis al ili mem en ĉirkaŭbrakumo.

*Elĉinigis **Herbeto***

Liu Cixin (1963-)



aŭtoro, Liu Cixin

Kunporti ŝiajn okulojn

Liu Cixin estas fama sciencfikcia verkisto en Ĉinio. Li gajnis premion Hugo en 2015, kiun aljuĝis la 73-a intrenacia sciencfikcia kongreso pri plejbona sciencfikcia romano.

Post laborado dum pli ol du sinsekvaj monatoj, mi vere sentis lacecon. Do mi petis al la direktoro doni al mi forpermeson de du tagoj, tiel ke mi faros mallongan vojaĝon por min distri. Li konsentis sub la kondiĉo, ke mi kunportu alian paron da okuloj, kaj mi konsentis. Li kondukis min por preni la okulojn.

La okuloj estis konservitaj en malgranda ĉambro ĉe la fino de la koridoro de la reg-centro, kie ankoraŭ restis pli ol dek paroj da okuloj nun.

Li enmanigis al mi paron da okuloj, kaj, montrante la grandan ekranon antaŭ mi, prezentis al mi la posedanton de la okuloj. Estis knabino, kiu ŝajne ĵus diplomiĝis kaj rigardis min stupore. En la loza spackostumo, ŝi aspektis eĉ pli delikate eta kaj kompatveka. Ŝajnas, ke ŝi ĵus rimarkis, ke spaco ne estas romantika paradizo, kiun ŝi imagis en la universitata biblioteko. En iuj flankoj ĝi eble estis iomete pli malbona ol la infero.

“Mi bedaŭas, ke mi ĝenas vin.” Ŝi faris kelkajn riverencojn al mi. Ŝia voĉo estis la plej leĝera voĉo, kiun mi iam aŭdis. Ŝajnis al mi, ke la voĉo alŝvebis el la ekstera spaco, kiel venteto blovas tra la kolosa kaj kruda ŝtala strukturo sur la fervojo kaj faras ilin tiel mola kiel modlargilo.

“Tute ne. Mi ĝojas, ke mi havas kompanon por kuniri. Kien vi volas iri?” mi demandis malkaŝeme.

“Kio? Ĉu vi ankoraŭ ne decidis kien iri?” Ŝi aspektis ĝoja. Sed mi tuj trovis du strangajn punktojn. Unue, komunikado inter la terglobo kaj la ekstera spaco ekzistas tempo-prokrasto. Eĉ la komunikado de la luno atingas malfrue je du sekundoj. Sed mi sentis, ke ŝia respondo ne estas prokrastita en tempo t.e. ŝi nun troviĝas sur la orbito proksima al la terglobo, de kie ne necesas pera komunikado al la tero, kaj oni ne bezonas multon da kosto kaj tempo. Pro tio ne necesas konfidi al aliaj la okulojn

dum ili ferias. Due la spaca kostumo sur ŝi estas stranga, laŭ mi, estiel inĝeniero pri la aerspaca persona ekipaĵo, ĉar sur ĉi tiu speco de spaca kostumo ne troviĝas kontraŭradia sistemo nek videblas la protektanta sistemo kontraŭ forta lumo sur la masko de la kasko metita apud ŝi. Mi ankaŭ rimarkis, ke la varmizola kaj malvarmiga sistemoj de ĉi tiu kostumo estas eksterordinare evoluintaj.

“En kiu spaca stacio vi troviĝas?” Mi turnis la kapon kaj demandis la direktoron.

“Ne demandu ĉi tion unue.” La direktoro montris malgajan mienon.

“Ne demandu nun, ĉu bone?” ŝi ankaŭ diris sur la ekrano, ankoraŭ kun povrinda aspekto.

“Ĉu vi ne estas enkarcerigita?” mi ŝercis, ĉar ŝia kajuto estis tre mallarĝa, evidente pilotkajuto de fluganta korpo. Diversaj navigad-sistemoj blinkis jen tie jen ĉi tie. Troviĝis nek fenestroj nek ekrano por vido, sed nur krajono, kiu perdis la pezon, turniĝadis super ŝia kapo, kio indikis, ke ŝi restis en spaco. Aŭdinte miajn vortoj, ŝi kaj la direktoro ekstuporis. Mi haste diris, “Bone, mi ne demandas, kion mi ne devas scii. Vi ankoraŭ decidu kien ni iros.”

Estis malfacile por ŝi fari decidon. Kun la manoj en la gantoj de la kostumo premantaj sur la brusto kaj la okuloj duonfermitaj, ŝi ŝajne pretis decidi pri vivo aŭ morto, aŭ ŝi imagis, ke la terglobo eksplodos post nia mallonga vojaĝo. Mi ne povis reteni ridadon.

“Ho, ĉi tio ne facilas por mi. Se vi legis “Tri tagojn por vidi” de Helen Keller, vi povas kompreni kiom malfacila tio estas!”

“Ni ne havas tri tagojn, sed nur du. En la tempo homoj en ĉi tiu epoko estas malriĉuloj. Sed ni estas pli bonŝancaj ol tiu blindulo de la dudeka jarcento, ĉar mi kaj viaj okuloj povas atingi kiun ajn lokon sur la tero nur en tri horoj.”

“Do iru al la loko, kien ni iris antaŭ ol navigi!” Ŝi diris al mi tiun lokon, kaj mi foriris kun ŝiaj okuloj.

Stepo

Ĉi tie estas la kunigejo inter montoj kaj ebenejo, kaj inter stepo kaj arbaro, la kunigejo, kiu distancas je pli ol du kilometroj de la spaca centro, kie mi laboras. Tien mi atingis je dek kvin minutoj da veturo per jononsfera aeroplano. La dezerto Taklamagan sterniĝanta antaŭ mi jam ŝanĝiĝis de dezerto al stepo post klopodado de pluraj generacioj, kaj post sekva klopodado de aliaj pluraj generacioj en forta regado de populacio, refariĝis loko, en kiu troviĝas preskaŭ neniam homaj spuroj.

Nun la granda stepo etendiĝas ĝis la horizonto. La Montaro Tianshan malantaŭ ĝi kovriĝas per la malhelverda arbaro, kaj pluraj montsuproj kroniĝas per arĝenta neĝo. Mi elprenis ŝiajn okulojn kaj surmetis ilin.

La tiel nomataj okuloj fakte estas sensoraj okulvitroj. Kiam vi surmetas ilin, ĉiuj bildoj, kiujn vi vidas, estas elsenditaj de la ultralt-frekvenca informa ondo kaj povas esti ricevitaj de la homo, kiu surmetas la samajn sensoraj okulvitroj. Do li povas vidi ĉion, kion vi vidas, same kiel vi posedas liajn okulojn.

Nun pli ol miliono da homoj laboras sur la luno kaj la zono de asteroidoj tutjare. Surpriziga estas la kosto de ilia revojaĝo al la terglobo por ferii. Pro tio la avarema Aerospaca Buroo dezajnis ĉi tiun aĵon, tiel ke ĉiu astronauto loĝanta en ekstera spaco ekhavas alian paron da okuloj sur la terglobo. La bonŝanculoj, kiuj vere povas ferii tie, surmetas tiujn okulojn por kundividi la feliĉon kun tiuj astronautoj kun nostalgio al la hejmltero. Komence ĉi tiu malgranda umo estis rigardata kiel mokaĵo, sed poste ĝi populariĝis pro tio, ke tiuj feriantoj, kiuj utiligas ĝin, povas ricevi rimarkindan subvencion. Pro adoptado de pintaj teknikoj la artefaritaj okuloj fariĝas pli kaj pli rafinitaj. Nun ĝi eĉ povas, pere de kolektado de la cerba ondo de tiu, kiu ĝin surmetas, elsendi ties tuŝosenton kaj gustosenton. Ferii kunportante alian paron da okuloj fariĝas aktivecoj de publika intereso por la laborantoj, kiuj okupiĝas pri aerospaca sistemo sur la terglobo. Pro privataĵoj dum ferirado ne ĉiuj volentas kunporti plian paron da okuloj, sed mi ne zorgas pri tio ĉifoje.

Mi multe laŭdis la pejzaĝon antaŭ mi, sed mi aŭdis el ŝiaj okuloj mildan sonoj de ŝia plorsingulto.

“Post lastfoja foriro mi ofte sonĝis pri ĉi loko, kaj nun mi revenas en mian sonĝon!” Tiu delikata voĉo eliris el ŝiaj okuloj. “Mi ŝajne elrapidis el la profunda akvo nun por enspiri aeron. Mi vere timas enfermitecon.

Mi vere aŭdis, ke ŝi faras profundan enspiradon.

Mi diris, “Sed vi ne estas enfermita nun. Kompare kun la spaco ĉirkaŭ vi, ĉi tiu stepo estas tro malgranda.”

Ŝi eksilentis, ŝajne ĉesigante sian spiradon.

“Aĥ, kompreneble, homoj en la spaco estas ankoraŭ enfermitaj. Piloto nomata Jegel en la dudeka jarcento havis frazon, kiu priskribis la astronautojn en la kosmoŝipo, dirante, ke ili similas ...”

“...la enladigitan viandon.”

Ni ambaŭ ridis. Ŝi subite kriegis: “Jen floroj, estas floroj ĉi tie, kiuj mankis lastfoje, kiam mi venis!” Jes, la vasta stepo estas ĉie punktitaj de malgrandaj floroj kiel steloj. “Ĉu vi povas rigardi tiun floron de proksime?” Mi kaŭriĝis por rigardi. “Jes, vere bela! Ĉu mi povas flari ĝin?” “Ne, ne deŝiru ĝin!” Mi devis min klini al la tero kaj flaris ĝin. La delikata bonodoro alŝvebis. “Aĥ, ankaŭ mi flaris ĝin. Ĝi vere ŝajnas serenado flosanta tra nebulo!”

Mi ridete skuis la kapon. Jen estas epoko, en kiu regas ŝanĝiĝoj de fulmoj kaj freneza ĉasado. La knabinoj estas ege impulsigamej. Estas tro malmultaj sentimentalaj knabinoj, kia ŝi, kiuj eĉ ploras je ekvido de floro.

“Ĉu ni povas doni al ĉi tiu malgranda floro nomon? Um ... ni nomu ĝin Songô. Ĉu ni rigardu tiun floron?”

“Kiel ĝi nomiĝu? Nu, ni nomu ĝin Pluveto. Ni iru pluen al tiu floro. Aĥ, dankon. Laŭ sia helbluo, ĝi nomiĝu Lunlumo....”

Ni nur rigardis la florojn, flaris ilin kaj donis al ili nomojn unu post alia. Ŝi estis ebria en senĉesa nomado de la floroj, forgesante ĉion alian. Mi vere enuiĝis pri la infaneca ludo. Kiam mi insistis ĉesigi la ludon, ni jam donis nomojn al centg floroj. Eklevinte la kapon, mi trovis, ke ni iris jam grandan distancon, kaj mi reiris preni la tornistran, kiu kuŝis sur la herbejo. Nun aŭdiĝis ŝia ŝriko: “Ho mia Dio, vi surpaŝas Neĝeton!” Mi restarigis la blankan sovaĝan floron kaj trovis tion ridinda. Mi ŝirmis po unu floro per ambaŭ manoj kaj demandis al ŝi, “Kiel ili nomiĝas? Kiaj ili aspektas?”

“Tiu maldekstre estas nomata Kristalo, ankaŭ blanka. Ĝi havas tri apartigitajn foliojn sur sia tigo; kaj tiu dekstre nomiĝas Flamo, rozkolora, kaj ĝi havas kvar foliojn sur la tigo. La supraj du folioj staras unu de la alia, kaj la malsupraj du ligiĝas kune.”

Ŝi pravis, kaj mi iomete emociiĝis.

“Kiel vi vidas, mi kaj ili ĉiuj konas unu la alian. En la posta longa tempo mi pensos pri ĉiu el ili denove kaj denove, kiel recitante belan fabellibron. La mondo tie estas tiel bona!”

“Mia mondo ĉi tie? Se vi estas tiel infaneca kaj sentimentala, ĝi estas ankaŭ via mondo. Tiuj ĉikanemaj spacaj psikologoj restigos vin sur ĉi terglobob por ĉiam.”

Promenante sencele sur la stepo, mi baldaŭ alvenis al la roĝo kaŝita en la herbo. Transpasinte ĝin, mi daŭre antaŭeniris. Ŝi vokis min kaj diris, “Mi vere volas enmeti mian manon en la rojon.” Kaŭriĝinte mi metis mian manon en la rojon kaj friskeco fluis tra mia korpo. Ŝiaj okuloj uzis ultralta-frekvencaj informondo komunikis ĉi tiun senton al ŝi malproksime en la spaco, kaj mi denove aŭdis ŝin suspiri.

“Ĉu vi estas varma tie?” Mi memoris ŝian mallarĝan regan kajuton kaj ŝian spacan kostumo kun evoluinta varmizoliga sistemo.

“Varme, varme kiel en infero. Kio estas ĉi tio? Kio estas ĉi tio? La vento de la herbejo?!” Nuntempe mi nur elprenis mian manon el la akvo, kaj la venteto blovis sur la malsekaj manoj. Jen la vento de la ĉielo!” Mi levis la manojn en la venteto ĝis ili sekigis de la blovoj. Poste, laŭ ŝia peto, mi malsekigis mian manojn en la roĝo, kaj poste levis ili en la venton por komuniki al ŝi la senton de la Ĉiela Regno. Tiele ni pasigis longan tempon.

Post reirado sur la vojnon mi marŝis silente, kaj ŝi diris milde: “Via mondo tie estas vere bona.”

Mi diris, “Mi ne scias. La griza vivo malakrigis tiajn sentojn de mi.”

“Kiel tio okazus?! Kiom multe da sentoj povas doni ĉi mondo! Neniu povas distingi ĉi tiujn sentojn, same kiel oni ne povas kalkuli pluvogutojn en ŝtormpluvo. Rigardu la nubamason, arĝente blankan en la ĉielo. Nun mi pensas, ke ĝi ŝajnas solido, kiel la altaj montoj kunmetitaj de malpeza jado. Dum la stepo sube similas vaporajon, kvazaŭ la tuta verda herbo forflugus de la tero kaj fariĝus verda maro de nuboj. Rigardu! Kiam la nubamaso ŝirmas la sunon kaj ree forlosas, kiel impone la lumo kaj ombro sur la stepo ŝanĝiĝas kaj miraĝas! Ĉu vi vere ne sentas ion?”

Kunportante ŝiajn okulojn, mi iris sur la stepo dum unu tago, ĉar ŝi soifis pririgardon al ĉiu sovaĝa floro, ĉiu herebeto, ĉiu sumradio vibranta en la herbo kaj aŭskultadon al ĉiuspecajn voĉojn sur la stepo. La subite aperanta roĝo kaj eĉ fiŝeto en la roĝo ŝin agitis tre multe. Neatendite alblovis brizo kaj alŝvebis delikata aromo de verda herbo igis ŝin larmi... Mi sentis, ke ŝiaj emocioj al ĉi mondo riĉas ĝis la grado de malsaneco.

Antaŭ la sunsubiro, mi marŝis al soleca blanka kabano sur la stepo, kiu estas malgranda hotelo preparita por turistoj. Ŝajnis, ke neniu vizitis ĝin dum longa tempo. Estis nur malfacilmova eksmoda roboto gardanta la hotelon. Mi estis laca kaj malsata, sed mi nakoraŭ finis la vespermanĝon, kiun ŝi proponis, ke ni tuj iru spekti la sunsubiron.

“Rigardante la sunsubiron iom post iom malaperi, dum la nokto malrapide vualas la arbaron, ni ŝajne aŭskultas la plej belan simfonion en la universo,” ŝi diris ravite. Mi sekrete plendadis, sed mi trenis miajn pezajn kruojn por tio.

La subiranta suno super la stepo vere belis, sed la sentoj, kiujn ŝi elverŝis, igis ĉi ĉion ekhavi eksterordinaran koloron.

“Vi ŝategas ĉi tiujn ordinarajn aferojn,” mi diris al ŝi sur la revena vojo. Tiam la nokto malheliĝis kaj la steloj jam aperis sur la ĉielo.

“Kial vi ne, ĉar la vivo konsistas el ĉi tio,” ŝi diris.

“Mi kaj multaj aliaj homoj neeble farias ĉi tion kiel vi. En ĉi tiu epoko, tro facilas akiri. Por ne paroli pri materiaj aĵoj, estas facile akiri sen ajna peno la medion kun la blua ĉielo kaj verda akvo, la trankvilon de la kamparo kaj de la insulo. Eĉ la amo, kiun antaŭaj homoj konsideris la plej malfacile trovebla, povas esti almenaŭ provizore spertata en la reto de virtuala realo.

Do homoj ne plu alte taksas ion ajn. Fronte al multaj fruktoj, kiuj ili povas atingi, ili mordetas kaj tuj forĵetas ilin.

“Tamen tiaj fruktoj troviĝas antaŭ kelkaj homoj,” ŝi diris mallaŭte.

Mi sentis, ke mi vundis ŝin. Mi ne sciiis, kial ni ne parolas unu al la alia sur la revena vojo.

En la sonĝo en ĉi tiu nokto, mi vidis ŝin, surportante spacan kostumon en la malgranda regkajuto kun larmoj en la okuloj, kaj ŝi, etendante siajn manojn, kriis, “Elprenu min tuj. Mi timas enfermitecon!” Mi surprizite vekigis. Ŝi vere min vokis, ĉar mi kuŝis sur mia dorso, portante ŝiajn okulojn.

“Elprenu min, ĉu bone? Ni iru vidi la lunon. La luno devas jam leviĝi!”

Kun peza kapo kaj konfuza menso mi malvolonte ellitiĝis. Kiam mi eliris eksteren, mi trovis, ke la luno vere leviĝis, kaj la nokta nebulo sur la stepo igis ĝin ruĝeta. Estis sennombra vaglumoj de la lampiroj flosis sur la herba maro de la stepo, kvazaŭ la stepo en la lunlumo ankaŭ estis en profunda dormo, kaj estas sennombraj lumoj de fajrujoj fosantaj sur la nebula herba maro, kvazaŭ la sonĝo de la stepo aperus.

Etendinte miajn membrojn, mi diris al la nokta ĉielo, “Hola, ĉu vi vidas, sur via orbito, la lunon prilumi ĉi tien? Diru al mi la proksimuman pozicion de via kosmoŝipo, eble mi ankoraŭ povas vidi ĝin. Mi certas, ke ĝi flugas sur la orbito proksima al la terglobo.”

Ŝi ne respondis al mi, sed duonvoĉe zumis kanton. Post zumado de mallonga melodio, ŝi diris, “Jen ‘La Lunlumo’ de Debussy.” Ŝi daŭrigis sian zumadon, tute forgesante mian ekzistadon. La melodio de “La Lunlumo” kaj la lunlumo mem alteriĝis de spaco al la stepo kune. Mi imagis, ke super la delikata knabino en la spaco pendas la arĝenta luno kaj sube troviĝas la blua terglobo. Kaj ŝi flugas inter ili kaj la muziko fandiĝas kun la lunlumo.

Ĝis post unu horo mi reiris al la lito, kaj ŝi ankoraŭ zumis muzikon. Mi ne sciiis, ĉu ĝi estas melodio de Debussy aŭ ne. La milda muziko ŝvebis en mia sonĝo...

Mi ne sciiis kiam la muziko fariĝis ŝia alvoko, kiu vekis min denove kaj volis, ke mi eliru.

“Ĉu vi ne vidis la lunon?” mi diris kolere.

“Sed ne samas nun. Ĉu vi ankoraŭ memoras, ke nuboj troviĝis en la okcidento, sed nun tiuj nuboj eble jam flosis for kaj nun la luno duone kaŝas sin en ili. Imagu pri la luno kaj ombro sur la stepo, kiel bela! Tio ja estas alia muziko. Mi petas, ke vi kunportu miajn okulojn por eliri!”

Kvankam tre ĝenite, mi eliris. La nuboj vere alŝvebis kaj la luno tranaĝis en la nuboj. Grandaj lummakuloj malrapide flosis kiel antikvaj memoroj pezaj makuloj sur la herbejo flosis malrapide, kiel praantikvaj memoroj, kiuj aperis profunde sub la tero.

“Vi vere ŝajnas sentimentala poeto de la dekoka jarcento. Vi ne taŭgas por ĉi tiu epoko, kaj malpli des por esti astronauto,” mi diris al la nokta ĉielo. Kaj poste mi demetis siajn okulojn kaj pendis ilin sur la branĉo de ruĝa saliko. “Spektu la lunon

vi mem. Mi tre volas enlitiĝi, kaj mi devas rapidi reen al la spaca centro morgaŭ por daŭrigi mian senpoezian vivon.”

Ŝia delikata voĉo venis el ŝiaj okuloj. Mi ne povis aŭdi kion ŝi diris, kaj ŝi reiris.

Kiam mi vekigis, la ĉielo plene tagigis. La grizaj nuboj jam plene kovris la ĉielon, kaj la stepo estis vualita en nebula pluveto. Ŝiaj okuloj ankoraŭ pendis sur la branĉo de ruĝa saliko, kaj tavolo da akva nebulo tegis la lensojn. Mi zorgeme viŝsekigis la lensojn kaj surmetas ilin. Mi pensis, ke ŝi ankoraŭ dormas post tutnokta rigardado al la luno, sed mi aŭdis el ŝia okulkoj basan plorsingultan sonon kaj mia koro tuj moliĝis.

“Pardonon al mi. Mi estis tro laca hieraŭ nokte.”

“Ne, ne estas via kaŭzo. Em, em, nubiĝis de la tria horo kaj duono kaj pluvis denove post la kvina horo ...”

“Vi ne dormis tra la nokto?”

“Em, em, pro pluvo, mi, mi ne povas vidi la sunleviĝon, mi vere volas vidi la sunleviĝon de la stepo, em, em, mi vere volas vidi ĝin, ho ...”

Mia koro ŝajne fandiĝis de io. En mia cerbo aperis ŝia aspekto kun la okuloj makulitaj de larmoj kaj la nazo snufanta. Mi sentis humidecon en miaj okuloj. Mi devas konfesi, ke en la pasintaj tago kaj nokto, ŝi lernigis al mi ion tiel neklaritan, kiel la nebulaj lumo kaj ombro en la nokto sur la stepo. Pro tio, la mondo en miaj okuloj estos iom diferenca de la antaŭa.

“Ĉiam okazas sunleviĝo sur la stepo. Poste mi certe kunportas viajn okulojn aŭ vi mem por spekti ĝin, ĉu bone?”

Ŝi ĉesis plori, kaj subite ŝi flustris:

“Aŭskultu ...”

Mi aŭdis nenion, sed mi fariĝis nervoza.

“Ĝi estas la unua krio de birdo. En pluvo ankaŭ sin trovas birdoj!” ŝi diris ekscitite kun la tono tiel solena kiel tiu de homoj, kiuj aŭdas la sonorilon de la jarcento.

Kosmoŝipo “Sunsubiro n-ro 6”

Kiam mi ree revenis en la grizan vivon kaj penraban laboron, tiuj travivaĵoj iom post iom falis en forgeson. Post longa tempo, kiam mi lavis la vestojn, kiujn mi portis dum la spaca vojaĝo, mi trovis du aŭ tri herbajn semojn sur mia pantalono. Samtempe, en la profundo de mia konscio, malgranda semo restis. En mia soleca spirita dezerto, la semo jam eligis verdan ĝermon, kiun oni apenaŭ rimarkis. Post la peniga dumtaga laboro, kvankam senkonscia, mi jam povis senti la malfortan poeziecon kiam la vespera vento kisis mian vizaĝon. La pepoj ankaŭ vekis mian atenton. Starante sur la ponto super la trafiko, mi rigardis la nokton malrapide fali sur la urbon... La mondo ankoraŭ estas griza en miaj okuloj, sed la freŝverdaj punktoj aperas en ĝi kaj pliigas. Kiam mi perceptis tiujn ŝanĝiĝojn, mi denove

ekpensis pri ŝi.

NERIMARKITE ŝia medio, kie ŝi troviĝis, ofte drivis en mia cerbo, dum mi estis libera aŭ en sonĝado: la enfermita kaj mallarĝa regkajuto kaj ŝia varmizoliga spaca kostumo... Poste tiuj aĵoj foriĝis en mia konscio kaj nur unu el ili restis elstare. Ĝi estas la pezperdiĝa kraĵono, kiu rotaciis super ŝia kapo. Mi ne sciis kial, kiam mi ekfermis miajn okulojn, ĉi kraĵono ĉiam floris antaŭ miaj okuloj. Finfine, unu tagon, kiam mi eniris la altan halon de la Spaca Centro, grandega murpentraĵo, kiun mi vidis sennombrajn fojojn, allogis min. La murpentraĵo estis la blua terglobo fotita en la spaco. La flosanta kraĵono denove aperis antaŭ miaj okuloj, kaj ĝi flugis sur la murpentraĵo alglue. Kaj mi ree aŭdis ŝian voĉon:

“Mi timas enfermitecon ...” fulmis tra mia menso.

Krom en la spaco estas alia loko kiu perdigas la pezon!

Mi kuris supren freneza kaj forte frakasis la pordon de la direktoro. Tiu ne estis ene. Mi sciis subkonscie, kie li estas, kaj fluge kuris al la ĉelo, kie konserviĝis la okulparoj. Estis vere, ke li estis tie, rigardante la grandan ekranon, sur kiu ŝi troviĝis. Sur la granda ekrano, ŝi, en la enfermita regkajuto, ankoraŭ portis la “spacan kostumon”. Senmova estis la bildo, kiu estis antaŭtempe kameraita;

“Vi venas por ŝi, ĉu?” la direktoro diris, kun siaj okuloj najlitaj al la ekrano.

“Kie ŝi estas?!” Mi demandis laŭte.

“Vi eble divenas, ke ŝi estas piloto de la kosmoŝipo ‘Sunsubiro n-ro 6.’”

Ĉion mi komprenis. Mi senforte falis sur la tapiŝon.

La “Projekto Sunsubiro” origine planis lanĉi dek kosmoŝipojn: de la “kosmoŝipo Sunsubiro n-ro 1” al la “kosmoŝipo Sunsubiro n-ro 10”. Sed la plano estis interrompita pro tio, ke la “Sunsubiro n-ro 6” trafis akcidenton. La “Projekto Sunsubiro” estis laŭnorma esplor-navigado, kaj ĝia navigada proceduro preskaŭ samas kiel aliaj navigadoj vojaĝoj en la Spaca Centro.

La sola diferenco estas, ke la kosmoŝipo “Sunsubiro” ne flugas al spaco, sed ŝovas sin en la profundon de la tero.

Unu kaj duonan jarcentojn post la unua spaca navigado homoj komencis esploradon en la kontraŭa direkto. Serio da Ternavigada kosmoŝipoj “Sunsubiro” estis la unua provo en ĉi flanko.

Antaŭ kvar jaroj mi spektis la lanĉado de “Sunsubiro n-ro 1” en televidprogramo. Tiam estis malfrua nokto. Meze de la Turpan-baseno sin trovis fajropilko tiel brilega kiel la suno, kies lumo igis bunta matenruĝo la nubtavalon en la nokta ĉielo super Xingjiang. Kiam la fajropilko malheliĝis, la “Sunsubiro n-ro 1” jam sin ŝovis profunden en la teron kaj la granda areo da grundo estis ruĝe bruligita. Meze de la ronda areo radianta ruĝe sin trovis lago de magmo, kie bolis ardanta magmo kaj leviĝis blankbrilaj huloj. Tiun nokton oni eĉ en malproksima Urumĉio, povis senti malfortan tremmo de la tero, kiam la kosmoŝipo impetis tra la stratumojn.

La unuaj kvin kosmoŝipoj de la “Projekto Sunsubiro” sukcese plenumis la ternavigadon kaj revenis al la tersurfaco sekure. Inter ili la “Sunsubiro n-ro 5” starigis la rekordon de la pleja profundeeco en navigado en stratumo de la homaro ĝis nun:

3,100 kilometroj sub la marnivelo. La kosmoŝipo “Sunsubiro n-ro 6” ne pretis rompi ĉi tiun rekordon, ĉar laŭ la konkludoj de la geofizikistoj, en la profundo de la stratumaj 3400-3500 kilometroj, ekzistas interfaco de tera mantelo kaj tera kerno, la interfaco, kiu nomiĝas “Gutenberg-malkontinueco” akademie. Se oni trapasus ĉi tiun interfacon, oni renkontus la likvan fer-nikelan kernon de la terglobo, kie abrupte pliiĝas la materia denseco, kaj la “Sunsubiro n-ro 6” laŭ dezajna intenseco ne estas permesita navigi en tiel granda denseco.

Komence la “Sunsubiro n-ro 6” navigis glate. La flugŝipo trapasis la interfacon—Moho-malkontinueco—inter la tera mantelo kaj la tera kerno, kaj restis kvin horojn sur la glitanta surfaco de la drivo de la tektonaj platoj. Kaj poste ĝi komencis longan vojaĝon de pli ol tri mil kilometroj en la tera mantelo. Kvankam la astronautoj en spaca navigo estas solecaj, ili povas spekti senliman spacon kaj imponan stelaron; dum la navigistoj en la teresplora flugŝipo povas nur tuŝi laŭsente senĉese moviĝantan supren altdensencan materion ĉirkaŭ la flugŝipo. Sur la holografia retrotelevizio riviĝas tia sceno: la ardanta magmo blindige brilas, ruliĝas kaj kun la plonĝo de la flugŝipo, rapide kuniĝas ĉe la pobo, plenigante la pasejon forlasitan de la flugŝipo. Laŭ rememoro de navigisto, kiam ili fermas siajn okulojn, ili vizias la magmon rapide kuniĝantan kaj tuj subpremantan. Tio konsciigas al ili, ke la granda pezego subpremanta kaj senĉese densiĝanta materio super ili estas la sento de sufokado, kiun la homoj sur la tersurfaco malfacile komprenas. Tia sento ofte turmentas la navigistojn kaj ilin atakas la fobio de fermiteco.

La “Sunsubiro n-ro 6” bonege plenumis la diversajn esplorojn dum navigado. La rapideco de la flugŝipo estai ĉirkaŭ 15 kilometrojn hore, kaj la flugŝipo bezonis navigi dum 20 horoj por atingi la antaŭdifinitan profundon. Tamen la alarmo aperis kiam la flugŝipo navigis dum 15 horoj kaj 40 minutoj. Pere de la stratuma radaro oni sciiĝis, ke la materia denseco de la navigada areo pliiĝis de 6,3 gramoj ĝis 9,5 gramoj po kuba centimetro. La ingrediencoj de la materio ankaŭ ŝanĝiĝis de siliciatoj al metaloj ĉefe el nikelo kaj fero, kaj la materio ŝanĝiĝis de solida stato al la likva. Kvankam la “Sunsubiro n-ro 6” nur atingis la profundecon de 2500 kilometroj tiutempe, ĉiuj signoj kruele indikis, ke ili jam sin trudis en la teran kernon! Kiel sciate poste ĝi estas la fendego de la tera manteo kondukanta al la tera kerno. La altprema likvaj fero kaj nikelo en la tera kerno plenigas ĉi tiun fendon, kio plilogigas je 1000 kilometroj la surfacon de Geterbur-malkontinueco sur la naviga kurso. La flugŝipo urĝe turnis la direkton por elstirmi la fendegon. Sed tiumomente okazis la malfeliĉaĵo. La ŝipkorpo farita el neŭtronaj materialoj sukcesis subteni subite pliiĝantan pezon ĝis 1600 tunoj en ĉiu kvadrata metro. Sed la flugŝipo konsistas el tri partoj: en la antaŭa parto instaligis brulfanda motoro; en la meza estas ĉefa kajuto kaj en la vosta funkcias antaŭenpuŝanta motoro. Kiam la flugŝipo turnis sian direkton en la likvaj nikelo kaj fero, kies denseco multe pli grandas ol la dezajnita denseco kaj premo, disrompiĝis la kuniga parto de la brulfanda motoro kaj la ĉefa kajuto. Oni povas vidi el la bildo, kiun sendas per neŭtrina komunikado sur “Sunsubiro n-ro 6”, ke la brulfanda motoro disiĝinte de la ŝipkorpo estas forvorita de la ruĝbrilanta likvaj

fero kaj nikelo dum palpebruma momento. La stratuma brulfanda motoro estas materio, kiu per superalttemperatura pafa fluo tranĉas la direkton de navigado. Sen ĝi la flugŝipo “Sunsubiro n-ro 6” neniel povas fari ajnan paŝon en la stratumoj. La denseco de la tera kerno estas mirinda, kaj tiu de la neŭtrona materialo des pli grandas. La flosforto produktita de la likvaj fero kaj nikelo malgrandas pli ol la mezpezo de la flugŝipo, tiel ke ĝi sinkas al la tera kerno.

Post kiam homoj ascendis sur la luno, ili ehhavis la kapablon navigi al Saturno nur post unu kaj duona jarcentoj. Koncerne stratumajn esploradojn, homoj bezonas uzi la same longan tempon por navigi de la tera mantelo al la tera kerno. Nun se la ter-esplora flugŝipo misnavigis en la teran kernon, tio similas al la lunascenda spacŝipo, kiu devias de la luno kaj perdiĝas en la ekstera spaco dum la meza periodo de la dudek jarcentoj. La espero de savado tute ne ekzistas.

Feliĉe, la korpo de la ĉefa kajuto de la “Sunsubiro n-ro 6” estas fidinda, kaj la neŭtrina komunikada sistemo sur la ŝipo tenas perfektan kontakton. En la posta unu jaro la naviga skipo persistis en laborado kaj resendis al la tero amason da valoraj materialoj akiritaj el la tera kerno. Ili estas envolvita en kelkaj miloj da kilometroj da materio. Por ne paroli pri aero kaj akvo eĉ mankas spaco por moviĝi. Kaj plie la ĉirkaŭa temperaturo altas ĝis 5.000 centigradoj, kaj la premo povas igi la karbonon dum sekundo la likva fernikelo de diamanto. Ili kompakte alpremas la ŝipon de ĉirkaŭe, tiel ke nur neŭtrinoj povas penetri. Fakte la ŝipo sin trovas en la grandega ŝtalfandejo! En tia mondo “Infero” en “Dia Komedio” prezentas la paradizon. En tia mondo kio signifas la vivo? Ĉu oni povus karakterizi ĝin per fragileco?

Peza psikologia premo ronĝas la nervojn de la navigistoj sur flugŝipo “Sunsubiro n-ro 6”. Iun tagon, la geologia inĝeniero sur la ŝipo subite saltis de sia dormo kaj malfermis la varmizoligan pordon de sia hermetika kajuto. Kvankam ĝi estas nur unu el la kvar pordoj, la enpenetranta varma ondo tuj bruligis lin kiel lignokarbon. La navigestro en alia hermetika ĉelo fulmrapide fermis la varmizoligan pordon, tiel ke ili evitas la tutan pereon de la ŝipo. Li mem estis grave brulvundita kaj mortis, finskribinte la lastan paĝon de la naviga loglibro.

Ekde tiam, ĉe la plej profunda punkto de ĉi tiu planedo, ŝi restis sola en la flugŝipo. Nun interne de la flugŝipo regis la stato de pezperdiĝo. La flugŝipo jam falis profunden ĝis 6.800 kilometroj, kiu estas la plej profunda loko. Ŝi estas la unua, kiu atingis la plej profundan lokon de la terglobo.

Ŝia mondo en la tera kerno estis la varme sufoka regkajuto mallarĝa je malpli ol dek kvadrataj metroj. En la ŝipo disponeblis neŭtrinaj sensil-okulvitroj, per kiuj ŝi povas teni iom da emocia rilato kun la tera mondo. Tamen, ĉi tiu speco de rilato kiel vivdaŭro ne povas daŭri dum longa tempo, kaj la energio de la neŭtrina komunikada ekipaĵo en la flugŝipo baldaŭ elĉerpiĝos. La ekzistanta energio ne plu povas subteni la superaltrapidan komunikadon de datumo por la sensil-okulvitroj. Tia kontakto jam rompiĝis antaŭ tri monatoj, kiam mi veturis per la aeroplano de la stepo al la Spaca Centro. Tiam mi metis ŝiajn okulojn en mian vojaĝsakon.

Tiu mateno sen sunleviĝo sur la stepo en nebula pluvo ja estis la homa mondo, kiun ŝi vidis lastfoje.

Poste, la flugŝipo “Sunsubiro n-ro 6” povis nur voĉe kaj datume komunikiĝis kun la tera mondo kaj konservis voĉon kaj datuman komunikadon kun la tero, kaj eĉ tia komunikado disrompiĝis en iu malfrua nokto, kun la rezulto, ke ŝi estis enfermita sola en la tera kerno por eterne.

La ŝelo el neŭtronaj materialoj de la flugŝipo sufiĉe rezistas kontraŭ la granda premo de la tera kerno kaj la vivcikla sistemo povos funkcii kvindek ĝis okdek jaroj premon de la tero, kaj la vivcikla sistemo sur la kosmoŝipo ankaŭ povas funkcii dum 50 ĝis 80 jaroj. Ŝi vivos sian lastan vivon en la mondo de la tera kerno kun areo de malpli ol 10 kvadrataj metroj.

Mi ne kuraĝas imagi ŝian lastan adiaŭon al la tera mondo, sed la direktoro petis min aŭdi la sonregistradon ekster miaj atendoj.

Ĉi-foje, la neŭtrina fasko el ŝia koro estis tre malforta, kaj ŝia voĉo estis intermita, sed trankvila.

“... la lasta suplementa sugesto, kiun vi sendis, estas ricevita. Poste mi pene laboros laŭ la tuta esplora plano. En la estonteco, eble post kelkaj generacioj terkerna flugŝipo trovs la flugŝipon “Sunsubiro n-ro 6” kaj kupliĝos kun ĝi. Kaj aliaj eniros ĉi tien. Mi deziras, ke tiuj materialoj, kiujn mi restiĝis, sin montros utilaj. Estu trankvilaj. Mi aranĝas mian vivon ĉi tie. Mi jam adaptiĝis al la ĉi tiea medio, kaj mi ne plu sentas mallarĝecon kaj enfermitecon. La tuta mondo ĉirkaŭas min. Kiam mi fermas miajn okulojn, mi povas vidi la grandan stepon supran, kaj ĉiun floretan, al kiu mi donis nomon. Adiaŭ.”

Travidebla terglobo

En la postaj jaroj mi iris al multaj lokoj. Kien ajn mi iris, mi ŝatis kuŝiĝi sur la tero.

Mi iam kuŝis sur la plaĝo de Hainan-insulo, sur la glacio kaj neĝo en Alasko, en la betula arbaro en Rusujo, kaj sur la varmaĝa dezerto de Saharo... Ĉiufoje en tiu momento, la tero fariĝis travidebla en mia menso. Profunde je pli ol 6.000 kilometroj sub mi, centre de ĉi tiu grandega kristala pilko, mi viziis la flugŝipon “Sunsubiro n-ro 6”, kiu parkis tie, kaj eksentis ŝiajn korbatojn alŝvebantaj el la tera kerno profunda je kelkaj mil kilometroj. Mi imagis pri la ora sunlumo kaj arĝenta lunlumo. La kosmoŝipo sendis ŝiajn korbatojn de miloj da kilometroj profunde. Mi imagas, ke la ora sunlumo kaj arĝenta lunlumo, kiuj penetris al la centro de la terglobo. Kaj mi aŭdis ŝian kantvoĉon de “Lunlumo” kaj ŝian softan diron:

“... tre bela, ĉi tio estas alia speco de muziko ...”

Unu penso konsolis min: “Kien ajn mi iras, eĉ al la plej fora ekstremo de la tero, mi restas ne plu tiel malproksima de ŝi.”

elĉinigi Viktoro Li (Ĉinio)

Wu Ruozeng (1943-2020)



Milithundo Heizi

Tiun jaron mi konatiĝis kun dresisto de milithundo. Mi metis al li demandon: “Ĝis kia grado la hundo povas esti saĝa?” Li respondis: “Krom sen povo paroli, ĝi neniom diferencas de la homo.” Aŭdinte lian respondon, mi miris. Poste mi daŭrigis: “Ĉu vi miksis sentojn kun la aserto?” “Ne!” li certigis.

aŭtoro, Wu Ruozeng

Al mi li rakontis kelkajn historiojn pri hundo, spertitajn de si mem. Aliaj jam paliĝas en mia menso, sed nur unu mi ankoraŭ memortenas, eĉ freŝe kaj klare.

En lia barakaro iam estis hundo nomata Heizi, eksterordinare saĝa. Iutage, kelkaj dresistoj decidis testi la reagan kapablon de Heizi per iu aparta procedo. Ili alvokis dekkelkajn homojn kaj faris, ke ili staru vice, kaj ke unu el ili iru “ŝteli” ion el iu barako kaj, kaŝinte ĝin ie, restaru en la vico. Tiam la dresisto alkondukis Heizi kaj lasis ke ĝi priserĉu la ŝtelitaĵon. Rapide, Heizi jam revenis kun la ŝtelita objekto inter la dentoj. La dresisto tre ĝojis, mane frapetante la kolon de Heizi en signo de premio. Poste, li fingre montris tiujn homojn starantajn, por ke Heizi elserĉu la “ŝteliston”. Heizi iris al ili kaj prisnufis jen tiun jen ĉi tiun. Post mallonga tempo ĝi firme denttenis krurumon de pantalono de la “ŝtelisto” kaj eltiris lin el la vico.

Devas esti dirite, ke Heizi perfekte plenumis la taskon, sed la dresisto forte skuis sian kapon direkte al Heizi, dirante: “Ne! Ne estas li! Denove iru serĉi!” Heizi ege konfuziĝis kun la okuloj trembrilantaj de perplekseco, ĉar ĝi estis forte konvinkita, ke ĝi ne misserĉis homon, sed aliflanke, al sia mastro ĝi ĉiam havis absolutan konfidon... “Ne estas li! Ree serĉu!” la mastro persistis. Heizi fidis al li. Ĝi iris priserĉi... Post ripeta kaj skrupula distingado ĝi eltiris ankoraŭ tiun homon. “Ne, ne tiu!” la mastro ree skuis sian kapon: “Iru ankoraŭfoje!”

Heizi, tiom pli konsternita, faris nenion alian, ol denove reiri. Ĉi-foje Heizi uzis pli longan tempon por fari snufesploradon. Fine ĝi staris ĉe la piedo de la “ŝtelisto” kaj iris ĉirkaŭ li, rigardante al la mastro – nu, mi sentas ke tio ja estas li... “Ne, ne tiu! Absolute ne!” hurlis la mastro, kiu mienis des pli serioze.

Heizi deprimiĝis akmee. Ĉe ĉies piedo ĝi haltis momente por juĝi, ĉu tiu estas ŝtelisto aŭ ne, kaj intertempe turnis sin al la mastro, provante el liaj okuloj ellegi signon aŭ ion similan... Fine, ĝi ekkaptis en la okulmieno de la mastro apenaŭ

senteblan subtilaĵon, kaj eltiris tiun, kiu staris apud ĝi.

Kompreneble, tio estis erara.

La dresistoj kaj starantoj en la vico eksplodis per ridego, kio konfuzis Heizi. La dresisto alvokis la “ŝteliston”, parolante al Heizi: “Propre vi faris senmise, sed vi ne persistis plu...”

En palpebruma daŭro, kio la ĉeestantojn surprizis, konsternis kaj bedaŭris, estis ke ili vidis, ke Heizi ekmuĝis de granda angoro kaj verŝis varmajn larmojn, kiam ĝi ekkomprenis ke tio estas pura trompo. Peze klininte sian kapon, ĝi foriris paŝon post paŝo...

“Heizi, Heizi, kien vi iras?” la dresisto ektimis kaj kuris post ĝi.

Heizi ne donis al li atenton, mem sole irante el la barakaro.

“Heizi, Heizi, pardonon al mi!” la dresisto ploris.

Ĝi restis surda al li, sin ne returnante.

“Heizi, ne koleru. Mi celas nur vin amuzi.” La dresisto, kun torentaj larmoj, sin ĵetis por firme brakumi Heizi.

Ĝi sin liberigis de lia brakumo kaj sin trenis al la piedo de monto apud la barakaro.

Tie ĝi kuŝis surventre kaj subvente.

.....

Kelkajn tagojn poste Heizi ne manĝis nek trinkis kaj ĉiam estis deprimita. Kiel ajn la dresisto ĝin konsole karesis, sed ĝi neniel povis lin pardoni.

Tiam oni ekkomprenis: Ankaŭ la hundoj havas dignon.

Aŭ eĉ: Ili estas pli dignaj, ol la homoj.

.....

De tiam Heizi ne plu fidis al sia dresisto kaj... eĉ al ĉiuj homoj. Samtempe ĝia temperamento ege ŝanĝiĝis. Ĝi agis ne plu tiel, kiel iam ĝi kondutis fulmrapide, impone kaj kuraĝe... La dresotrupo faris nenion alian, ol kun bedaŭro lasi ĝin retiriĝi.



elĉinigiŝ Minosun

Cong Weixi (1933-2019)



aŭtoro, Cong Weixi

Rememoroj

pri blankaj cignoj

Mi ne scias, kial mi venas al ĉi tiu suda urbo. Ĉu pro tio, ke ĉi tie staras hotelo nomata Blanka Cigno, en kiu mi prisongis, la unuan nokton, la kvar cignojn, kiujn mi iam vidis ?

En 1964, kiam mi servute reformis min en punlaborejo, mi konatiĝis unuafoje kun ili, obeemaj kaj anĝele belaj,

sub la vinbera pergolo ĉe la oficejo. Pririgardante ilian senmakulite blankan plumaron tutkorpan, mi kontraŭvole demandis interne: vi havas la bluan ĉielon kiel vian hejmlandon, la riverojn kaj lagojn kiel vian poezian paradizon, pro kio vi flugas al ĉi tia loko, eĉ senĝene kvazaŭ promenante kun facilanima humoro ?

Forflugu, miaj anĝeloj! Ĉi tie estas malliberiga kaĝejo por vi, sed ne la loko por vi promeni libervole. Via familio, via grupo vivas ĉe la verdeta riverbordo riĉa je densaj akvaj plantaĵoj kun rosoj brilantaj. Kial vi emocie alkrociĝas al ĉi tiu damnita loko ?

Post nelonge, mi informiĝis, ke la posedanto de tiuj du cignoj fortranĉis al ili la randon de ties flugiloj. Iam antaŭe, ili vivadis sur Xingkai-lago en la vasta sovaĝejo en la nordorienta parto de nia lando, kaj estis kaptitaj de la homoj el la najbara punlaborejo. Kiam la estro de la nomita punlaborejo, laŭordone, translokiĝis al la loko, kie mi punlaboris, li enkaĝigis kaj kunportis la du “fratinojn”, kiel siajn familianojn, al la teritorio de nia punlaborejo.

Tio, kio ronĝis mian koron, estis ke, pro ŝanĝiĝo de ilia vivmedio, la denaska mildeco de la cignoj estos forroditaj de la tempofluo, kaj la du anĝelaj “fratinoj” perdos ĉion krom eksterajn aspekton kaj figuron. Iun tagon mi iris al la punlaboreja oficejo por peti instrukciojn pro ia afero. Kiam mi trairis sub la vinberan pergolon, min subite atakis la fratina paro, frapante siajn mallongigitajn flugilojn. Unu el du furioze gakadis kontraŭ mi, feroce kvazaŭ hundo gardantan domon, kaj la alia beke kaptis min je la ĉifonita maniko kaj forŝiris strion da tolaĵo. Post baraktado, mi forkuregis el sub la pergolo. Tuj kiam mi liberiĝis de la alarma paniko, mi naskis svarmon da duboj en la tuta cerbo:

“Ĉu ili kondutas kiel cignoj?”

“Ĉu ili estas hundoj kun du kruroj ?”

“Ili ne estas hundoj nigraj, nek flavaj nek grizaj.”

“Ili, denaturigitaj, estas blankaj hundoj kun flugiloj !”

Meze de la 50aj jaroj, mi, kiel juna verkisto, iam veturis al la Sanjiang-ebenejo en la nordoriento. Tie sterniĝis punktitaĵ marĉoj similantaj al brilaj gemoj inkrustitaj en granda peco de smeraldo; tie ĉe la akvorandoj borderataj de pompaj floroj, cignoj intime ĉirkaŭprenas perkole unu kun la alia aŭ dormetas kun flugiloj fermitaj, aspektante kvazaŭ sennombraj anĝeloj el la ĉielo kuŝus en sonĝo. Ĉiam okazas, ke “sentinelo” staras gardanta la belan socion kontraŭ homoj, kontraŭ pafilfaŭkoj kaj kontraŭ vulturoj kaj aliaj minacantaj sovaĝbestoj. Kaj neniam povas esti, ke la cignoj surprize ĝenas siajn najbarojn, nek forvoras samspecajn birdojn, nek fiere pretendas al si la reĝinecon de la birda regno, nek aspektas arogante, sin nomante “kameloo inter ŝafoj”.

Ĉasisto el la Luobei-stepo certigis al mi, ke li neniam pafmortigas blankajn cignojn. Laŭ lia diro, la birdoj de ĉi tiu speco, kun neĝe blanka plumaro, posedas kapablon elkovi idojn por alispecaj birdoj, kiuj, tuj forflugas senrevenue post demeto de ovo. Kaj la blankaj cignoj, ludante la rolon de patrino, elkovas la idojn por alispecaj birdoj. Min ege surprizis la frapanta kontrasto inter la blankaj cignoj socie vivantaj sur la stepo kaj tiuj enviĝantaj inter la malliberuloj de la punlaborejo.

Post ripetada cerbumado, mi ŝajne eltiris el tio ion pravigan: magmo ŝprucanta el sub la terkruŝto povas amasiĝi en monton; tritikgrajnoj enigitaj en muelilon povas fariĝi faruno; kial la anĝele belaj cignoj ne povas ŝanĝi sian kompateman animon, post kiam ili estas dresse breditaj de sia posedanto kaj provokeme molestitaj de tiuj malliberuloj? Komence, ili kontraŭstaras pro sia instinkto de ekzistado, kaj iom post iom, ili prenas homojn kiel siajn ĝismortajn malamikojn, kaj ekatakas je la unua vido tiujn kun homa kapo sur la kolo.

Proksimume unu jaron poste, vico da blankaj cignoj migris norden en printempo. Deĉiele ili trovis la du birdojn de sia sama speco sur la tero. Rondfluginte longan tempon, du el ili fine flugis malsupren, verŝajne por esprimi sian fratecon al la surtera duo. Sed, ili apenaŭ alteriĝis, kiam la paro vivanta ĉe la malliberiga kaĝejo, kvazaŭ furioj, alprenis atakeman teniĝon kontraŭ la vizitantoj, kiuj gakadis, parolante la cignan lingvon kompreneblan nur al cigna socio. La du surteraj cignoj, jam perdinte la tutajn ecojn de cignaj gefratoj. En granda konsterniĝo, la du atakatoj finfine suprenflugis. Ĝuste tiam aŭdiĝis pafoj de ĉaspafiloj, kaj la belaj vizitantaj anĝeloj ambaŭ plumbe falis teren.

Pafoj vekis min el la sonĝo. Kaj mi ekpensis pri la misio de la literaturo.

Virteco kaj malboneco.

Ekzisto kaj morto.

Nudigitaj animo kaj karno

“Mi spertis transmutacion kiel pupo transformiĝis en tineon.”

“Ĉu tio, efektive, estas spirita sublimado aŭ spirita degenerado?”

Nun, rustmakuloj kovras la metalkapon de la pioĉo kuŝanta sur mia balkono. Kelkfoje, kiam mi purigis la balkonon, mi ĉiam ŝmiris ĝin per ia oleeca kontraŭrustigaĵo, provante teni ĝian antaŭan brilecon, sed mi malsukcesis. Kun rapida turniĝado de la tablokalendaraj folioj kaj kun alterna aperado kaj malaperado de la suno kaj la luno, la pioĉa metalkapo tute perdis sian antaŭan rebrolecon.

Ĝi estas la pioĉa metalkapo, kiun mi uzis en 1968, kiam mi “prilaboris la terglobo”¹ en la farmejo de la Chadian-punlaborejo. Poste, kvankam mi, pro la metamorfozado de la ĉina politika klimato ĉu nuba aŭ serena, ĉu frida aŭ varma, mi senĉese translokiĝadis de stacio al stacio sur la vojo de mia punlaborado plena je kirlantaj ventblovoj kaj sabloŝtormoj, mi tamen ĝin dorlotis, domaĝis kaj ne emis forĵeti ĝin, por ke ĝi akompanu min ĝis kiam mi returnis al Pekino. La kaŭzo kuŝas en tio, ke profunde sub la makuloj de rusto troviĝas la spirita transmutacio de mi, kiel homo.

En la flamanta aŭgusto de tiu jaro, estis nekompareble varmege, tiel ke oni povas priskribi la veteron, sen ajna troigo, per la populara diro “fajro falas el la ĉielo, flamo ŝprucas el sub la tero.” La “Okcidenta Virga Tero”, enhavanta altan alkalecon, ne povas kreskiĝi arbon kun sufiĉa ombro por ŝirmi kontraŭ la suno. Iutage posttagmeze eĉ je la temperaturo de 39 centigradoj, tien iris laŭordone nia laborgrupo konsistanta el kvinspecaj malbonuloj (nome: bienuloj, kulakoj, kontraŭrevoluciuloj, aĉuloj kaj dekstremuloj) por larĝigi alkalakvan kanaleton profundan je 2 metroj. Se oni starus senmove, ili sin trovus kvazaŭ en la ventro de la ardanta fornego. Dume, tiutage, la estro de nia punlaborejo donis al ni ferecan ordonon, ke ni nepre kunligu la kanaleton kun Yinzhong-rivero por alkonduki riverakvon forlavi alkalajon.

Surhavante pajlan ĉapelon kun difektita ĉirkaŭrando, mi svingadis pioĉon kaj fosadis, nur kun kalsono tra la tuta korpo. Ŝvitgutoj pluvis kaj post momento mia kalsono algluiĝis per ŝviteroj al mia ingveno. Mia kaco inter miaj ambaŭ gamboj suferis de ruĝa ŝveliĝo kaj doloro pro frotado al ĝi de la kunkudraĵo de la kalsono, kaj aldone al tio, ĝi mariniĝis per ŝviteroj, kio simple sentigis kruelan torturadon al mia organo.

“Pa! Demetu tiun tukon kovrantan vian hontaĵon!” kriaĉis al mi la estro kun familia nomo Liu, “alie ĝi elfrotos vian aĵon ĝis kaĉiĝo!”

Levante mian kapon, mi rigardis, ke miaj kunenkarcerigitoj, en orda vico staranta sur la kanaleta fundo, svingadas pioĉojn nudaj tutkorpe, sin senvestiginte

dio scias de kiam. Dum punlaborado de 11 jaroj ekde 1957 ĝis 1968, mi rigardadis ĉiujn divers-specajn okazintaĵojn en la punlaborejo, escepte de ĉi tiu grupiĝo de nudaj viroj, kiun mi spektis la unuan fojon en mia vivo.

“He! Ne tenu vin nobla, vi, Stinkulo la Naŭa!”²

“Meritite! Li suferu de tio, kion li mem volantas!”

“Labori nudkorpe estas momenta afero. Kaj se vi frotdifektos vian kacon, tio estos dumviva afero!”

“Demetu do!”

“Se vi ne demetos, ni vin nudigu!”

“Ne atendu ĝis nia agado!”

En miajn orelojn svarmis rideksplodoj kaj sonoj de falado de ŝviteroj. Post kelka hezitemo, mi fine havigis al mi la ĉionspitan kuraĝon kaj forigis la tute malsekigitan tolaĵon el inter miaj gamboj, ne pro urĝigo far de miaj kunenkarcerigitoj, sed, precize-dire, pro la neeltenebla doloro ĉe mia ingveno. Mi pensis: Kio mi estas? Mi nur estas Stinkulo la Naŭa, kiu kleriĝis kelkajn jarojn pli ol ili. Ni estas kunvivantoj, dormantaj sur la sama terlitego kaj manĝantaj kaĉon el la sama fera kaldronego. En la punlaborejo ni intelektuloj okupas pli malnoblan pozicion, kaj ni estas malestime nomitaj “Fekaj-manĝantoj”³ de tiaj kunenkarcerigitoj kiaj friponoj kaj poŝtelistoj. Darvino postlasis brilan aforismon: “Travivas nur tiuj estaĵoj en la Naturo, kiuj sin adaptas al ĉirkaŭaj cirkonstancoj.” Sur ĉi tiu dezerteca sal-alkala vastejo, ĉu taŭgas la nobleco tenata de la pedantoj, kiuj sekvas la principon “Ne kotŝirmi sin eĉ el la ŝlimejo”?

Post kiam mi demetis la kalsonon kovranta la hontaĵon, mi jam gajnis malstreĉitecon kaj liberiĝis de la torddoloro kvazaŭ pro torturado, kvankam mi sentis memriproĉon en la koro.

“Kiel do? Ĉu vi sentas vin iom komforta?” admone kriĉis la estro, “Memoru, ‘kian monton oni ascendas, tian kanton oni kantas’. En ĉi tiu kaĝosimila punlaborejo, ju pli pedante oni kondutas, des pli da suferoj oni havigas al si!”

“...”

Nun estis mia vico por iom ripozi sur la kanaleta bordo. La estro alprenis la rimedon por alterne ripozi, ĝuste pro tio, ke nenia arbombro kontraŭ la ardanta suno troviĝis sur la brulanta tero. Nermalproksime de la kanaleta, li trovis malplenan ĉerkon, el kiu vagantaj hundoj fortiris la kuŝantan kadavron. La ripozantoj devis alterne sin ŝovi por malstreĉiĝi en la ĉerko kun spaco sufiĉa nur por unu homo. Kaj mi senheziteme enŝoviĝis.

Ĉu ni estis homoj aŭ fantomoj? Nur Dio scias.

Kvankam la haladzo pikis la nazon, tio tamen estis multe pli eltenebla ol la mizero de la korpa malkovro sub la brulanta suno. Kiam mi kuŝigis mian nudan

korpon en la ĉerkon, kiu provizis al mi ombbron kontraŭ la suno, mi ekpensis en mi.

“Mi spertis transmutacion kiel pupo transformiĝas en tineon.”

“Ĉu tio, efektive, estas spirita sublimado aŭ spirita degenerado?”

“Mi devas teni ĉi tiun tagon en mia memoro.”

“Mi devas konservi ĉi tiun pioĉon.”

La pioĉon mi ĉiam konservas, sed la precizan daton de tiu tago de aŭgusto, 1968, mi jam forgesis, kun la paso de tempflujo. Ĉiujare en la plej varmega tempdaŭro de la somero, kiam ŝviteroj gutadis sur la paperfoliojn de mia manuskripto, mi, denove troviĝanta en la verkista rondo de Pekino, ofte rakontas al mi mem la pasintan anekdoton: Kiel Sun Wukong⁴ transpasinta la Flamantan Monton, mi neniam renkontos la vere varmegan someron...

Notoj :

1). *Humora esprimo por “labori en la kamparo”.*

2). *Malestima titolado al ‘intelektulo’ dum la Kultura Revolucio (1966 - 1976).*

3). *en la ĉina lingvo, ‘intelektulo’ kaj ‘fekaĵ-manĝanto’ havas la similan prononcon, tiel ke oni malice mokis intelektulojn per tia esprimo.*

4). *Sun Wukong: la protagonisto en la fama klasika romano Pilgramado al La Okcidento, ĉiopova simio, origine el la ĉina mito.*

elĉinigiĝ Du Mozi

Mikronovelo

Viro kaj virino

Kiam viro kaj virino remis en kaŭzuka boato sur la maro, ili renkontis ŝarkon. Proksime al la ŝarko dek metrojn la viro haste puŝis la virinon en la maron. Elinginta ponardon, li montris ĝin al ŝi kaj diris: “Nur unu el ni povas plu vivi.” Post tio li rapide forremis por eskapo. La virino falis en malesperon. Tamen ŝi ne riproĉis la malkuraĝeman kaj egoistan viron, sed plendis pri si mem pro sia blinda enamiĝo al li. Ŝi silente atendis la venon de la morto. Kvin metrojn, kvar metrojn proksime al ŝi, sed la ŝarko ĉirkaŭnaĝis ŝin kaj impetis al la kaŭĉuka boato. Ĝi trenis la viron en akvon kaj furioze disŝiris lin. Baldaŭ la viro malaperis senspure. Poste la virino estis savita de preterveturanta komercŝipo. Ŝi trovis, ke la ŝipestro ploras, rigardante la marakvon. Ŝi demandis kial li ploras. Li rakontis, ke la viro tranĉis al si la pojnon per tranĉileto kaj lasis la sangon flui en marakvon por allogi la ŝarkon, kaj ke pro tio la ŝarko naĝis preter vi kaj ĉasis la odoron de la sango, kio savis vin. Kiel profunde li amas vin!

Elĉinigiĝ Herbeto

Chiung Yao (1938-)



En profunda korto (5)

elĉinigiĝis Veĵdo

5.

Sabate posttagmeze Fang Siying ne donis lecionojn. Tuj post ŝia tagmanĝo, Tingting enkuris en ŝian ĉambron, kriante, “Instruistino Fang, tuj foriru! Maljuna You jam venas por

aŭtorino, Chiung Yao

veturigi vin per aŭto.”

“Ho!” Fang iom kuntiris siajn brovojn kaj tuj poste ekridetis. “Via patro ja havas klaran memoron pri tio.”

“Ĉu via kofro jam estas ordigita? Mi venigu Maljunan You por forporti ĝin!” kriante, Tingting elkuris rapide.

Starante en la ĉambro, Fang ekhavis konfuzitan kaj absurdan senton dum momento. Kio okazas? Ĉu mi vere transloĝiĝos ĉe Familion Bai? Tio ŝajnas neebla, absurda kaj nebone konsiderita. Ŝi ankoraŭ rememoris pri la surpriza vizaĝesprimo de lernejestro Liu kaj Li Yusheng, kiam ili aŭdis pri tiu ĉi informo. Ŝi ankaŭ konis grandan malaprobon en ili. Sed neniu donis admonon. Ŝi sciis, ke en la okuloj de lernejestro kaj aliaj, ŝi ĉiam estas groteska kaj nekomprenebla figuro, kiun ili ne povas imagi. Fakte, ŝi ja sentis sin absurda! Ĉiu el ŝiaj nervoj eĉ sugestis al ŝi, ke eraras ŝia decido transloĝiĝi al Familio Bai. Ĝi estas tre komplika familio. Se ŝi implikiĝos en ĝin, ŝi rikoltos nenion bonan! Sed, ŝi ne povas rezisti kontraŭ tiu potenca allogo, kiu devigas ŝin transloĝiĝi. Vere magipova estas Familio Bai—Hanyan bieno, la ruino, la blindulo, la knabino kaj tiuj forpasintaj rakontoj... magie regas ŝin, ke ŝi neniel sukcesas rezisti. Aŭ, iutage ŝi vere verkos novelon, kiel Jane Eyre, en kiu troviĝas ruino, blindulo, guvernistino... Ŝi kaptiĝis de subita frostotremo. Kiel stranga koincido! Nun en ĝi mankas freneza virino. Ĉu vere kaŝiĝas freneza virino en la granda korto de Familio Bai?

Tingting kure revenis, kaj ŝi anhelis pro ir-reira kurado. Sur ŝia frunto buklo da haroj algluiĝis malsekaj de ŝvito. Ŝiaj vangoj ruĝiĝis pro kurado, sed ŝiaj okuloj brilis de eksciteco. Malantaŭ ŝi staris maldika kaj alta viro je la aĝo de ĉirkaŭ kvardek

jaroj, bonorde vestita per blanka ĉemizo kaj griza eŭropstila pantalono. Lia figuro estis malgrasa kaj rekta. Kontaktinte la rigardon de la viro, Fang nereteneble ektemis—lia rigardo estis akra.

“Ĉu fraŭlino Fang? Mi estas Maljuna You. Sinjoro Bai sendas min por renkonti vin.”

“Ho, dankon,” ŝi diris. Ŝi ekŝovis la okulvitrojn sur la nazo, esperante, ke ŝi aspektu iom majesta. “La kofro estas tie. Tio ĝenas vin.”

Ekpreninte la kofron, li eliris. Fang iris al la oficejo de lernejestro por transdoni la ŝlosilon. Kaj poste, ŝi enaŭtomobiligis. Ĉirkaŭprenante la malgrasajn ŝultretojn de Tingting, ŝi rigardis ekster la fenestron. Laŭ ambaŭ vobordoj rapide retiriĝis malantaŭen te-plantejo. La te-plantejo de Familio Bai! Ŝia menso denove falis en distriĝemon. Kion ŝi mem faras finfine? La aŭta veturado nur daŭris tri minutojn. Yazhu alkuris malfermi la pordegon, kaj la aŭto englitis la ĝardenon de Familio Bai kaj haltis antaŭ la vitra pordo de ĉefa domo. Tingting la unua elaŭtiĝis, kriante, “Instruistino Fang, mi konduku vin al via ĉambro. Ne zorgu pri la kofro. Maljuna You portos ĝin supren.” Prenante la manon de Fang, Tingting eniris la salonon per saltetantaj paŝoj. Tra la senhoma salono, ŝi, prenannte Fang-n je la mano, rapidis supren laŭ ŝtuparo. Abrupte ŝi haltigis siajn paŝojn. Kiam ŝi levis la kapon por rigardi supren, gajeco tuj malaperis el ŝia vizaĝo kaj ŝiaj lipetoj paliĝis. Ankaŭ Fang haltigis pro surpriziteco. Ŝi direktis sian rigardon supren kaj ŝia rigardo ektuŝis tiun de virino. Tiu estis tre ĉarma virino, kiu tute malsamis ol tiu, kiun Fang imagis pri duonpatrino. Ŝi havis ovalan vizaĝon, pintan mentoneton, paron da grandaj kaj brilaj okuloj, delikatajn brovojn kaj malgrandan buŝon. Sur ŝia vizaĝo troviĝis nenio kritikinda. Se oni insistus disfendi harojn pri la mankoj sur ŝia vizaĝo, oni povus aserti, ke ŝia vizaĝesprimo estas tro flegma, tro severa kaj tro apatia. Ŝia staturo estis ankaŭ bone formita kun moderaj dikeco kaj alteco. Ŝi surportis rozkoloran bluzon kun blua bordero, larĝ-manikan kaj strikt-talian, kiu aspektis tre bele kaj ŝike kaj bone sidis sur ŝi. Ŝiaj pufitaj haroj plektiĝis en multajn fasketojn da bukloj, kio havigis al ŝi iom da langvoreco kaj mildigis la survizaĝan flegmon. De sur ŝiaj oreloj pendis rozkoloraj grandaj ringoj, pendolante petoleme kaj kokete. Ŝi estis lerta en ŝminkado, kaj krome, ŝi estis ankoraŭ tre juna, nur iom pli ol tridek jarojn. Ŝia vestaĵo plie malpliigis ŝian aĝon. Fang sentis grandan bedaŭron por ŝi, ke se Ba Peiwen ne estus blinda, li neniel montrus malvarmon al ĉi tiu juna kaj ĉarma edzino.

Samtempe kiam Fang ekzamenis tiun virinon, tiu ankaŭ ŝin okule esploris sekrete. Fang divenis, ke la impresoj, kiun ŝi mem donis al la virino, certe estas multe malpli bona ol tiu donita de la virino al ŝi. Ŝi devas aspekti kiel tipa instruistino: miopaj okuloj, malmoda hartubero sur la kapo kaj nigra ĉinstila robo sur la korpo. Ŝi legis malklaran kaj malestiman rideton sur la vizaĝo de la virino. Poste tiu kviete diris,

“Bonvenon, fraŭlino Fang.”

“Ĉu vi estas sinjorino Bai?” demandante, ŝi malrapide supreniris, ankoraŭ tenante Tingting-n je la mano.

“Jes,” la sinjorino faris ekrideton deteniĝeman kaj nesondeblan. “Tingting kondukos vin al via ĉambro,” ŝi diris, modere montrante sian identecon de gastigantino. “Pro okupiteco mi ne prizorgas vin. Mi esperas, ke vi alkitimiĝu al loĝado en nia hejmo, kaj des pli, ke Tingting ne tro ĝenu vin.”

“Ŝi faros nenian ĝenon,” ridete diris Fang, rigardante al ŝiaj okuloj, grandaj, belaj kaj profundaj. “Tingting estas bonkondata knabino. Ni jam familiariĝas unu al la alia.”

“Ĉu jes?” La sinjorino, kun ekrideto, direktis sian rigardon al Tingting. Fang tuj sentis ekstremon de la maneto, kiu prenis la ŝian, kaj konsole ekpemis ĝin. Dum ĉi tiu momento, stranga kaj kompreniga sento interligis ŝin kaj Tingting-n, kvazaŭ ili fariĝus aliancanoj por kontraŭbatali ion ŝultron ĉe ŝultra.

Sinjorino Bai, kun mano sur la balustrado, komencis malsupreniri laŭ la ŝtuparo, kun rektigita spino kaj noble eleganta irmaniero. Trance rigrdante al ŝi, Fang trovis tiujn irmanieron kaj vizaĝesprimon tiel konataj—tipa sinteno de riĉa sinjorino. Malsuprenirante, ŝi diris, “Nu, tio estas bona. Lasu Tingting-n gvidi vin. Ŝiaj okuloj jam ne plu direktiĝis al Fang. Rekte rigardante al maljuna You, kiu supreniris, manprenante la kofron, ŝi diris, “Maljuna You, pretigu aŭtomobilon kaj veturigu min al Taibei.”

“Jes,” respondis maljuna You kaj portis la kofron rekte supren.

Prenante Tingting-n je la mano, Fang daŭrigis supreniradon. Ŝi aŭdis sinjorinon Bai klare ordoni, “Yazhu, ne atendu min por vespermanĝo. Mi ne revenos por manĝi.”

Atinginte la supran etaĝon, Tingting revigliĝis. Ŝi ĝoje fingromontris al Fang la ĉambron de la patro, tiun de la patrino kaj la ŝian. Fang trovis la domon delikate desegnita. Sur la supra etaĝo troviĝis eta halo meblita per kompleto da malgrandaj sofoj, florbreto, telefonilo kaj aliaj. Krom la eta halo sidis nur kvar ĉambroj po du ĉe unu flanko unu kontraŭ la alia, kaj koridoro kuŝis inter ili. La balkono cirkloforma ĉirkaŭvolvis la tutan domon. Ŝi divenis, ke ĉiu ĉambro certe havas irejon kondukantan al la balkono. Bai Peiwen kaj lia edzino loĝis en la kontraŭaj ĉambroj, kaj Fang kaj Tingting en aliaj kontraŭaj ĉambroj. La najbara ĉambro de Tingting estis tiu de sinjorino Bai, kaj tiu de Fang estis la ĉambro de sinjoro Bai.

“Kial viaj gepatroj ne loĝas en la sama ĉambro?” demandis Fang.

“Ili konstante loĝas tiamaniere,” nemire respondis Tingting kaj klarigis al Fang, “Via ĉambro estis por gastoj antaŭe. Nun vi loĝas en ĝi, kaj ni ne havas ĉambron por gastoj.”

“Ĉu ofte gastoj venas al via hejmo?”

“Neofte. Nur onklo Gao venas loĝi ĉi tie unu aŭ du fojojn ĉiujare.”

“Onklo Gao?”

“Jes, onklo Gao. Li estas bona amiko de mia patro!” Tingting daŭrigis, “Li funkciiĝas agrokulturejon en la sudo kaj neofte venas. Eĉ se li alvenos, tio ne gravas. Li povos loĝi en malsupra etaĝo.” Tirante ŝin, Tingting tuj enkuris la ĉambron pretigitan por Fang, kaj gaje kriis, “Jen vidu! Ĉu vi ŝatas ĝin, instruistino Fang?”

Trafita de atako de vertiĝo, Fang devis mane apogi sin kontraŭ la muro por ekvilibrigi sin. Kia ĉambro ĝi estas! Ŝi sin lokis en palaco, kiun ŝi dezirus delonge. Kun konfuziteco kaj absorbitateco, ŝi ekzamenis la ĉambron. Sur la planko sterniĝis pure blanka tapiŝo, de fenestro pendis kurteno kun desegnaĵo de orkoloraj floroj sur nigra fono, staris bela dupersona lito kun blanka balustrado, blanka tualettablo kun orkolora rando kaj malgranda blanka skribtablo... Ĉiu estis de miksado de blanka, nigra kaj ora koloroj. Tamen sur la lito sterniĝis brilruĝa kovrilo, kiu mildigis malvarman senton kaŭzitan de blanka kaj nigra koloroj, kaj pliigis varmon al la tuta ĉambro. En la muro troviĝis malgranda bretaro destinita por antikvaj objektoj. En ĝia mezo estis oblonga kadro, en kiu metita estis marmora skulptaĵo—figuroj de greka mito, delikate ĉizitaj kaj vivsimilaj. El ĉi tiuj aĵoj tio, kio plej ekscitis Fang-n, estis la freŝaj flavaj rozoj metitaj en florvazo el nigra marmoro, kiu staris apud tablolampo kun kovrilo el blanka gazo sur blanka littedo kun orkolora rando.

“Ĉu vi ilin ŝatas, instruistino Fang? Ĉu vi ilin ŝatas?” kriante, Tingting senĉese skuis la brakon de Fang.

“Ho, mi ilin ŝatas, vere—ŝatas,” dirante, Fang apogis sin kontraŭ la muro, sentante sin tre laca. Ŝi direktis sian rigardon al la du vitraj fenestropordoj. Ekster la fenestroj vere troviĝis balkono, kiu povis konduki al ajna ĉambro. Sur la balkono metiĝis kelkaj potoj da lekantoj. Estis ĝuste la sezono, en kiu lekantoj komencis flori. Tiuj flavaj floroj pompis en sunlumo. Pluen trans la balkono videblis ondanta montdeklivo kaj parceloj da te-plantejo.

“Instruistino, vi certe ne ŝatas...” diris la knabino senteme.

“Ho, ne, ne, mi ŝatas, vere,” Fang hasteme interrompis ŝin. Altirinte ŝin en la sinon, ŝi mallaŭte demandis, “Diru al mi, Tingting, ĉu la ĉambro estas aranĝita kiel antaŭe.”

“Kompreneble ne,” la knabino ekridetis, “nur tapiŝo ne estas ŝanĝita, kaj aliaj mebloj estas nove anstataŭigitaj. Oni aĉetis ilin en la mebloutiko postulata de mia patro.”

“Kaj tiu skulptaĵo?” Fang demandis, montrante la skulptaĵon el marmoro.

“Ĝi estas nia propra havaĵo. Antaŭe ĝi metiĝis en la ĉambro de mia patro. Li diris, ke li tute ne vidas ĝin, kaj petis min transporti ĝin al via ĉambro.”

“Oho.” La rigardo de Fang falis sur la botelon da rozfloroj, kiu evidente estis

aĉetitaj, ĉar ne troviĝis rozarbetoj en la ĝardeno de Familio Bai. Ŝi aliris al la lito kaj sidigis sur la litrandon, sentante grandan svenemon. La ĉambro saturiĝis per forta aromo de rozfloroj. La varma sunlumo de frua aŭtuno oblikve penetriĝis tra la vitraj fenstropordoj. Floroj, sunlumo kaj la ĉambra etoso ĉiuj estis ebrigiĝaj.

“Ĉu vi kontentiĝas, fraŭlino Fang?” Basa vira voĉo timiĝis Fang-n. Turninte sian kapon, ŝi vidis la maldikan kaj altstaturan figuron de Bai Peiwen oblikve apogantan al la pordkadro kun malfermitaj klapoj. Li senbrue alvenis, kio igis Fang-n supozi, ĉu li jam staris tie dum longa tempo, kaj ĉu li jam aŭdis la dialogon inter Tingting kaj ŝi. Ŝi stariĝis. Kvankam li ne povis vidi, ŝi subkonscie sekvis ĝentilecon. Ŝi diris, “Tio estas iom tro zorgeme aranĝita, sinjoro Bai.”

“Mi ne scias, ĉu oni harmoniĝis kolorojn laŭ mia intenco.”

“La koloroj bone akordiĝas.” Ŝi fikse rigardis al li. Kvankam la blindulo ne povas vidi, li estas sperta pri koloroj. “Mi ne atendis, ke vi estas fakulo en harmonigo de koloroj.”

“Tion mi ellernis,” li diris malrapide, “Mi iam vivis kun fakulo de kolorharmonigo.”

“Ho,” ŝi eĥis. Kaj ŝi balais la internon de la ĉambro per sia rigardo. “Fakte, ne necesas por vi zorgi pri tio,” ŝi diris maltrankvile, “tio vere vekas zorgojn ĉe mi!”

“Kvazaŭaŭtoro devas loĝi en la ĉambro, en kiu la inspiro facile naskiĝas,” li ridete diris.

“Kvazaŭaŭtoro?”

“Vi volas kolekti materialojn por verki, ĉu ne?” Lia rideto fariĝis pli evidenta, sed subite li retiris sian rideton. “Loĝu ĉi tie, fraŭlino Fang!” li diris serioze. “Mi promesas al vi, ke vi povos trovi materialojn por verki, por verki romanon!”

“Ĉu mi diris, ke mi volas kolekti materialojn por verki?” Fang trovis tion kaj amuza kaj ĉagrena. “Mi...”

“Ne diru!” li interrompis ŝin. “Mi pensas, ke mi konas vin.”

Ŝi ŝtoniĝis dum momento. Kiel arbitra li estas! Koni ŝin! Ĉu li vere “konas” ŝin? Eklevinte siajn brovojn, ŝi ne volis disputi kun li. Irite al la mezo de la ĉambro, ŝi malfermis la kofron, kiun maljuna You enportis, por ordigi la enhavon. Akre aŭskultinte ŝiajn movojn, la blindulo diris, “Vi certe esperas ripozi sola, mi pensas. Ni eliru, Tingting!”

“Ho,” ekkriis Tingting, “mi helpu instruistinon Fang ordigi, ĉu bone?” Ŝi turnis sian kapon al Fang. “Mi helpu al vi pendigi la vestaĵojn, ĉu bone?”

“Lasu ŝin resti ĉi tie, sinjoro Bai,” diris Fang, “Mi ŝatas, ke ŝi helpu min ĉi tie kaj iom babilu kun mi.”

“Do, bone, ĝis baldaŭ.” Li ekbalancis la kapon, turnis sin kaj foriris.

Fang elprenis vestarkojn el la murŝranko, kaj post kiam Tingting helpis pendigi

ŝiajn vestojn sur la arkojn, ŝi denove pendigis ilin en la murŝranko. Okupiĝinte pri pendigo, Tingting senĉese parolis, elmetante siajn opiniojn, “Instruistino, vi havas multajn belajn vestojn, kiaj ĉi tiu ruĝa, ĉi tiu flava, ĉi tiu helverda... Kial vi ne surmetis ilin? Vi ĉiam preferas surmeti vestojn nigran, blankan, kafkoloran kaj malhelbluan... Kial?”

“Tiel vestite, mi aspektas kiel instuistino!” Fang diris ridete.

“Se vi lasas viajn harojn pendantaj malsupren, ne surmetas okulvitrojn kaj surmetas ĉi tiun helpurpuran veston, vi certe aspektas okulplaĉe,” diris Tingting, levante purpuran vesperkostumon kun arĝentkolora bordero.

“Ho, knabinaĉo, ĉu vi volas instrui al mi, kiel beligi min!” diris Fang, eksplodinte per rido.

“Tamen, vi surmetis ĝin antaŭe, ĉu ne?”

“Kompreneble.”

“Kial vi ne surmetas nun?”

“Mi nun ne havas ŝancon. Tio estas vesperkostumo, kiun oni surmetas por bankedo, ĉu vi scias?” Fang pendigis la veston en la murŝrankon. Poste, ŝi subite haltis kaj altiris la knabinon, demandante, “Ĉu vi ŝatas belajn vestojn?”

“Jes,” la knabino kapjesis. “Mia patrino havas multajn belajn vestojn.”

“Kaj vi?” demandis Fang. “Mi nur vidas vin en uniformo.”

Mallevinte sian kapon, Tingting piede ludis kun la kvasto de la litkovrilo. “Ĉiutage mi devas sidi en lecionoj kaj ne havas tempon por surmeti belajn vestojn, eĉ se mi havus ilin...” ŝi diris sinĝene kaj mallaŭte.

“Ho,” Fang ekhavis komprenon. Rektiginte sian korpon, ŝi daŭre pendigis la vestojn en la murŝrankon unu post la alia. Kaj samtempe ŝi malpeze diris, “Tingting, helpu min ordigi rapide. Poste, konduku min al via ĉambro por pririgardi, ĉu bone?”

“Bone!” ĝoje diris Tingting.

Pro malmulte da havaĵoj de Fang, ĉio estis tute ordigita nur post mallonga tempo. Sekvante Tingting, Fang alvenis al ŝia ĉambro. Ĝi estis relative granda, kaj zorgeme aranĝita per skarlataj tapiŝo kaj fenestrokurtenoj. La lito, skribtablo kaj libroŝranko estis aranĝitaj tiel bonorde kaj pure, ke Fang surpriziĝis, ĉar ĝi ne aspektas kiel la ĉambro por aliaj knabinoj. En ŝia imago, sur la planko de la ĉambro devus dise metiĝi ludiloj, kiaj pupoj, ursetoj kaj katetoj, aŭ amaso da porinfanaj legaĵoj, kiuj mankis ĉi tie. Ĝi nur estis pura kaj bonorda dormoĉambro.

“Bone, Tingting,” Fang diris ridete, “Montru al mi viajn pupojn.”

“Pu...u...p...ojn,” Tingting diris balbute.

“Jes ja!” Fang ĵetis ameman rigardon al la knabino. “Viajn nigrokulan, malbelan kaj blondabuklan pupojn...”

Tingting paliĝis kaj rideto malaperis ĉe ŝiaj lipoj. Ŝi rigide rigardis al Fang.

“Kiel pri tio?” demandis Fang nekomprene.

La knabino mallevis sian kapon.

“Kio okazas, Tingting?” Fang fariĝis pli perpleksa.

La knabino levis siajn okulojn kaj direktis timeman ekrigardon al Fang. Ŝia vizaĝeto aspektis pli pale kaj ŝia paro da grandaj okuloj plenis je larmeroj. Kun petema mieno, ŝi tremete kaj kompatinde diris, “Vi certe sciiĝas pri tio, instruistino, ĉu?”

“Sciiĝi? Pri kio sciiĝi?” Fang altiris la knabinon al si. Sidiĝinte sur la litrandon, ŝi permane levis ŝian mentonon kaj zorgeme fiksrigardis ŝian timeman vizaĝeton. “Kio okazas do?”

Post kelktempa silento, tiu deiris kaj levis la kapkusenon, el kiu ŝi elprenis umon kaj timeme prezentis ĝin al Fang. En ŝiaj manoj troviĝis krude farita tola pupo kun rompitaĵoj kaj kruroj, eĉ ĝia kapo svinge pendanta nur kun kelkaj fadenoj ligitaj al la kolo. Krome, ĝia vestaĵo estis jam ĉifonita; la vizaĝo farita el blanka katuno nigris simile al la grundo, eĉ la brovoj ne distingeblis.

Ricevinte la tolan pupon, Fang demandis kun miro, “Kio... kio estas tio?”

“Mia pupo,” murmuris la knabino, kiu sentis vundiĝon pro ŝia vizaĝesprimo. “Mi pensas, ke ĝi ne tre okulplaĉa.”

“Sed, sed... kaj viaj aliaj pupoj?”

Tingting tuj levis sian kapon. Kuraĝe kaj decideme direktante sian okulojn al Fang, ŝi unuspire diris, “Mi ne havas aliajn pupojn, sed nur tiun ĉi, kiun mi trovis sur la malantaŭa montdeklivo. Nigraokula, malbela kaj blondabukla... ĉiuj estas ĝiaj nomoj, kaj mi donis al ĝi plurajn nomojn.”

Kun larĝe rondigitaj okuloj, Fang vidis la knabinon repreni la pupon permane kaj vane bonigi ĝian ĉifonitan vestaĵon. Ŝi eĉ ne povis eligi vorton pro stuporo. Kian familion de riĉulo ŝi havas! Kun preme mordetantaj lipoj, ŝi sentis eksciton interne kaj malsekajn okulojn. Kaj ŝia ĉiu nervo konvulsiiis por la knabino. Post longa tempo, ŝi revenis al sia konscio. Karesante ŝiajn harojn, ŝi diris konsole kaj sincere, “Tiu ĉi pupo estas tre aminda, Tingting. Post du tagoj, mi pensas, mi povas alfari novan veston al ĝi.”

“Ĉu vere? Ĉu vi faros tion?” ŝiaj okuloj radiis.

“Jes, mi faros tion,” diris Fang, kies larmoj preskaŭ elkuris el ŝiaj okuloj. Ŝi ne volus pririgardi ŝian vestŝrankon. Ŝi povis imagi al si, kio sin kaŝas en ĝi. Vidinte, ke Tingting bonorde demetis la pupon, ŝi altiris ŝian manon, dirante, “Ni faru ekzercojn vespere anstataŭ posttagmeze hodiaŭ. Nun, ĉu vi volas akompani min promeni ekstere?”

“Bone!” la knabino hurais.

“Do, rapide! Diru tion al via paĉjo antaŭ ol ni iros.”

Tingting fluge forkuris.

Post duonhoro, Fang kaj Tingting sin trovis starantaj antaŭ la ruino de Hanyan Bieno. Fikse rigardante al la rompitaĵoj kaj brikoj, Tingting sopireme diris, “Oni diras, ke mia mortinta panjo ofte hantas ĉi tien.”

“Kio?” demandis Fang. “Kiu diris tion?”

“Ĉiuj diras tion,” Tingting rigardis la malplenan framon de la domo. “Mi esperas, ke mi vidos ŝin. Mi ne timas ŝian reaperanton.”

Fang ekŝtoniĝis. “Ke ne ekzistas reaperantoj, ĉu vi scias?”

“Jes,” la knabino firme diris. “Panjo povos reveni. Mia paĉjo kaj mi atendas ŝian reaperadon.”

“Ĉu iu vidis ŝian reaperanton?” demandis Fang enpenseme.

“Jes. Multaj diras, ke ili vidis. Lastsemajne, iun nokton, Yazhu preteriris ĉi tien. Ŝi ĵuris, ke ŝi vidis virinan ombbron promeni en la malplena ĝardeno, kaj ŝi kure fuĝis al la hejmo pro timo. Se estus mi, mi ne forkurus kaj alproksimiĝus al ŝi por alparoli.”

“Oj, ne faru tian fantazion,” diris Fang maltrankvile. Ŝi plej malamis, ke plenkreskuloj inokulas la pensojn pri fantomoj en geknabojn. “Ni foriru.”

“Ĉu vi timas?” demandis Tingting.

“Mi ne timas!”

“Ne timu mian panjon,” ŝi daŭrigis kun varma rigardo. “Mia panjo estas plej afabla kaj aminda.”

“Jes? Kiel vi sciiĝis pri tio?”

“Paĉjo diris!”

“Oho!” Fang haltis. Ŝi denove ĵetis sian rigardon al la ruino de la kaduka domo sin kaŝanta inter sovaĝaj herbo, vepro kaj rampaĵoj. Ŝi imagis al si la antaŭan sendifektitan domon, kaj kiel vivis ĉi tie la “afabla kaj aminda” mastrino kaj ŝia amema edzo kun paro da brilaj okuloj. Ŝi absorbiĝis en imagado. Apud ŝi la knabineto ankaŭ staris, absorbite imagante al si sian mortintan patrinon.

(daŭrigota)



Fratoj Grimm



Kampanano en la ĉielo

Iam mortis malriĉa pia kampanano kaj staris jam antaŭ la ĉiela pordo. Je la sama tempo ankaŭ tre riĉa viro ĉeestis kaj samtempe celis eniri la ĉielon. Jen venis Sankta Petro kun la ŝlosilo, malfermis la pordon kaj enlasis la riĉulon. Sed la kampananon, kiel ŝajnis, li tute ne vidis kaj tial li remalfermis la pordon. Jen la kampanano de ekstere aŭskultis, kiel oni akceptis la riĉulon plena de ĝojo en la ĉielo, kaj

aŭtoroj, Fratoj Grimm

kiel ili interne kantis kaj faris muzikon. Fine denove fariĝis kviete, kaj Sankta Petro venis, malfermis la pordon de la ĉiela pordo kaj enlasis la kampananon.

Jen la kampanano demandis Sanktan Petron: „Kial oni ne kantis por mi, kiel por la riĉa viro? Ŝajne en la ĉielo okazas ĉio tiel partie kiel surtere.“

Jen respondis Sankta Petro: „Ne, tute ne, vi estas tiel kara al ni kiel ĉiuj aliaj kaj rajtas ĝui la ĉielajn ĝojojn kiel la riĉa viro; sed pripensu, tiaj malriĉaj kampananoj kiaj vi venas ĉiutage en la ĉielon. Sed ne tia riĉa viro, de tiaj venas dum ĉiu jarcento nur unu ĉi tien.“

Fonto: Jakobo kaj Vilhelmo Grimm: Infan-kaj domfabeloj, Eldono lastmana, eldonejo Reclam, „Das Bŭrle im Himmel“

Fidela Johano

Estis iam maljuna reĝo, kiu estis malsana kaj tial li pensis: „Certe, la lito sur kiu mi kuŝas, estas mia mortolito.“ Tial li ordonis: „Venigu la fidelan Johanon.“

La fidela Johano estis lia plej ŝatata servisto, kaj li havis tiun nomon, ĉar li estis tre fidela al la reĝo dum sia tuta vivo. Kiam li venis al la lito, parolis la reĝo al li: „Plej fidela Johano mia, mi sentas, ke mia fino estas proksima, sed min maltrankviligas neniu penso krom tiu pri mia filo. Li estas ankoraŭ tre juna, kaj ne ĉiam scias, kiel konsiliĝi al si mem, kaj se vi ne promesos al mi instrui lin pri ĉio, kion li devos scii kaj ne estos kvazaŭ lia patro, mi ne povos fermi miajn okulojn trankvile.“

La fidela Johano respondis: „Mi ne forlasos lin kaj servos fidele al li, eĉ se tio kostus mian vivon.“

La maljuna reĝo do diris: „Nun mi mortos konsolita kaj en paco.“ Kaj poste li daŭrigis: „Post mia morto montru al li la tutan kastelon, ĉiujn ĉambrojn, salonojn kaj arkaĵojn, kaj ĉiujn trezorojn, kiuj kuŝas en ili. Sed ne montru al li en la longa irejo la lastan ĉambrojn, en kiu estas kaŝita la pentraĵo de la reĝofilino de l' Ora Tegmento. Se li ekvidos la pentraĵon, li eksentos ardantan amon al ŝi kaj svenos, kaj pro ŝi granda danĝero minacos lin; kontraŭ tio lin gardu.“

Kaj kiam la fidela Johano ankoraŭfoje premis manon de la maljuna reĝo, tiu fariĝis kvieta, metis la kapon sur la kusenon kaj mortis.

Kiam la maljuna reĝo estis portita al la tombo, rakontis la fidela Johano al la juna reĝo, kion li promesis al ties patro sur la mortolito: „Tion mi plenumos kaj mi estos fidela al vi tiel, kiel mi estis fidela al li, kaj eĉ se tio kostus mian vivon. Post paso de la funebro la fidela Johano diris al li: „Estas nun la tempo, por ke vi vidu vian heredajon. Mi montros al vi la kastelon de via patro.“

Li kondukis lin ĉien, supren kaj malsupren, kaj vidigis al li ĉiujn riĉaĵojn kaj pompajn ĉambrojn. Nur unu ĉambrojn li ne malfermis, tiun, en kiu staris la danĝera pentraĵo. La pentraĵo estis starigita tiel, ke tiam, kiam la pordo estas malfermita, oni rigardas rekte al ĝi. Ĝi estis tiel belega portreto, ke oni opiniis, ke ĝi estas korpigita kaj vivanta, kaj ke ekzistas nenio pli ĉarma kaj pli bela en la tuta mondo. La juna reĝo kompreneble rimarkis, ke la fidela Johano ĉiam preteriris certan pordon kaj diris: „Kial vi neniam malfermas ĉi tiun?“

„Estas en ĝi io“, li respondis, „kio ektimigos vin.“

Sed la reĝo respondis: „Mi vidis la tutan kastelon, kaj tial mi ankaŭ scivolos, kio estas en tiu ĉambro.“ Forirante li intencis malfermi la pordon perforte. Sed la fidela Johano retenis lin kaj diris: „Mi promesis al via patro antaŭ ties morto, ke vi ne vidos tion, kio staras en la ĉambro. Ĝi povus kaŭzi al vi kaj al mi grandan malfeliĉon.“

„Ho, ne“, respondis la juna reĝo, „se mi ne eniros, tio estos mia certa pereco. Tage kaj nokte mi ne havus pacon, ĝis mi vidus tion per miaj propraj okuloj. Mi nun ne foriros de tiu ĉi loko, ĝis kiam la ĉambro estos malfermita.“

La fidela Johano ekkonis, ke ne eblas rifuzi la deziron kaj elserĉis kun peza koro kaj multe da ĝemado el la granda ŝlosilfasko la ĝustan ŝlosilon. Kaj malferminte la pordon, li unue enpaŝis kaj pensis, ke li kovros la pentraĵon per si mem, por ke la malantaŭa reĝo ne vidu ĝin. Sed vane. La reĝo starigis sin sur la piedfingrojn kaj rigardis trans unu el liaj ŝultroj. Kiam li ekvidis la portreton de la virgulino, kiu estis tiel belega kaj kvazaŭ brilis pro oro kaj juveloj, li sveninte falis sur la plankon. La fidela Johano levis lin, portis lin al lia lito kaj pensis plena de timo: „La malfeliĉo okazis, Dio mia, kio fariĝos el tio?!“

Poste li fortigis lin per vino ĝis la juna reĝo rekonsciiĝis. La unua frazo, kiun li parolis, estis: „Aĥ! Kies portreto estas la bela pentraĵo?“

„Tio estas la reĝa filino de l' Ora Tegmento“, respondis la fidela Johano.

La reĝo daŭrigis: „Mia amo al ŝi estas tiel grandega, ke tiukaze, se ĉiuj folioj sur la arboj estus langoj, ili ne povus esprimi tion, mian vivon mi donos por konkeri ŝin. Vi estas mia plej fidela servisto, Johano, vi devos subteni min.“

La fidela servisto longe cerbumis kiel komenci la aferon, ĉar estis tre malfacile eĉ nur ekstarti vidalvide kun la reĝa filino. Fine li elpensis rimedon kaj diris al la reĝo: „Ĉio, kion ŝi havas ĉirkaŭ si estas el oro, tabloj, seĝoj, pelvo, pokaloj kaj pladoj kaj la doma ilaro. En via trezorejo kuŝas kvin bareloj el oro, ordonu al la regnaj orajistoj fari el barelo diversspecajn vazojn kaj ilarojn, diversajn birdojn, ĉasbestojn kaj aliajn mirindajn bestojn. Tio plaĉos al ŝi, ni veturu kun tiaj aĵoj al ŝi kaj provu nian feliĉon.“ La reĝo ordonis kunvoki ĉiujn orajistojn, ili devis tage kaj nokte labori, ĝis kiam fine ĉiuj ĉi belegaĵoj estis pretaj. Kiam ĉio estis ŝarĝita sur ŝipon, la fidela Johano surmetis komercistajn vestojn, kaj la reĝo devis fari la samon por fari sin tute nerekebla. Poste ili estis veturigataj tiom longe trans la maron, ĝis kiam ili alvenis en la urbon, kie loĝis la reĝa filino de l' Ora Tegmento.

La fidela Johano diris, ke la reĝo postrestu sur la ŝipo kaj atendu lin.

„Eble“, li diris, „mi kunprenos la reĝan filinon. Tial kontrolu, ke ĉio estu en ordo, starigu la orajn aĵojn kaj ornamu la tutan ŝipon.“

Poste li kunkolektis en sia antaŭtuketo diversajn orajn aĵojn, elŝipiĝis kaj iris rekte al la reĝa kastelo. Kiam li venis en la kastelan korton, staris tie ĉe la puto bela knabino kun du oraj siteloj ĉemane kaj ĉerpis per ili akvon. Kaj kiam ŝi intencis forporti la brilan akvon kaj turniĝis, ŝi ekvidis la fremdan viron kaj demandis, kiu li estas. Li respondis: „Mi estas komercisto,“ kaj li malvolvis sian antaŭtuketon kaj lasis enrigardi ŝin.

Ŝi ekkriis: „Hehe, kiaj belaj oraĵoj!“ Ŝi demetis la sitelojn kaj rigardis la aĵojn laŭvice. Ŝi diris: „Tion devos vidi la reĝa filino, ŝi tiom ĝojas pri oraĵoj, ke ŝi foraĉetos ĉion de vi.“

Ŝi prenis lin ĉemane kaj kondukis lin supren, ĉar ŝi estis la ĉambristino. Kiam la reĝidino vidis la varojn, ŝi estis ravita kaj diris: „Ili estas tiel bele prilaboritaj, mi aĉetos ĉion ĉi.“

Sed la fidela Johano diris: „Mi estas nur la servisto de riĉa komercisto. Tio, kion mi havas ĉi tie, estas fakte nenio kompare al tio, kion havas mia mastro sur sia ŝipo. Tie estas la plej artoplena kaj ĝuinda, kio iam ajn estis kreita el oro.“

Ŝi volis, ke oni portu ĉion hejmen al ŝi, sed li diris: „Por tio necesus multaj tagoj, tiom granda estas la kvantego, kaj tiom da salonoj necesus por prezenti ĝin, ke via domo ne havus sufiĉe da loko.“

Tial ŝiaj scivolo kaj emo estis pli kaj pli incititaj, tiel, ke ŝi fine diris: „Konduku min al la ŝipo, mi volas mem iri tien kaj rigardi la trezorojn de via mastro.“

La fidela Johano kondukis ŝin kun ĝojo al la ŝipo; kaj la reĝo, kiam li ekvidis ŝin, rimarkis, ke ŝia belo estas eĉ pli granda ol la portreto prezentas ŝin kaj li supozis eĉ, ke lia frapanta koro tuj krevos. Nun ŝi grimpis sur la ŝipon kaj la reĝo kondukis ŝin internen. Sed la fidela Johano postrestis ĉe la stiristo kaj depuŝigis la ŝipon, ordonante: „Hisu ĉiujn velojn, por ke la ŝipo flugu kiel birdo en la aero.“

La reĝo montris al ŝi interne la oraĵojn, ĉiun unuope, la pladojn, pokalojn, kaj pelvojn, la birdojn, la ĉasbestojn kaj la aliajn mirindajn bestojn. Multaj horoj pasis, dum ŝi rigardis ĉion, kaj pro sia ĝojo ŝi ne rimarkis, ke la ŝipo estas veturigata en la akvo. Rigardinte la lastan objekton, ŝi dankis al la komercisto kaj intencis iri hejmen. Sed atinginte la ŝiporandon, ŝi vidis, ke la ŝipo veturas malproksime de la firma tero en la vasta maro kaj forrapidas kun ĉiuj streĉitaj veloj.

„Ah“, ŝi ekkriis timigite, „mi estas trompita, mi estas forrabita kaj elmetita al la potenco de komercisto; prefere mi volus morti!“

Sed la reĝo manprenis ŝin kaj diris: „Komercisto mi ne estas, mi estas reĝo, kaj ne malpi altranga ol vi mem; sed, ke mi forrabis vin per ruzaĵo, tio okazis nur pro tro da amo. La unuan fojon, kiam mi vidis vian portreton, mi svenis kaj falis planken.“

Aŭdinte tion, la reĝidino de l' Ora Tegmento estis konsolita, kaj ŝia koro eksentis amon, tiel, ke ŝi volonte pretis fariĝi lia edzino.

Jen okazis, dum ili veturis sur la maro, ke la fidela Johano sidis antaŭe sur la ŝipo kaj ludis muzikilon. Jen li ekvidis antaŭ si tri korvojn, kiuj proksimiĝis flugante. Tial li ĉesis ludi kaj aŭskultis, kion ili interparolas, ĉar li bone komprenis ilin. Unu el ili vokis: „Ha, li kondukas hejmen la reĝidino de l' Ora Tegmento.“

„Jes“, diris la dua korvo, „sed ankoraŭ li ne havas ŝin.“

Jen parolis la tria korvo: „Li tamen havas ŝin, ŝi sidas ĉe li en la ŝipo.“

Jen la unua rekomencis paroli: „Kiel tio helpu al li?! Kiam ili surteriĝos, alsaltos vulpe ruĝa ĉevalo; tiumomente li provos surĉevaliĝi, kaj se li faros tion, la ĉevalo forgalopos kun li kaj poste en la aeron, kaj li neniam plu revidos sian virgulinon.“

Jen demandis la dua korvo: „Ĉu eblas neniu savo?“

Alia korvo respondis: „Ho, jes, se alia rapide surĉevaliĝos kaj elprenos de la kolbrido la pafilon kaj pafmortigos la ĉevalon per ĝi, tiukaze la juna reĝo estos savita. Sed kiu povus scii tion?! Kaj tiu, kiu scias kaj diros tion al li, fariĝos ŝtono de la finaĵoj de la piedfingroj ĝis la genuoj.“

Jen reparolis la dua korvo: „Mi scias eĉ pli, eĉ se la ĉevalo estus mortigita, la juna reĝo tamen ne plu havos sian fianĉinon. Kiam ili iros kune en la kastelon, tie kuŝos brodita fianĉoĉemizo sur plado, kaj ĝi aspektos kvazaŭ ĝi estus teksita el oro kaj

arĝento, sed ĝi estos nenio alia krom sulfuro kaj peĉo. Se la reĝo surmetos ĝin, ĝi forbruligos lin ĝis la osta medolo.“

Jen demandis la tria korvo: „Ĉu tute ne eblas savo?“

„Ho, jes“, respondis la dua korvo, „se iu prenus la ĉemizon per gantoj kaj ĵetos ĝin en la fajron, tiukaze la juna reĝo estos savita. Sed kiel tio helpu?! Tiu, kiu scias tion kaj diros tion al la reĝo, fariĝos ŝtono de la genuoj ĝis la koro.“

Jen parolis la tria: „Mi scias eĉ pli, eĉ se la fianĉoĉemizo forbrulos, la juna reĝo tamen ankoraŭ ne havos sian fianĉinon; kiam post la nupto komenciĝos la danco kaj la juna reĝino dancos, ŝi subite paliĝos kaj falos, kvazaŭ ŝi estus morta. Kaj, se iu ne levos ŝin, ne suĉos el ŝia dekstra mammo tri gutojn da sango, kaj ne elkraĉos ilin tuj, ŝi mortos. Sed, se tiu, kiu scias tion, ĝin malkaŝos, lia tuta korpo ŝtoniĝos de la kapo ĝis la piedfingraj finaĵoj.“

Kiam la korvoj finis tiun interparoladon, ili forflugis, kaj la fidela Johano komprenis ĉion ĉi bone. Sed ekde tiu tempo li estis kvieta kaj malgaja; ĉar tiukaze, se li silentos pri tio, kion li aŭskultis, la reĝo estos malfeliĉa. Se li malkaŝos ĉion, li mem devos doni sian vivon. Sed fine li diris al si mem: „Mian mastron mi savos, eĉ se mi mem devos pere!“

Kiam ili elŝipiĝis kaj staris jam sur firma tero, okazis tio, kion antaŭdiris la korvoj. Algalopis majesta vulpe ruĝa ĉevalo.

„Ek do“, diris la reĝo, „ĝi portu min al la kastelo“, kaj li volis surĉevaliĝi, sed la fidela Johano estis pli rapida, li svingiĝis rapide sur la ĉevalon, eltiris la pafilon de la kolbrido kaj pafmortigis la ĉevalon.

La aliaj servistoj de la reĝo, kiuj ja ne rilatis bone al la fidela Johano, ekkriis: „Kia abomenaĵo, mortigi tiun belan beston, kiu estis portonta la reĝon en la kastelon!“

Sed la reĝo diris: „Silentu, kaj lasu lin en paco, li estas mia tre fidela Johano, kiu sciu, por kio tio taŭgis?!“



Poste ili iris en la kastelon kaj tie staris en la halo plado kun la brodita fianĉoĉemizo en ĝi, kaj ĝi aspektis tiel, kvazaŭ ĝi estus el oro kaj arĝento. La juna reĝo paŝis al ĝi kaj volis manpreni ĝin. Sed la fidela Johano forŝovis lin, kaptis ĝin per gantoj, portis ĝin rapide al la fajro kaj forbruligis la ĉemizon. La aliaj servistoj denove komencis grumble murmuri kaj diris: „Rigardu, nun li forbruligis eĉ la fianĉoĉemizon de la reĝo.“

Sed la juna reĝo diris: „Kiu scias, por kio tio taŭgis, lasu lin en paco, li estas mia plej fidela

servisto, Johano.“

Poste oni festis la geedziĝon. Oni komencis danci kaj ankaŭ la fianĉino enpaŝis; la fidela Johano observis ŝin kaj rigardis al ŝia vizaĝo; sed subite ŝi paliĝis kaj falis planken, kvazaŭ ŝi estus morta. La fidela Johano saltis rapide al ŝi, levis ŝin kaj portis la reĝidinon en ĉambron, tie li kuŝigis ŝin, surgenuiĝis kaj suĉis tri gutojn da sango el ŝia dekstra mammo kaj elkraĉis ilin. Baldaŭ ŝi denove ekspiris kaj rekaptis fortojn. Sed la juna reĝo observis ĉion tion, kaj li ne komprenis, kial la fidela Johano faris tion. Li koleriĝis pri tio kaj kriis: „Enkarcerigu lin!“

Je la sekva mateno oni kondamnis la fidelan Johanon kaj kondukis lin al la pendumilo, kaj kiam li staris supre kaj estis ekzekutota, li diris: „Ĉiu, kiu estas kondamnita al la morto, rajtas ankoraŭfoje paroli antaŭ sia fino, ĉu ankaŭ mi havos la rajton?“

„Jes“, respondis la reĝo: „Ĝi estu cedita al vi.“

Jen diris la fidela Johano: „Oni kondamnis min maljuste, mi ĉiam estis fidela al vi“, kaj li rakontis poste, ke li aŭskultis sur la maro la interparoladon de la korvoj, kaj ke li devis fari ĉion ĉi por savi sian mastron.

Jen la reĝo vokis: „Ho, plej fidela Johano, pardonon al vi, pardonon! Konduku lin malsupren.“

Sed la fidela Johano, post la lastaj vortoj, kiujn li diris, senvive falis sur la plankon kaj estis el ŝtono.

La gereĝoj tre suferis pri tio, kaj la reĝo parolis: „Ah, kiel fie mi rekompencis la grandan fidelecon!“

Li ordonis levi la ŝtonan figuron kaj starigi en sia dormoĉambro apud la lito. Ĉiufoje, kiam li rigardis ĝin, li ekploris kaj diris: „Ah, se mi povus revivigi vin, tre fidela Johano mia!“

Kiam pasis certa tempo, naskis la reĝino du filajn ĝemelojn. Tiuj kreskis pli kaj pli kaj ĝojigis ilin. Foje, kiam la reĝino estis en la preĝejo, kaj la du infanoj sidis ĉe la patro kaj ludis, li denove rigardis la ŝtonan figuron plena de malĝojo, ĝemis kaj diris laŭte: „Ah, se mi povus revivigi vin, tre fidela Johano mia!“

Jen la ŝtonfiguro komencis paroli: „Jes, vi povus revivigi min, se vi donos vian plej karan por tio.“

Jen kriis la reĝo: „Ĉion, kion mi posedas en la mondo, mi donos por vi.“

Jen la ŝtonfiguro daŭrigis: „Se vi propramane forhakos la kapojn de viaj infanoj kaj priŝmiras min per ilia sango, mi ricevos mian vivon.“

La reĝo ektimis, kiam li aŭskultis, ke li mem mortigu siajn karajn infanojn. Sed memorante pri la granda fideleco de la fidela Johano, kaj ke li mortis por li, li eltiris la glavon kaj propramane forhakis la kapojn de siaj infanoj. Kaj, kiam li jam priŝmiris la ŝtonon per la sango de la infanoj, revenis la vivo de la fidela Johano kaj

li staris freŝa kaj sana antaŭ li. Li diris al la reĝo: „Via fideleco ne estu sen rekompenco.“ Li prenis la kapojn de la infanoj, almetis ilin kaj priŝmiris la vundon per ilia sango, kaj tial ili tuj reviviĝis. Ili saltis kaj ludis plu kvazaŭ nenio okazis al ili. Jen la reĝo estis plena de ĝojo, kaj kiam li vidis reveni la reĝinon, li kaŝis la fidelan Johanon kaj la du infanojn en grandan ŝrankon. Kiam ŝi enpaŝis, li diris al ŝi: „Ĉu vi preĝis en la preĝejo?“

„Jes“, ŝi respondis, „sed mi pensis senĉese pri la fidela Johano, ĉar li fariĝis tiel malfeliĉa pro ni.“

Jen la reĝo diris: „Kara edzino, ni povos redoni la vivon al li, sed ĝi kostos al ni niajn du filojn. Tiujn ni devos oferi.“

La reĝino paliĝis kaj kore terurigiĝis, sed tamen ŝi diris: „Ni ŝuldas tion al li, pro lia granda fideleco.“

Tial la reĝo ĝojis, ke ŝi pensas kiel li, li foriris, malfermis la ŝrankon, eltiris la infanojn kaj la fidelan Johanon kaj diris: „Danke al Dio li estas elaçetita, kaj ni rehavas ankaŭ niajn infanojn.“ Kaj li rakontis al ŝi, kiel ĉio okazis. Kaj de tiu tempo ili vivis kune beataj ĝis la fino.

Originalo: Der treue Johannes

Fonto: Jakobo kaj Vilhelmo Grimm: Infan-kaj domfabeloj, Eldono lastmana, eldonejo Reclam, „Der treue Johannes“

kontrolis Vladimir Türk



elgermanigis Dorothea kaj Hans-Georg Kaiser (Germanio)

Anonimulo

Mortigaj dancĉuoj

Kang Long reverkis laŭ la reta rakonto

La kampuso de Universitato K dronas en trista krepuska nebulo de la profunda aŭtuno. En malvarmeta vento la falintaj folioj kaj velkintaj herboj elspiras putrintan odoron. La restanta brilo de la subiranta suno disverŝas malhelan oranĝruĝan radiojn, kiuj vekas rememorigan ĉagrenon ĉe la altlernejo kun kelkdek jaroj da historio.

Feng Wei (*vej*), kiu komencis studi en tiu ĉi lernejo antaŭ nelonge, sentas freŝecon de ĉio ĉirkaŭ si. Nur hodiaŭ ŝi unuafoje versence pririgardas la lernejon, kvankam ŝi jam sin trovas ĉi tie du aŭ tri monatojn. Promenante sur pado la dekok-jara studentino enspiras la plezuran kaj freŝan aeron kaj ĝuas la etoson de la kampuso, pri kiu ŝi songiĝis de pluraj jaroj. Subite ŝin kaptis sento aliformiĝi al nova memo.

Irinte suden, ŝi atingis la aŭlon situantan en la sudokcidenta parto de la universitato. Ĝi havas la same longan historion kiel la universitato, kaj siatempe prezentis belan eksteron, sed nun ĝi, kiel kaduka maljunulino, tremetis en la aŭtuna vento.

Cirkulas onidiro, ke fajrego okazis al la aŭlo antaŭ pli ol dudek jaroj kaj brulmortigis Shen Monian (*ŝen mo-njan*), la faman belulinon de la kampuso. Laŭdire ŝi estis ĉefdancistino de la Danca Rondo de la lernejo. Ĉiufoje kiam prezentiĝis la baletto *Cignolago*, ŝi sendisputeble rolis la principinon Odette.

Feng Wei ne tre konis baleton. Iafoje kiam ŝi helpis ordigi arĥivojn de la universitato, ŝi senintence vidis la siatempnan foton de Shen Monian en danca prezentado. Shen estis sufoke bela knabino, gracia kaj vigloplena, kaj ŝia dancaj movoj tre impresis Feng-n kaj ofte aperadis en ties menso. Feng nerimarkite kaŝis tiun foton kaj poste enŝovis ĝin en sian albumon.

Proksime al la aŭlo je dekkelkaj paŝoj Feng Wei vidis panelon starantan ĉe la pado, sur kiu skribiĝis “Ne licas eniri por studentoj” en ruĝa farbo sur blanka fono. Ŝi ekhezitis antaŭ tiuj nekompreneblaj vortoj. Sed pro proksimeco de la aŭlo ŝi daŭre antaŭeniris sub la impulso de scivolemo.

Sur la kaduka pordo de la aŭlo pendis rusta seruro kaj ĝiaj fenestroj sur la ĉirkaŭaj muroj oscedis sombre, ŝajne ŝmiritaj per nigra lako. Ŝi ĉirkaŭiris la aŭlon por pririgardi ĝian internon, sed je ŝia desaponto troviĝis nenia fendo, tra kiu ŝi povis rigardi internen.

“Kion vi faras ĉi tie? Ĉu vi ne vidis tiujn avertajn vortojn sur la panelo?” aŭdiĝis raŭka voĉo malantaŭ ŝi. Surprizite, ŝi tuj sin turnis. Antaŭ ŝi staris kaduka maljunulo

kun vangharoj.

“Mi...mi nur laŭvole promenis ĉi tien.”

Rigardante la groteskan maljunulon oni ne sciis de kie li sin trudis, ŝi ne sciis portempe, kion decan ŝi devas diri. Ŝi nur sentis en lia timiga rigardo ion nekompreneblan por la junuloj kia ŝi.

“Kia estas via nomo?” La momenton, kiam la maljunulo vidis ŝin, li montris iom surprizitan mienon kaj fiksas sian rigardon sur ŝian vizaĝon dum dekkelkaj sekundoj.

“Feng...Feng Wei.”

“Estas pli bone, ke vi ne plu venu ĉi tien.”

“Vi...vi estas...” ŝi murmure demandis, rigardante lian oldan kaj iom rigidan vizaĝon.

“Ĝardenisto.” Li deŝiris sian rigardon de ŝia vizaĝo kaj fingromontris la sudokcidentan angulon, dirante, “Mi zorgas pri tiuj floroj kaj herboj tie kaj tenas la aŭlon sub mian superrigardon.”

“Ĉu vi jam laboras ĉi tie multajn jarojn?” Kvankam la maljunulo ŝajne montris sin ne tiom amikeca, ŝi nereteneble demandis, “Ĉu vi konas Shen Monian, la knabino-dancistino, kiu mortis an ĉi tiu aŭlo pro tiujara incendio?”

“Mi ne konas ŝin.” Lia korpo skuiĝis kaj lia mieno fariĝis minaca. “Baldaŭ noktigos. Reiru plibone al via amasloĝejo.” Post tio li lame direktis sin al la brikdometo ĉe la sudokcidenta murangulo.

“Kien vi iris, Feng Wei?” demandis He Juan (*ĝjan*) al ŝi, kiu ĵus eniris en la dormoĉambbron. “Ĵus mankis al ni kunludanto de kartoj. Ni serĉis vin longan tempon.”

“Ha, jes. Estas nokto. Vi eble rendezuis belaspektan junulon, ĉu ne?” brue kriis Mao Qian (*maŭ ĉjan*) kaj Zhang Ying (*ĝang ĵing*), ŝiaj du kunĉambranoj.

“Mi iris al tiu aŭlo,” Feng Wei ekrigardis siajn kunĉambranojn, “kie Shen Monian mortis en fajrego tiun jaron.”

“Vi ja havas grandan kuraĝon.” He Juan surpriziĝis kaj diris mistere, “Ĉu vi scias, ke laŭdire tiu estas hantata aŭlo?”

“Neeble, ĉu?” Mao Qian ekkovris sian buŝon per mano.

“Certe kredebla.” He Juan montris misterplenan mienon. Englutinte salivon, ŝi daŭrigis, “Laŭ diro de veterana studento, ekde post ŝia brulmortigo ĉiun duan jaron studentino mortis en tiu aŭlo, kaj ĉiu mortintino kunportis paron da blankaj baletŝuoj.”

“Ĉu vere? Neniel semu onidiron, alie nia juna animo strangoliĝos pro viaj timigaj vortoj.”

Aŭdinte tiujn vortojn, Mao Qian terure paliĝis.

“Kredu aŭ ne laŭ via plaĉo”, diris He Juan, ekrigardinte Mao Qian. “Oni diras, ke ĉe ĉiu noktomezo aŭdiĝas el la aŭlo simfonia muziko de Ĉajkovskij kaj junulino

flirte dancas laŭ la muziko. Antaŭ tri jaroj studentino nomata Wu (vu) Fang mortis tie. Kiam oni trovis ŝin, ŝi surhavis paron da blankaj baletŝuoj sur la piedoj. Ĉi-jaro estas ĝuste la tria jaro...” Ĉe tio He Juan subite ĉesis paroli.

“Ĉu vi volas diri, ke iu mortos en la aŭlo?” Mao Qian ektemis.

“La fajrego okazis en la jaro 1982. Ekde la morto de Shen Monian jam ok studentinoj mortis tie unu post alia.” He Juan daŭrigis, “Unu studentino ĉiun duan jaron kaj ok mortoj faras dudek kvar jarojn. Ĉi-jare estas 2009-a jaro. Ĉu vi kredas, ke iu alia mortos tie?”

“Sed kun tiel bela vizaĝo Shen Monian ne ŝajnas mortigisto!” Feng Wei elprenis la albumon el sub la kapkuseno kaj malfermis ĝin. “Jen vidu. Ĉu ŝi estas tiom bela?”

“De kie vi akiris tiun foton?”

He Juan deprenis la albumon. Mao Qian kaj Zhang Ying alprenis sian kapon por rigardi.

“Lastfoje kiam mi helpis ordigi malnovajn arĥivojn, mi vidis tiun foton kaj kaŝe forprenis ĝin.”

“Estas pli bone, ke vi redonu aŭ forĵetu ĝin,” diris He Juan seriozmiene, “Mi opinias, ke tiu foto alportos malfeliĉon al vi.”

“Mi trovas tion nenio,” diris Zhang Ying. “Ĝi nur estas foto, kaj plie en nuna moderna tempo ne estu tiel superstiĉa.”

Depreninte la albumon, Mao Qian fingromontris apudan foton kaj diris, “Feng Wei, eble ĝi estis la kunfotigo de viaj familianoj, ĉu ne?”

“Ho, jes,” Feng Wei respondis, ĵetinte ekrigardon al ĝi. “Ĝi estis farita antaŭ ol mi eklernis en la universitato.”

“Vi vere similas vian patrinojn,” diris Zhang Ying, rigardante la foton. “Oni ofte diras, ke filino similas sian patron. Ŝajnas, ke tio ne tute estas vera.”

“Kion mi faru pri ĉi tiu foto.” Feng Wei eltiris la foton de Shen Monian el la albumo kaj fikse rigardis ĝin. “He Juan, via diro lasas min heziti, kion mi devas fari.”

“Se vi konsideras, ke ĝi alportos al vi malfeliĉon, donacu ĝin al mi.” Zhang Ying etendis sian manon.

Feng Wei urĝeme firme ektenis la foton en la mano. Ekrigardinte Zhang Ying, ŝi diris, “Do, mi... mi mem ĝin tenu.”

Noktomeze. La kampuso troviĝis en tomba silento. Malhelaj lunradioj triste kuŝis sur la pado. Vento vipadis arbobrandaĵojn, eligante strangajn sonojn. Flave velkintaj folioj flirtis en vento kiel vespertoj en malluma nokto. Aperis maldike svelta figuro ĉe proksimeco de la aŭlo.

Tenantante en mano la foton de Shen Monian kaj ĵetinte rigardon al la averton de malklaraj vortoj sur la panelo, Feng Wei malrapide iris al la aŭlo.

La pordo de la aŭlo estis duonmalfermita kaj svage aŭdiĝis gaja muziko el la

aŭlo. Profunde enspirinte, ŝi enpaŝis kun korpo flanko antaŭen.

En malhela lamplumo sur la scenejo malklare vidiĝis knabino kun blanka baletjupeto dancanta laŭ la muziko. Ŝiaj graciaj kaj facilaj movoj forte allogis Feng Wei kaj tiu senkonscie lante iris al la scenejo. Kiam ŝi aliris al la unua vico de sidlokoj, ŝi vidis la dancantan knabinon kun paro da blankaj baletŝuoj sur la piedoj.

“Shen Monian!” Kun misbato de la koro ŝi tuj elprenis la foton por kompari kun ŝi. Jes, la dancanta knabino sur la scenejo ja estas Shen Monian laŭ onidiro.

Feng Wei timeme sidiĝis sur sidlokon. Tiam ŝi subite trovis, ke alia persono sidas proksime je du sidlokoj de ŝi. Ŝi direktis zorgeman rigardon al li kaj fine ŝi rekonis en li la ĝardeniston, kiun ŝi renkontis la antaŭan fojon.

Muziko daŭris kaj la dancantino ankoraŭ gaje tordis sian korpon. Tiam Feng Wei aŭdis sonojn de veado kaj ĝemado. Turninte flanken sian kapon, ŝi vidis, ke la vizaĝo de la maljuna ĝardenisto plenas je larmo kaj la larmperloj sur liaj vangoharoj brilas sub la malhela lamplumo.

Kiam Feng Wei direktis sian rigardon al la scenejo, ŝi surprizite trovis, ke aperas alia homfiguro sur la scenejo. En malhela lumo ŝi povis malfacile distingi, ke tio estas alia knabino.

“Zhenping (*ĝenping*), alportu la baletŝuojn. Ŝi volas danci kiel rolulo de nigra cigno,” diris Shen Monian al la maljunulo sidanta sube de la scenejo.

La maljunulo stariĝis, ĉirkaŭiris al la scenejo kaj metis paron da blankaj baletŝuoj sur la randon de la scenejo.

Shen Monian levis la ŝuojn kaj donis ilin al la knabino, dirante, “Surportu ilin kaj ni dancu kune.”

“Sed, sed mi ne scipovas danci.” Aŭdiĝis iom timema voĉo de la knabino.

“Ne gravas. Sekvu miajn dancajn movojn.” Shen Monian facile piruetis.

Denove muziko aŭdiĝis kaj la du knabinoj ekis danci. Ĝuste kiam Feng Wei perpleksiĝis pri ĉio sur la scenejo, la lamplumo subite estingiĝis kaj la tuta aŭlo falis en mallumon.

Silento, morta silento regis. Feng Wei trovis la silenton bizara. Eĉ la dancantinoj kaj la maljunulo nemalproksima de ŝi ne reagis al la subita okazaĵo. Tre nekredeble.

sur la scenejo kaj ŝiaj mizerplenaj krioj glave pikis la koron de Feng Wei. La ĉirkaŭa mallumo jetis ŝin en timegon. Diskrete ŝi stariĝis el la sidloko kaj penis palpe iri elen. Ĝuste tiun momenton subite leviĝis maso da blindige brila fajro sur la scenejo kaj flamoj elŝpruciĝis sur la korpo de la knabino, kiu rolis nigran cignon. Ŝi senĉese baraktis kuŝante laŭlonge.

“Savu min, Feng Wei!” La knabino etendis manon al Feng Wei, baraktante.

“Aĥ!” Pro timego Feng Wei fale sidiĝis sur la teron. La voĉo estis tiel konata al ŝi, ke ŝi tuj paliĝis.

“Kiel mi povus savi vin, Zhang Ying!” klamis al ŝi Feng Wei, plorante. Tiumomente ŝi jam estis tiel terurita, ke ŝia animo kvazaŭ forkuris el la korpo, ne sciante, kion fari.

“Savu min, Feng Wei!” ankoraŭfoje klamis Zhang Ying al Feng Wei, ŝancele kurante de la scenejo.

“Ne... ne aliru!” Apogante sian korpon per ambaŭ manoj sur la tero, Feng Wei penis movi sian korpon malantaŭen. Sed kiel ajn ŝi kriis, Zhang Ying stumble kuris al ŝi.

“Ne!” Kun ŝrika krio Feng Wei abrupte leviĝis al la sida pozo en la lito, ŝvitoplene tra la korpo, sentante, ke ŝia koro saltus en la gorĝon.

Sidante en la lito ŝi anheladis por moderigi sian ondantan senton. Tamen tiu sceno en ŝia sonĝo ĉiam persistis en ŝia menso.

Feng Wei elprenis poŝtelefonilon kaj vidis, ke ĝia ekrano montras dek kvin minutojn post la unua meznokte. Ŝi aŭtomate direktis sian rigardon al la lito de Zhang Ying. Ties lito estis vaka kaj ŝi troviĝis nenie. Pro tio ŝia koro des pli forte batis.

“Vekiĝu, vi ĉiuj vekiĝu!” Feng Wei ŝaltis la lampon de la ĉambro kaj vekis He Juan kaj Mao Qian el dormo.

“Kion vi faras en tiel profunda nokto, Feng Wei?” dirante, He Juan frotadis siajn okulojn kolereme.

“Zhang Ying malaperis,” diris Feng Wei timplene. “Nun estas iom post la unua noktomeze. Kien ŝi povus iri?”

“Ĉu vere?” Ĵetinte rigardon al la lito de Zhang Ying, He Juan diris post iom da pensado, “Eble ŝi iris al necesejo. Ne faru tian bruon. Iru al necesejo kaj pririgardu. Mi certas, ke ŝi estas tie.”

“Do mi iru tien pririgardi.” Feng Wei ekrigardis al Mao Qian kaj tiu skuis la kapon kun la kolo retirita.

“Nu, mi sola iru.” Viŝinte la ŝviton sur la vizaĝo per mantuko, Feng Wei eliris.

La necesejo situis ĉe la okcidenta fino de la longa koridoro mallklare lumigita. Kun forte batanta koro ŝi iris tra la malhela koridoro, kiel panikita leporo, al la necesejo.

Post kiam ŝi zorgeme pririgardis en la necesejo, ŝi falis en pli grandan timegon.

“Zhang Ying ne troviĝas en la necesejo,” diris timoplene Feng Wei, enirinte la dormoĉambron.

“Kien ŝi povus iri?” He Juan kuntiris siajn brovojn. “En profunda nokto mi timas ke ŝi povus...” dirinte tion, ŝi donis subkomprenan ekrigardon al siaj du kunloĝantoj.

Vidinte ŝian mienon, Feng Wei ŝajne ekpensis pri io kaj rapide iris al sia lito.

“La foto de Shen Monian malaperis!” Fingromontrante vakan lokon en la albumo, Feng Wei streĉite rigardis al He Juan kaj Mao Qian.

“Serĉu plu.” Malsuprenirinte el la lito, He Juan deprenis la albumon kaj foliumante, ne trovis tiun foton.

“Certe ŝi iras al la aŭlo, kunportante la foton.”

Tiuj vortoj de Mao Qian kvazaŭ ĵetis bombon en la ĉambro. Feng Wei kaj He Juan tuj ŝtoniĝis.

“Ni devas iri serĉi ŝin,” decideme diris Feng Wei al He Juan kaj Mao Qian. “Mi ne zorgas, ĉu la onidiro estas vera aŭ ne. Almenaŭ tio, ke Zhang Ying kaj la foto malaperis, estas neniel normala. Se io neatendita okazus al ŝi, tio vere min ĝenus.”

“Bone, mi iru kun vi.” Post heziteto He Juan kapjesis.

Feng Wei direktis sian rigardon al Mao Qian. “Kaj vi?”

“Mi...” Kun paniko sur la vizaĝo Mao Qian vagigis sian rigardon sur la vizaĝojn de Feng kaj He.

“Do, vi restu ĉi tie,” simple diris Feng Wei, legante timon en ŝia koro. “Mi kaj He Juan iros serĉi Zhang Ying. Telefonu nin, se io okazos ĉe vi eventuale...”

Kapjesante, Mao Qian montris mienon de malstreĉiteco.

Ĵetinte straban rigardon al ŝi, He Juan diris, “Ĉu vi vere ne iros? Kia malkuraĝulo! Estas pli bone, ke vi iru kune kun ni. Se vi sola restos en la dormoĉambro, kiam Shen Monian vere enirus, kiel vi reagus kontraŭ ŝi?”

“Ho, vi... He Juan.” Mao paliĝis pro timigo kaj larvoj ruliĝis en ŝiaj okuloj.

“Ne timigu ŝin, He Juan.” Surmetinte veston, Feng Wei elprenis poŝlampeton el tirkesto kaj diris, “Ni rapidu. Mi esperas, ke nenio okazis al Zhang Ying.”

“Momenton. Mi iru kune kun vi.” Apenaŭ Feng Wei kaj He Juan eliris, Mao Qian diris malantaŭ ili, “Mi...mi ne estas malkuraĝulo.”

Turninte sian kapon, Feng Wei kaj He Juan vidis, ke Mao Qian tenas brilantan tranĉileton en la mano, kun malvarma ŝvito sur la nazpinto.

“Kie vi trovis tiun umon?” La teniĝo de Mao Qian amuzis He Juan.

“Mia frato donis ĝin al mi,” diris tremete Mao Qian. “Li diris, ke se mi renkontos malbonulon, mi haku lin per la tranĉilo.”

“Sufiĉe do. Se vi volas iri kun ni, rapide surmetu vian veston,” urĝis Feng Wei.

Sub pala lunlumo aperis tri maldikaj figuroj en siblanta aŭtuna vento.

Starante antaŭ la panelo kun surskribo “Ne licas eniri por studentoj”, ili tri, alpremante unu al la alia, direktis sian rigardon al la direkto de la aŭlo.

“Tre mallume, kaj ni vidas nenion,” diris Feng Wei, frontinte siajn okuloj, “Ni ne staru nur ĉi tie. Ni devas iris tien.”

Do, Feng Wei antaŭe, Mao Qian meze kaj He Juan malantaŭe iris al la aŭlo man-en-mane.

Kiam ili atingis la pordon de la aŭlo, Feng Wei trovis, ke la pordo ankoraŭ estas ŝilosita per la pendseruro.

“La pordo estas ŝlosita. Zhang Ying neeble troviĝas ene.” Ektirinte la brakon de Feng Wei, Mao Qian diris, “Ni... ni reiru. Eble Zhang Ying jam reiris al la dormoĉambro.”

“Neeble. Ĉar ni jam alvenis, ni devas certiĝi, ĉu Zhang Ying estas ene.” Kvankam Feng Wei tiel diris, ŝi tamen ne havis decidon, kion fari. Ĵetinte ekrigardon al He Juan, ŝi demandis, “Kio estas via opinio, He Juan?”

“Do... do ni agu laŭ via ideo.” He Juan turnis sian kapon malantaŭen de tempo al tempo, tre streĉite en spirito.

La tri knabinoj malrapide ĉirkaŭiris la aŭlon man-en-mane. La mizera lumo de la poŝlampeto gvidis ilin antaŭen.

“Jen rigardu la fenestron!” Feng Wei celis nemalproksiman lokon per la poŝlampo. Laŭ la malforta lumfasko He Juan kaj Mao Qian vidis la fenestron, kiu lasis fendon pro nefirma ŝilosilado.

“Ni iru tien pririgardi,” diris He Juan, kiu ŝajne ne estis tiel nervoze kiel antaŭe. Kiam ili tri aliris, ili trovis, ke la fenestro vere estas duonmalfermita.

Turninte la kapon kaj ekrigardinte la kunulinojn, Feng Wei puŝmalfermis la fenestron. Tuj ŝin atakis humida kaj ŝimaodoro. Ŝi ekkovris sian nazon per mano, sentante malkomfortecon en la stomako.

“Ĉu vi jam trovis Zhang Ying?” demandis duonvoĉe Mao Qian.

“Momenton. Lasu min pririgardi iom.” Feng Wei etendis la poŝlampon en la malluman fenestrokadron. La lumo de la poŝlampo moviĝis en la aŭlo kiel vaglumo kaj malklare lumigis bruligitajn seĝojn, trajojn kaj tegolojn, sed ŝi ne trovis signon de Zhang Ying.

“Mi ne trovis ŝin,” diris Feng Wei, retirinte la poŝlampon.

“Jam mi konsideris, ke ŝi ne estas ĉi tie,” diris Mao Qian, ektirinte la manikon de Feng Wei. “Ni rapide reiru. Eble ŝi serĉas nin.”

“Bone, ni reiru,” He Juan konsentis.

“Konsentite.”

La triopo pretis foriri, kiam aŭdiĝis malpeza sono el la aŭlo. Se dumtage, oni ne povis ĝin aŭdi, sed ĝi sonis tre klare dumnokte.

“Ĉu vi aŭdis? Io moviĝis ene.” Feng Wei haltis kaj ekrigardis la aliajn du kunulinojn. Videble ili ambaŭ ĝin aŭdis laŭ sia vizaĝesprimo.

“Ŝajnas paŝoj,” diris He Juan per subpremita voĉo. “Ritmaj paŝoj. Ŝajnas... ŝajnas, ke oni dancas.”

“Ah!” Mao Qian ekkovris permane sian buŝon, penante subpremi grandan panikon en la koro, kun siaj grandigitaj okuloj direktitaj al Feng Wei kaj He Juan.

“Mi ne devas konsideri pli multe.” Kun streĉita mieno Feng Wei tuj turnis sin, remalfermis la fenestron, samtempe ŝaltis la poŝlampon kaj direktis ĝian lumon en la aŭlon.

Kiam la poŝlampa lumo brilis, la ĵusaj sonoj abrupte ĉesiĝis kaj silento denove regis en la tuta aŭlo.

“Ĉu vi estas ene, Zhang Ying?” subite klamis Feng Wei kun la kuraĝo oni ne sciis de kie venas.

Ŝiaklamado estis simple eksplodo de bombo, kiu eĥiĝis tra la vasta aŭlo. Mao Qian eĉ ŝtoniĝis pro la timiga krio kaj fale sidis sur la teron.

Post nelonge ili tri aŭdis eksterordinaran obtuzan sonegon el la aŭlo. Ŝajnis, ke oni ĵetis jutsakon sur la teron. Feng Wei direktis la poŝlampan lumon al la direkto de sonado kaj vagigis sian rigardon tien. Ŝi vidis, ke nigra figuro surventre kuŝas sur la frida tero ĉe la piedo de la scenejo. Je pena pririgardo, ŝi klare distingis homon, kiu havas paron da blankaj baletŝuoj sur la piedoj.

La korpo de Feng Wei falis malantaŭen kaj He Juan de malantaŭe subtenis ŝin.

“Kio okazis?” nerveze demandis He Juan kun streĉita mieno.

“Tio... tio estas Zhang Ying,” diris tremete Feng Wei, “ŝi surhavas blankajn baletŝuojn sur la piedoj.”

Post kiam Feng Wei finis tiujn vortoj, aero inter ili eĉ senmoviĝis dum du sekundoj.

“Ni rapide forkuru!” laŭte kriis He Juan, kvazaŭ frapite de elektro. Tirante per la maldekstra mano Mao Qian kaj per la dekstra Feng Wei, ŝi plenforte kuris al la direkto de la amasloĝejo.

La tri knabinoj telefone informis policon pri la morto kaj la ŝrikaj sirensenoj de polica aŭto aŭdiĝis ĉe la lernejo.

Policano petis detalojn pri la kazo de la tri knabinoj, kiuj tiam troviĝis ĉe la loko de la okazaĵo, sed li ne akiris ion substancan. Post tri tagoj la polico publikigis ekspertizon pri la morto, kaj certigis, ke Zhang Ying falis de la scenejo pro mispaŝo kaj trafis fortan frapon je la kapo, kio kaŭzis hemoragion de kranio kaj ŝin mortigis. La polico faris pluan enketon pri tio, kial la mortintino iris al la forlasita aŭlo en noktomezo.

La morto de Zhang Ying atestis la verecon de la onidiro. Antaŭ ŝia malplena lito la tri aliaj knabinoj tenis sin senparolaj. Feng Wei dronis en grandaj paniko kaj timo. Ŝi neniel kredis, ke tia evento okazis tuj ĉe ŝi.

Tiumomente ŝi ekmemoris pri sia patrino. Preninte poŝtelefonilon, ŝi iris en koridoron kaj telefone konektis sian patrinon. “Panjo, mi estas Wei-njo.”

“Kian aferon vi havas, Wei-njo?” ameme demandis ŝia patrino, Chu Peiyang (*ĉu pejjing*).

“Ankaŭ vi diplomigis el Universitato K, ĉu vi konas la knabinon nomatan Shen Monian?”

“Jes, kio okazis?” demandis Chu post iom da hezito.

“Ĉu vi ankaŭ scias pri la fajrego okazinta en la aŭlo?”

“Jes, tio okazis antaŭ tre longe. Kion vi volas diris al mi, Wei-njo?” La voĉo de la patrino sonis iom strange.

Feng Wei diris al sia patrino pri la onidiro kaj ĵusa okazintaĵo. Ŝi aldonis, “Ĉu vere ekzistas fantomoj en la mondo, panjo?”

“Ne kredu onidirojn. Ekzistas nenia fantomo en la homa mondo.” Ĉe tio la patrino paŭzis, ŝajne falinte en pensojn.

“Diru plu, panjo,” urĝis Feng Wei.

“Ĉu ekzistas fantomoj aŭ ne, Wei-njo, nur memoru: neniel iri al tiu aŭlo.” La tono de la patrino estis tre forta.

“Kial?” demandis nekomprene Feng Wei, “Vi jam diris, ke ekzistas nenia fantomo, do kial mi ne povas iri tien. Kial Zhang Ying senkaŭze mortis tie? Kiel oni povas klarigi tion?”

“Sekvu mian admonon!” diris la patrino serioztone. “Post du tagoj mi afervojaĝos al la urbo, kie situas via lernejo, kaj mi preterpase iros vidi vin. Memoru miajn vortojn: neniel iri al tiu aŭlo.” Fininte tiujn vortojn, la patrino bate demetis la aŭdilon.

Aŭskultante du-du-sonojn en telefonilo, Feng Wei ne komprenis, kial ŝia patrino tiel koleriĝis.

Vesperkrepuske post tri tagoj Feng Wei ankoraŭfoje iris al la aŭlo. Ĉifoje ŝi ne volis eniri la aŭlon, sed viziti la strangan maljunan ĝardeniston.

Ĉar ŝi songis pri la morto de Zhang Ying, kiu vere mortis sekvan tagon, ŝi konsideris, ke la morto de Zhang Ying rilatas al ŝi iusence. Se ŝi ne montrus la foton de Shen Monian, se ŝi ne irus al la aŭlo, se ŝi ne havus tiun songon, eble Zhang Ying ne mortus.

Ŝi volis solvi la enigmon. Kia ajn la rezulto estos, ŝi esperis, ke ŝi prezentos eksplikon de la afero al Zhang Ying. Pensante pri tio, kiel mizere la gepatroj de Zhang Ying plorados, alveninte al la lernejo, ŝi faris firmajn paŝojn al la kabano de la maljunulo.

“Mi scias, ke vi alvenos al mi pli aŭ malpli frue,” dirs la maljunulo, rigardante Feng Wei sidantan kontraŭe, “La unuan fojon, kiam mi vidis vin, mi ekhavis tian senton.”

“Kial?” Nervoze rigardante lian faltoplanan vizaĝon, Feng diris, “Zhang Ying estas mia kunlerninto. Mi alvenas ĉi tien peti de vi rilatajn informojn.”

“Kiajn informojn?” La maljunulo ekrikanis kaj diris, “La lerneja instanco

malpermesas al studentoj veni ĉi tien. Sed kelkaj scivolemuloj ne obeas. Tio estas ilia kulpo.”

Ĵetinte ekrigardon al Feng, la maljunulo iris al tablo, eltiris tirkeston kaj elpreninte foton el ĝi, donis al Feng, “Ĉu vi konas la personon en la foto, fraŭlino?”

Kun nekomprenemo ŝi akceptis la foton. Kiam ŝi direktis sian rigardon al la foto, ŝi ege surpriziĝis.

Sur la foto estis tre bela knabino, en pure blanka baletĵupeto, pozante per malfacila dancmovo. Tio, kio surprizis Feng, ne estis la sama kostumo de la knabino, kiun Shen Monian surhavis, sed ties vizaĝo.

“Kiu... kiu ŝi estas?” demandis Feng, rigardante lian vizaĝon.

“Ŝi nomiĝas Chu Peiyong,” li diris, sidiĝinte, “Ĉu vi konas ŝin?”

“Ah!” ŝi ekkriis surprizite. “Ŝi estas mia patrino.”

“Jes, prave.” Kun emocio la maljunulo diris, rigardante Feng, “La unuan fojon, kiam mi vidis vin, mi sentis, ke vi estas tre konata al mi. Sed mi vere ne kredas, kiel koincidas tio, ke vi ja estas la filino de Chu Peiyong.”

“Kiel... kiel vi akiris foton de mia patrino?” Feng perpleksiĝis, firme tenante la foton en la mano.

Aŭdinte, kion Feng diris, la maljunulo tuj pleniĝis de larmo. La faltoj sur lia vizaĝo fariĝis pli profundaj en lia plorsingultado.

“Ĉar vi estas la filino de Chu Peiyong, mi havas motivon eldiri al vi la okazintaĵon antaŭ dudek sep jaroj.” Post longa suspiro, li malrapide diris, “Antaŭ dudek sep jaroj, t.e. la jaro 1982, Shen Monian, via patrino kaj mi estis anoj de la Danca Grupo de la lernejo. Tiam Shen estis la protagonisto, kaj via patrino, kvamkam tre brila en ĉiuj kampoj, tamen kompare kun Shen, ŝajne, ŝi malhavis ion pli bonan. Tiam, kiam prezentiĝis *Cignolago* en la lernejo, Shen rolis kiel princino Odette, mi kiel princo Siegfried, kaj via patrino kiel Odile, la filino de Von Rothbart, t.e. nigra cigno. Ĉiufoje pri tia aranĝo de la roluloj via patrino kovis malkontenton, sed ŝi povis fari nenion.”

Ĉe tio la maljunulo ĵetis ekrigardon al Feng Wei kaj poste, mallevinte la kapon, diris, “Por diri honte mi tiam manie ĉasis la amon de Shen Monian, sed ŝi enamiĝis kun aliulo. Tiun tagon, kiam okazis la fajrego, ĝuste estis la tempo por nia provludo. Mi ne scias, kial via patrino forestis. Elirinte el la vestoŝanĝejo, Shen Monian diris, ke ŝiaj baletŝuoj malaperis, kiujn ŝi speciale mendis multekoste laŭ siaj piedoj. Ŝi tre maltrankviliĝis pro tio, ke post kelkaj tagoj okazos oficiala prezentado. Ŝi povis fari nenion alian ol surmeti alian paron da baletŝuoj portempe. Sed dum la provludo ŝi tordis sian maleolon kaj ĉesis provludi. En la ripozĉambro mi vidis ŝian maleolon ŝvelintan kaj mi reiris preni glacikubojn, sed kiam mi revenis, leviĝis jam la fajrego. Kiam mi ĵetis min enen por savi Shen Monian, trabo falis kaj rompis al mi la kruron.

Vole nevole mi elrampis el interne. Kiam fajrobrigadanoj alrapidis kaj estingis la fajregon, Shen Monian jam mortis pro brulado. De tiam, en ĉiutaga meznokto elŝvebis muzikarioj de Ĉajkovskij kaj mi scias, ke ŝia animo ankoraŭ restas ĉi tie, sed mi povas fari nenion.”

Post tiuj vortoj la maljunulo groteskamiene rigardis Feng Wei-n kaj aldonis, “Shen Monian opiniis, ke ĉi ĉion via patrino faris.”

“Estas tre stranga rakonto, ĉu?” Aŭdinte la eldiron de la maljunulo, Feng Wei enspiris longan spiron. “Ĉu ĉio, kion vi diris, estas vera? Sed mi neniel kredas, ke mia patrino faris tian aferon.”

“Nu, ne gravas, ĉu via patrino faris tion aŭ ne.” Forviŝinte larmerojn ĉe la okulangulo, la maljunulo aldonis, “Jam forpasis pli ol dudek jaroj. La animo de Shen Monian ankoraŭ ŝvebas ĝis nun, ĉar, miaopinie, ŝi nur volas trovi nenion alian ol la paron da blankaj baletŝuoj. Se vi havos tempon, demandu vian patrino pri tio.”

“Pri kio mi demandu ŝin?”

“Demandu ŝin, ĉu la ŝuparo de Shen Monian troviĝas ĉe ŝi.” Rigardante Feng Wei, la maljunulo subite diris per subpremita voĉo, “Hodiaŭ nokte prezentiĝos *Cignolago*, ĉu vi havas intereson spekti kune kun mi?”

“Aĥ!” Ŝi ĵetis ekrigardon al la maljunulo kun stranga mistero sur la vizaĝo kaj hezitis longan tempon. “Tiu Shen Monian ne embarasos min, ĉu? Pri mia patrino ŝi...”

“Ne, neniel.” La sulkoj sur lia frunto moderiĝis. “Tio ne koncernas vin. Ĉu vi kuraĝas iri?”

“Kompreneble jes! Kial ne?” ŝi diris kuraĝe.

“Do, bone. Je nul horo de meznokto mi atendos vin ĉe la aŭlo.” Eliginte kelkajn sekajn ridsonojn, li okule sekvis ŝin ĝis ŝia maldika figuro malaperis ĉe la pordo.

Kun kompleksa sento ŝi ĝustatempe aperis je nul horo ĉe la pordo de la aŭlo.

“Venu, mia infano.” La maljunulo malfermis la pordon por ŝi. “La prezentado tuj ekos.”

Ŝi sidigis, kune kun la maljunulo, sur sidlokon de la unua vico, maltrankvile en mallumo atendante la aperon de Shen Monian.

Post kelkaj minutoj subite ekbrilis la lampoj sur la scenejo. Knabino en blanka baletjupo aperis kaj laŭ la malrapide leviĝanta muziko ŝi komencis malpeze pirueti, kiel bela cigno.

“Suprenvenu, Chu Peiying. Mi bezonas nigran cignon en akompana dancado.” Dancante, Shen Monian diris al Feng Wei sube de la scenejo, “Ne enviu min. Vi ĉiam dancas kiel nigra cigno, ĉu ne?” Post tiuj vortoj ŝi ridklukis. Ŝiaj vortoj tute disrompis sian belan figuron en la menso de Feng Wei.

“Kial ŝi parolis tiamaniere?” diris Feng Wei, turninte la kapon kaj ekrigardinte

la maljunulon. “Ĉu mia patrino nur rajtas danci kiel nigra cigno? Kian avantaĝon tiu knabino havas? Mi pensas, ke ŝi ne estas tre bona dancanto.”

“Ĉu jes? Ĉu vi provos danci kun mi sur la scenejo?” Ŝajne Shen Monian aŭdis, kion Feng diris, kaj ŝi subite haltis senmove. Ŝi diris al la maljunulo, “Donu al ŝi paron da baletŝuoj, Zhengping. Lasu ŝin danci kune kun mi.”

“Ne, ne necesas.” La maljunulo iom rektigis sian talion, sed ne stariĝis el la sidloko.

“Ĉu vi ne aŭdis min?” Multe altiginte sian voĉon, ŝi kriis al la maljunulo, “Rapide donu baletŝuojn al ŝi!”

“Donu al mi baletŝuojn! Nenio malfacila povas min ĝeni.” Subite Feng stariĝis el la sidloko kaj deprenis per la mano paron da baletŝuoj el la sino de la maljunulo.

“Ne, infano!” La maljunulo volis ŝin deteni, sed la baletŝuoj jam troviĝis en ŝiaj manoj.

“Bone. Do ni rivalu unu kun la alia en dancado!” Shen ridete diris, “Chu Peiying, mi jam frue diris, ke laŭ via kapablo vi ĉiam povas ludi nur neĉefan rolon.”

Vidinte ŝian fieracan mienon, Feng surmetis baletŝuojn kaj, kun paŭto, iris al la scenejo.

“Wei-njo, ne supreniru!” Apenaŭ Feng surpaŝis la scenejon, aŭdiĝis la voĉo de ŝia patrino el la pordego de la aŭlo. Ŝi abrupte turnis sian kapo kaj vidis, ke ŝiaj gepatroj alvenas.

“Shen Monian, tio ne koncernas mian filinon nek Peiying,” diris la patro de Feng Wei, sin ĵetinte al la scenejo. “Ĉion ĉi tion mi ja faris. Jen la paro da viaj baletŝuoj. Mi redonu ilin al vi nun.”

Post tiuj vortoj la patro de Feng Wei metis paron da blankaj baletŝuoj sur la scenejon.

“Estas mi, kiu forprenis viajn ŝuojn tiujare,” diris la patro kun livida vizaĝo, “Shen Monian, vi estas tro aroganta, fieraca kaj tre acerba. Peiying neniam volis konkuri por akiri la rolon de protagnisto, sed vi ĉiam rigardis ŝin kiel dornon en via karno. Ĉar mi ne povis toleri vian fierecon, mi forprenis viajn ŝuojn. Mi volis vidi, ĉu vi ankoraŭ aspektos kiel bela blanka cigno sen tiuj ŝuoj.”

“Haonian (*hai-njan*), mi neniel imagis, ke eĉ vi faris tion.” Shen Monian eligis akutan ekkriion. “Tutempe mi tiel korinklinis al vi, sed vi ne akceptis mian amon. En kia flanko mi estas malsupera al Chu Peiying? Mi estas pli bela, pli inteligenta ol ŝi...”

Sed vi ne estas tiel bonkora kiel ŝi!” Feng Haonian abrupte interrompis ŝin: “Nur por tiu ĉi paro da ŝuoj vi, kiel al kroĉigema fantomo, puŝis tiom da junaj knabinoj al morto. Nun surmetu tiujn ŝuojn kaj foriru, neniam revenu.”

“Vi ne devas trakti min tiel.” Shen subite ekploris. Rigardante al Feng Haonian

kun larmoj, ŝi diris, “Eĉ se mi havus dek milojn da pekoj, mi jam estas brulmortigita de vi. Ĉu mi vere tiom indas morton?”

“Ĝis nun vi ankoraŭ opinias, ke Peiying faris tiun fajregon. Mi vere ne scias, kiel mi povus sufiĉe kritiki vin!” Eliginte longan suspiron, li diris, “Fakte tiu fajrego estis akcidento. Tiun tagon Peiying ne partoprenis en provludo pro febro, dum mi iris en la vestŝanĝejon de la aŭlo kaj forprenis viajn ŝuojn. Ĝuste tiam mi vidis kelkajn elektristoj fumantaj ĉe kurtenoj. La fajrego estis kaŭzita de iliaj brulantaj cigaredstumpoj. Tion konfirmis fajrestinga kaj publik-sekuriga aŭtoritatuloj. Ankaŭ tiuj elektristoj konfesis tion.”

“Ne, tio ne estas vera. Estis Chu Peiying, kiu ŝtelis miajn ŝuojn kaj estigis fajregon,” Shen histerie kriis kontraŭ Feng.

“Ĉio ĉi tio estiĝis pro mi.” Ne ĵetante atenton al Shen, Feng trankvile suriris la scenejon. Preninte la ŝuojn, li iris al Shen kaj diris, “Surmetu ilin. Ni dancu kune, ĉu bone?”

“Haonian, ĉu vi vere volas danci kun mi?” Shen emociiĝis. “Vi neniam volis danci kun mi antaŭe.”

“Ĉifoje estas malsame. Mi volantas danci la lastan dancon kune kun vi.”

Shen malrapide levis sian piedon kaj li helpis ŝin surmeti la blankan baletŝuon.

“Haonian, ne faru tion!” subite ekkriis Chu Peiying el sub la scenejo. “Haonian, rapide malsupreniru. Rapide malsupreniru, mi petas!”

“Mi devas ripari la eraron, kiun mi faris, Peiying.” Post tiuj vortoj, Feng Haonian direktis sian rigardon plenan de amemo al Feng Wei, sia filino.

Ĝuste tiam melodias muziko subite alŝvebis de ĉirkaŭe. Kaj samtempe Shen Monian jam piruetis sub la gvido de Feng Haonian sur la scenejo.

“Rapide malsupreniru, mi petas, Haonian!” Tiumomente Chu Peiying ploris singulte, tremante kaj brakumante Feng Wei firme.

Kiam Feng Wei senrimede rigardis ĉion ĉi tion, lamplumo subite estingiĝis. En palpebruma daŭro la tuta aŭlo estis glutita de mallumo, sed la muziko ankoraŭ daŭre sonis.

Kiam Feng Wei sin trovis en paniko, subite leviĝis du buloj da brila fajrolumo sur la scenejo. Shen Monian kaj ŝia patro estis volvitaj per brulantaj flamoj. En la ardanta fajrolumo ili ambaŭ ankoraŭ elegante dancis laŭ la muziko.

“Paĉjo!” Feng Wei ekkriis kaj pretis sin ĵeti sur la scenejon. Tuj ĉe la momento fajrolumo subite estingiĝis kaj lamplumo refoje ekbrilis.

La tri homoj piede de la scenejo samtempe direktis sian rigardon al la scenejo. Vidiĝis en la centro de la scenejo paro da blankaj baletŝuoj, kaj la du dancantoj jam malaperis senpure.

Xu Yaozuo (aŭtoro en Tang-dinastio)

SinJORINO Saliko

Dum Tianbao (*tjanbau*)-erao(742-756), Tang-dinastio, Han Yi (*ji*) de Changli (*ĉangli*) ĝuis famon de elstara poeto.

Senbridema kaj senzorgema, Han vivis tre malriĉa kiel migranto en fremda loko. Instruitulo Li, intima amiko de Han, estis riĉa kaj kavalira sinjoro, tre estimanta al talentuloj. S-ro Li havis favoratinon, nomatan Saliko, kies beleco estis senkompara siatempe. La virino estis babilema kaj ŝercema, tre lertis en kantado kaj versado. S-ro Li loĝigis ŝin en aparta domo, kie li ofte drinkis kaj versis kun Han Yi. Dume, li gastloĝigis Han en najbara ĉambro. Ĉar Han Yi ĝuis grandan famon, tial tiuj, kiuj lin vizitis, ĉiuj estis siatempe elstaraj famuloj. Tra pordfendo s-ino Saliko vidis tion kaj diris al siaj servistinoj: "Ĉu s-ro Han restos malriĉa por ĉiam?" Kaj ŝi ekhavis korinklinon al Han.

S-ro Li ĉiam tre respektis Han Yi, kaj avaris nenion por li. Sciiginte pri la korinklinon de Saliko, s-ro Li invitis Han al festena kundrinko, kaj, dum la rava drinko, s-ro Li ekparolis: "S-ino Saliko estas senkompara belulino, dum s-ro Han—distingita beletro-majstro. Nun mi volas parigi s-inon Saliko al s-ro Han. Kiel vi opinias?"

Ĝistreme timigite, Han Yi ekstarigis for de sia sidloko kaj diris: "Ho, jam delonge mi multe ŝuldis al via granda favoro disponigi al mi viajn manĝon kaj favoron, kiel mi aŭdacus akcepti vian favoratinon?"

Sed s-ro Li insistis pri sia propono.

Bone konsciante pri lia sincero, s-ino Saliko faris du riverencojn al li, kaj, iom ordiginte al si la vestaĵojn, ŝi alsidiĝis apud s-ron Han.

S-ro Li invitis Han sidiĝi al la loko de honorinda gasto ke ili ĉiuj kune daŭrigu la ravan drinkadon.

S-ro Li ankaŭ donacis al Han 300 milojn da moneroj por vivtenado. Tiel, s-ro Han ĝuis la belecon de Saliko dum ŝi admiris la talenton de la s-ro. Ambaŭ vivis en granda harmonio, kaj ilia ĝojego ja estis facile imagebla.

La sekvantan jaron, en la imperia ekzameno prezidata de la vicministro Yang (*jang*) Du, Han Yi gajnis la lokon inter la superaj sukcesintoj, sed, poste, dum pli ol unu jaro li nur loĝis ermite. Foje, s-ino Saliko diris al Han: "Famo kaj honorigo al siaj familianoj ja estas tio, por kio multaj homoj ĉiam strebis. Kiel do indas ke vi damaĝus vian karieradon nur pro unu nenobla virino? Krome, la provizo ĉi tie ja

estas sufiĉe abunda por ke mi ĝisatendu vian revenon." Konvinkite de la konsilo, Han Yi do veturis al sia hejmloko Qingchi (*ĉingĉi*).

Post pli ol unu jaro, tamen iom post iom elĉerpigis mono de s-ino Saliko, kaj ŝi komencis forvendi siajn kap-ornamaĵojn k.s. por vivteni sin.

En la fino de Tianbao-erao, la du ĉefurboj estis okupitaj de la ribelantaj trupoj. Popolanoj, ĉu viraj aŭ virinaj, panike disfuĝis. Kosciante pri sia distingita beleco, kaj por eviti ion malfeliĉan, s-ino Saliko detondis al si harojn kaj, alivestiginte sin, rifuĝe loĝis en Faling-templo.

Siatempe, Hou Xiyi (*hoŭ ŝiji*), armeestro de Pinglu, translokiĝis al sia nova garnizonejo Ziqing (*ĝiĉing*). Ĉar Hou jam delonge informiĝis kun admiro pri la fama talento de Han Yi en verkado, Hou invitis ke Han Yi funkciu kiel lia ĉefsekretario.

Post kiam la imperiestro Suzong restaŭris la reĝimon de Tang-dinastio per sia saĝa heroeco, subiginte la ribelon, Han Yi sendis kaŝe serĉi s-inon Saliko en la ĉefurbo Chang'an (*ĉang-an*), kaj, pere de la sendito, li donacis al ŝi sablan oron en blanka silka saketo, kun surskribo de versoj:

Ho, saliko en ĉefurbo!
 Ho, saliko en ĉefurbo!
 Kia restas via verdo?
 Ĉu senŝanĝe? Ĉu en perdo
 pro alies pluk-uzurpo?
 Min turmentas tiu certo!

Manprenante la donacitan oron, s-ino Saliko ekplorgemis. Ankaŭ la ĉirkaŭantoj ĉiuj ĉagreniĝis kompatante al ŝi. Kaj ŝi respondis verse:

— Ve! saliko ĉiujara—
 serv' nur al disiĝ' amara!
 Nun, aŭtuna vent' ekblovas,
 jen folia fal' denovas.
 Eĉ se vi revenas, kara,
 Kion vi ankoraŭ trovas?

Post nelonge, iu tibeta generalo, nomata Shazhali (*ŝaĝali*), faris meritojn en milito. Informiĝinte pri beleco de Saliko, Shazhali rabprenis ŝin al sia domo kaj ŝutis al ŝi multe da favoroj. Poste, Hou Xiyi transoficiĝis al la ofico de la maldekstra premiero kaj vojaĝis al la ĉefurbo por ricevi aŭdiencon de imperiestro, nur tiam Han Yi havis la ŝancon sekvanse lin veturi. Kiam Han Yi venis al la ĉefurbo, li jam ne povis trovi spuron de s-ino Saliko kaj multe veis kun ardaĵ sopiroj.

Iufoje, ĉe la Dekkapa Monteĝo, Han Yi hazarde vidis ke maljuna servisto veturis kurtenitan ĉaron, kiun tiris bovo kaj postsekvis du servistinoj. Dum Han Yi

senintence sekvis irante post la ĉaro, iu demandis depost la ŝirmita kupeo: "Ĉu vi estas s-ro Han Yi? Mi ja estas Saliko!"

Kaj, pere de sia servistino, Saliko transsciigis al Han, kiel ŝi estis forkaptita de Shazhali, kaj, pro ĉeesto de kunvojaĝanto, nun ŝi ne havas ŝancon interparoli kun li. Ŝi petis ke Han nepre atendu ŝin la sekvantan matenon ĉe la pordo de la kvartalo Daozhengli.

Han Yi venis al la rendezuo laŭ la difinita tempo, kaj s-ino Saliko el ĉaro transĵetis al li negrandan jadkeston kun pomado, pakitan per maldika silkaĵo, dirante: "Prenu ĝin kiel eternan memoraĵon! Nun adiaŭ! Por ĉiam!"

Kaj ekveturis returnen ŝia ĉaro, el kiu ŝi senĉese mansvingis. Ŝia maniko leĝere flirtis dum la aroma ĉaro triste knaris. Starante tie, Han Yi konfuzite rigardis al la ĉaro, kiu forveturis pli kaj pli malproksimen, ĝis fine malaperis el lia vidkampo droninte en la leviĝanta polvo, kio faris Han Yi tre sentimentala kun senfinaj sopiroj.

Tiun tagon, okaze multe da oficiroj el Ziqing aranĝis bankedon en restoracio kaj Han Yi ankaŭricevis la inviton. Malgraŭ sia moroza humoro Han Yi ĉeestis la bankedon, sed li aspektis pala, tre senverva kaj tute deprimiita, kun ĝemvibro en sia voĉo. I.a. troviĝis adjutanto nomata Xu Jun (*ŝu ĝun*), kiu ofte memkontentis pri sia kapablo kaj bravo. Rimarkinte la mienon de Han Yi, Xu Jun demandis ekpreman sian glavtenilon.

"Ho, s-ro, vi certe havas ion ĉagrenan en via koro! Bonvole diru al ni kaj mi ne ŝparas mian servon por vin helpi!"

Vole-nevole, Han Yi malkaŝe diris ĉion, kaj Xu Jun senhezite diris: "S-ro, bonvole donu al mi vian manskribon, kaj mi tuj alvenigos ŝin ĉi tien!"

Kaj li tuj vestis sin per uniformo de ordinara militisto, portis kun si pafarkon kaj du sagujon, kondukante unu kromĉevalon, rapide galopis rekte al la domo de Shazhali, kie li atendis kelkan tempon ĝis kiam Shazhali eliris de sia domo jam pli ol unu lion, tiam Xu Jun portante militistan robon, kondukante bridon, sturme entrudiĝis tra la fronta pordego kaj ankaŭ la interna pordo, kaj li senĉese laŭte kriis: "Lian Generalan Moŝton trafis akuta malsano kaj mi estas sendita urĝe venigi la s-inon!"

Lakeoj kaj gardistoj de Shazhali ĉiuj timigite retiriĝis disflanken, neniu eĉ kuraĝis kaplevi rigardi.

Tiel Xu Jun venis al la halo. Li montris al s-ino Saliko la slipon skribitan de s-ro Han Yi, kaj rapide subtenis ŝin ascendi la kromĉevalon kaj, en palpebruma momento, ili kun fulma rapideco jam alvenis la restoracion.

Ordiginte sian veston, Xu Jun paŝis antaŭen raportante: "Feliĉe mi ne malplenumis vian komision!"

Ĉiuj ĉeestantoj tre miris kaj admiris. S-ino Saliko kaj s-ro Han Yi intervidiĝis manpremante unu la alian kaj ekscite ploris. La bankedo do ĉesiĝis.

Ĉar Shazhali tiam ĝuis aparte grandan favoron de la Kortego, Han Yi kaj Xu Jun maltrankvilis timante ĉu okazus al ili malfeliĉo. Sekve, ili vizitis s-ron Hou Xiyi, kiu diris kun granda surpriziĝo: "Ho, jen ĝuste kion mi emis fari dum tuta vivo! Nun, ĉu Xu Jun ankaŭ faris tion?"

Kaj li senprokraste prezentis al imperiestro raporton kiu legiĝis jene: "Han Yi, titularaj ministro, vicedro de la trezora departemento sub la Speza Ministerio kaj inspektoro, dum sia longa servado kiel asistanto faris multe da meritoj. Dum li vojaĝis al ĉefurbo partopreni ŝtatan ekzamenon, lia edzino, nomata Saliko, disiĝis de li barite de ferocaj ribeluloj kaj sin loĝigis rifuĝe en bonzinejo. Nun, kiam civilizacio prosperis tra nia imperio kaj edifiĝis popolanoj ĉu proksimaj aŭ foraj, tamen okazis malordigo de leĝaro far iu generalo Shazhali, kiu, tro alte taksinte sian negrandan meriton, aŭdacas damaĝi la sanktan regadon de moralo per sia perforta rabado de virta virino. Mia subulo Xu Jun, titulara vicĉefinspektoro, origine bravulo en Hebei, heroa kaj kuraĝa, reprenis Salikon kaj revenigis ŝin al Han Yi. Kvankam Xu Jun faris tion pro justama indigno, tamen lia ago sen anticipa peto pri instrukcio rezultigis de mia nerigora rego al miaj subuloj."

Post nelonge, publikiĝis edikto de imperiestro, verdiktante ke Saliko estu revenigita al Han Yi, kaj du milionoj da moneroj estu premidonitaj al Shazhali.

Tiel, s-ino Saliko reunuiĝis kun Han Yi, kiu poste foj-refoje promociiĝis ĝis konfidenca sekretario en la kortego.



elĉinigi **Guozhu** (Ĉinio)

Marjorie Boulton (1924-2017)



poetino, Marjorie Boulton

La 7-a de majo ĉijara estas la centjara naskiĝdatreveno de la fama brita esperanto-verkistino, poetino kaj tradukistino Marjorie Boulton. Ŝia verkaro ampleksas poeziaĵojn, dramojn, novelojn, rakontojn kaj eseojn kaj krome, ŝi tradukis.

Ŝia verkado plenas je varma tono kaj sincereco. Kaj ŝi ĝojas ĝui kun legantoj siajn pasiojn kaj turmentojn. Dum verkado de poemoj ŝi montras sian evidentajn altajn art-teknikojn. Por memorfesti ŝian centjariĝon ni aperigas ŝiajn jenajn poemojn.

Flagrema amikeco

Ni du alterne kveras kaj kverelas.
Unu alian dolĉe ni konsolas,
Aŭ la kolero fajroŝpruce brulas.

La harmonia gaja, la alegro —
Subite, jen! la horo de la tigro,
Kaj elokvento, okulflamo, flagro.

Estas pro amikeca kora varmo
Ke tiel ofte venas eta skermo,
La fajra krako de l' elektra ŝtormo.

Mi ne ĉagrenus vin pro io ajn,
Sed io brulas brue en la vejn',
Kaj mise, pele, pulsas en la pojn';

Sakroj, insultoj, larmoj, eĉ frapetoj.
Mi vin malamas. Vortaj luktoj, spitoj;
Fajreroj flagras pro la kontraŭfrotaj.

Kaj vi kun mi, l' amiko plej bonkora,
Iĝas subite aspra kaj severa;

Vi ŝajnas eĉ kruele frida, dura;

Kaj via amikema varmo iĝas
Knaranta flagro blua; vi sovaĝas;
En mian propran memon mi rifuĝas.

Sed la flamemo nia, tiu bruo,
Estas kromfrukto de la energio
Kiu nin pelas al parolo, kreo.

Nun mi komprenas; mi ne vere timas;
Kamaradece, gaje, ni ekflamas
Nur ĉar la amikeco varme lumas.

Kaj kiam la kolero min invadas,
Eĉ tiam, mi al amikeco kredas,
Al vi, profunde, tra la flagro fidas.

Revenos vi, revenos dolĉa kver'
Post la kverelo kaj la ŝajna ŝir'
Ĉar vi neniam estas vere for.

Via kato

Hodiaŭ estas varma tago;
Dormema sub la suna flato
Mi pensas en volupta vago:
“Ho, se mi estus via kato!”

Ho, kuŝi, eta hejmtigrino,
Eletendita pelta pezo
Sur via gastigema sino,
Volupta duonanestezo!

Aŭ sidi, pli kompakta kato,
Etendi mian glatan kolon,
Dum via varma manoplato
Vibrigus ĉiun spino-colon!

Donante kiajn verdajn helojn
Miaj okuloj kiel lumus!
Kiam vi frotus la orelojn,
Kiel mi kontraŭfrote zumus!

Kiel sub via mola tiklo
Mi zume vibrus, ĉiu osto,
Spino, skapolo kaj klaviklo
Ĝis la vertebroj de la vosto!

Miaŭs mi el gorgĝ' profunda
Pro tiu dolĉa haŭtgalvano,
En amekstazo malfekunda
Sub via karesanta mano.

Sur la kvaropa fingrokombo
Streĉe-malstreĉe mi petolus
Kaj zumus kvazaŭ kat-kolombo.
Vi kupsus min, mi kapriolus.

Sed pardoneme mi revenus
Kaj kontraŭ via mano frotus
Peltan mentonon, ree svenus
Kiam vi ree min dorlotus.

Ho, kara, esti via kato!
Sen vortoj, pensoj aŭ promesoj
Kuŝi sen devo aŭ debato,
Elektrizita per karesoj!

— kaj aŭdi viajn kriojn sakrajn,
Kaj senti mian finplezuron,
Enpuŝi dudek ungojn akrajn
Plenstreĉe, kroĉe, en femuron...

Mikaelo Bronŝtejn (Rusio)



K v i n s e n t i t o l a j p o e m o j

poeto, Mikaelo Bronŝtejn

Mi havas tri patrolandojn – tiel okazis ja, karaj,
trukon ĉi tiun aranĝis hazarde mia taŭzita vivo.
Kaŭzoj de tiu ĉi fakto estas por mi tute klaraj,
kaj por adori ĉiun el tri estas klara motivo.

La tri patrolandojn miajn nun obsedis milito,
kaj reciproka malamo arde bobelas ĉie.
Sed mi ja adoras ĉiujn tri, kion nun faru mi do,
se mi paroli nenion, eĉ unu vorton, rajtas prie,

ĉar ĉiun ajn parolon laŭleĝe nun sekvas puno,
la puno estas pli grava, ol oni rabistojn punas.
Eĥ, ni ja vortlude, kaŝe spertas paroli en nuno,
kaj kuirĉambro hejme por tio plej oportunas...

Mi, malamata nuntempe de multaj pro mia vidpunkto,
kredas ke havas nepran finon ĉiuj epokoj barbaraj.
Eĉ se malamo nuna estas por mi kvazaŭ pun' do
mi opinias min prava. La tempo nin juĝu, karaj.

La dolĉa fumo de printempa lignofajro,
la juna vento junajn nubojn lante movas,

kaj el animo mia per spirado fajna
dolorojn de la trista vintro nun forblovas.

Bruligas do la rubon mi pasintaŭtunan,
parcelon mian purigante por plantado,
kaj neglektante la socian staton nunan
moviĝas daŭre laŭ la sama vivopado.

Ekstere fulmas kvereladoj kaj balotoj,
ĉi-tie ĉirpe ĉarmas ĉeaj birdaj sonoj -
mi ĝuas ilin for de klaĉoj kaj komplotoj,
plu sata pro l' antaŭaj vivolecionoj.

Furiozas vintra fin', do
ĉu pro eco superjara?
Sed pli magras neĝa vindo,
sed pli longas tago klara,
sed pli vigle batas kor' en
ĉies brusto – juna, olda,
kaj rigard' impetas foren,
kaj sentebblas nun pli ol da
aĝa pezo kelkaj tunoj -
faciliĝo por ekflugo,
kvazaŭ plu ni restas junaj,
kvazaŭ daŭras plu la ludo
de bobele viglaj revoj,
vertiĝigaj, esperdonaj...
Ĉu mi fajfu do pri l' devoj,
urĝaj taskoj kaj ordonoj?
Ĉu mi sentu min libera
fari tion, kion volas?
Eĥ, dum vivo mia tera
nur image mi petolas.

Doloro en ingveno –
ĉu estas jam hernio,
aŭ, eble, hasta veno
de seksa simfonio,

volvanta en ekstazan
senkompareblan lezon?
Jen estas la okaz' en
la vivo por komplezon
al iu atribui
kaj resti plu kontenta.
Sed diru veron: ĉu vi
al io senatenda
kaj senaverta pretas?
Mi komuniku: - mi ne! –
Sed kial ci ridetas?
Nu, trankviliĝu fine...

Strange umas mi apud stulta kur'
al fantoma cel', al mistera venko.
Mi ne estas por, sed mi povas nur
dance versi ĉe l' tem' en flamenko.

Flugas obusar' kontraŭ obusar',
celas sangon sang' en impet' vengĝema,
kaj milita fin' ne proksimas, ĉar
fajfas regantar' pri opono ĝema.

Kiu estas mi? Homo, civitan',
filo de la mond', daŭre ema vagi,
kial do pro l'pek' de freneza man'
devas ankaŭ mi plago-pagon pagi?

En malvarma nub' fluas la april',
la postvintra ter' spiras plej tenere,
kaj en mia trist' mi ja revas pri l'
hela paca temp', kiu venos.
Nepre.



Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



poetino, Maria Nazaré Laroca

Ok poemetoj

Novjaro

Vivo adas plue...
Ne gravas tiu, kiu
Sur temp' rajdas fluge.

Eroj el moment',
Into, onto antas,
Nunon kaŝante.

Tuj ekos Novjaro;
Ritoj al homar' utilas.
Tamen tute survoje
Necesas malpleniĝo:
Vivo plue adas...

Trasomere

Kio ĉion reĝisoras?
Maro ludas simfonie:
Onden iras homoj, homoj...

Verdarĝenta pulmo spiras:
Ventr' patrina ritme pulsas
Laŭ brilŝauma partitur'.

Homamaso trasomeras
Sunombreloj bunte svarmas...
Ĉu foiro? Ĉu altar' ?

Someranoj sin ofer(t)as
Por adori sunon ... maron ...

Ĉu verĝojas la estuloj?
Scivolemas la poeto.
Jen - aŭdiĝas voĉ' sekreta -
Plezurplenaj ekzistuloj!

Lilioj de San-Paŭlo

La svarma urbeg' furoras:
Jarfinaj festoj eksplodas
Kaj tempon englutas brile.

Tiam amas' da homoj blinde
Preterpasas donacon dian:
Tiujn etajn anĝelojn, kiuj fariĝis

Rozkolora ĝardeno el lilioj,
Por ĉiutage nin regali
Per neatendita salut'
gracia.

Boato

Poeto,
Malaranĝu
Vian rimon,
Aranĝu vian koron,
Kaj remu
Direkte al vivo!

Parolado por endormigi genuojn

Ho, miaj genuoj! Nemalhaveblaj iloj de mia fleksebla vertikalkondiĉo...
Kelkfoje nedecidemaj, genufleksaj; kelkfoje kuraĝaj, cirkunfleksaj, kun aliaj genuoj
interplektitaj en ĉirkaŭpremo de amo...

Ho, miaj genuoj! Mi havas amikon kiu ilin konsideras belaj kaj voluptemaj... Kaj eĉ mi tion ŝatas...

Nudaj genuoj sunbrunitaj, ekspoziciitaj, moviĝas inteligente tra la troseka arbaro urba: en liftoj, bankoj, kinejoj, universitatoj kaj komercaj centroj...

Ho, povraj, vunditaj genuoj... eksterbatale. Ili ripozas nun sub ĝlacia doloro kaj dormas vintrosune, revante pri la dancotempoj, ĝojritme...

Vivdecido

Mi rezignis
Esperi la vivo
Enamiĝos al mi:
Mi decidis do
Enamiĝi al ĝi.
Estis pli facile.

Alkemie

Mi plu travivas
Foreston vian
Alkemie.

Per lamenoj
De l' poezio
Mi trapasas
Mian reverson
Versigitan

Kaj reinventas
La sopiron
Pri vi, ostaĝo
De foto via.

Drinkejo

La bierodor' svita
serpentumas
tra drinkejo ŝima
kaj englutas
la nokton urban.

Malplenaj boteloj
sur la tabloj
prizorgas ĉagrenojn
kaj riskojn malkaŝas.

La memoro nuna
estas perdita hundo
sur iamaj vojetoj,
vaganta tra la cindroj
de l' revoj incendiitaj.



Eto (Ĉinio)

Tra longa strato

mi iras
tra longa strato
kvazaŭ tra longa temp-tunelo
mia kaŝita emocio
flegmas kiel la burĝono
de la sovaĝa floro
miaj biciklo, libro kaj cigaredstumpo
min sekvas strikte
vintro estas krevanta
ĝi krevigas miajn orelojn
mi aŭskultas al foriranta vintro
via ombro sin trenas post mi
printempo pene tiras vian ombron
ĝi ankoraŭ ŝtone dormas
en mia sonĝo
pasero abrupte forflugas
forportante la seriozan vintron
mi estingas la cigaredstumpon
premante la iaman amon
tio ne helpas!
longa vagonaro galopas
tra densa neĝa blanko
ĝiaj fenestroj kovriĝas blanke
neĝo ripetade kantas
tristan kanton de disiĝo
okaza frido min ĝenas
en la frua primavero
sed mi en la nuno
karesas la flegmon de la lunlumo
kaj atendas, atendas
kun granda pacienco
fulme la karulo
eniras en mian sonĝon
la printempa freŝa verdo
jam grimpas plene
la flaviĝintan montdeklivon

Lily (Ĉinio)

Viv-vojaĝo

Se mi ne renkontus vin,
mi ne scius, kiel kontraŭstari
forlasitecon kaj solecon en destin',
dum viv-vojaĝo longa.
Se vi ne eskortus min
sur la longa vojo malebena,
mi ne havus ĝojon en anim'.
Mi ne zorgas pri l' estonto
ĉu mizera ĉu en fascin',
sed nur pri plezuro
dum vojaĝado ĝis la fin'.
Mi volantas ja promesi,
ke mi ĉiam kun obstin'
kune kun vi traveturas
la hom-mondon per pilgrim'
suferplena sed feliĉa
ja ĝis nia am-kulmin'.

Rememoro de folio

Mi iam havis pompon
pendanta alte sur branĉpinto
kun bonodoro de juneco.
Mi ankaŭ ĝuis
aprezon de la blankaj nuboj,
kareson de la suno,
alvokon de leĝera vento
kaj duŝon de la pluv' kaj rosoj.

Mi iam havis ĝojon:
kun birdoj kanti kune,
aŭskulti al ĉirpado grila.

Sub mi la homoj trinkis teon,
babilis pri diversaj mirrakontoj.

Mi iam partoprenis
feliĉon de geviroj
kverantaj kaj kisantaj
sincere en ardanta amo
kaj por venonta kuna vivo.

Mi iam spertis
vipbaton de feroca vento,
vergadon de pluvego,
sed mi eltenis firme
la provojn de naturo
por bone varti kreskon
de ruĝaj floroj
kun kor' trankvila.

Nun mi jam finis
mision mian de naturo.
Mi tuj foriros kun rideto,
sen tristo kaj ĉagreno,
bedaŭro kaj rimorso,
nur kun fiero.
Mi diru al vi adiaŭon,
amikoj! ĝis la venontjara
plezura rekuniĝo!

Printempa pluvo

Printempa pluv' sen sono
faladas molleĝere
jen kiel silkfadenoj el kokono,
kaj elversigās sur la teron.
Alvenas ĝi por semoj en bezono
al la ĉiela suko
por naskiĝonta burĝono.

Kristalaj pluvogutoj
ja travideblaj kun brilpuro,
tralavas ĉion, krokizante
printempon jen per belfiguro
kaj flirtas en aero
dancante kun plezuro.

Subtilaj pluvogutoj
verŝajne kiel dolĉa vino
jen ebrigas florojn,
salikojn per sangvino.
Velkintaj herboj pro ĝi
etendas tigojn sen kapklino.

Valoras la printempa pluvo.
Ĝi gutas kiel mielrosoj—
nutraĵo por arbidoj,
kaj sprosoj, ŝosoj
—kiel poemetoj
skribitaj kun patosoj.

Mi kvazaŭ vidas en ĝi larmojn
de amatino mia en la foro.
Ŝteliras ŝi en mian songon,
frapetas je mia koro
kaj petas de mi
la vortojn de konsolo.



Yi Qiao (ĉino en Germanio)



poeto, Yi Qiao

La monto en foro

Nuboj flirtas sur la monto fora,
loĝas jen juneca la memoro.
Ne revenas la bontempo ora,
mi sopiras dolĉe kun doloro.

Mont' sentimentala mute vokas:
kie vi 'stas mia amatino?
Daŭre nuboj ŝvebe jen surlokas,
mankas vi al mi kun korinklino.

Monto dista staras jen impone,
de pratempo ĝis hodiaŭ ĉiam.
En nubmaro vervo flagras drone,
l' am-promeso bonkonatas nun jam.

Kiam homoj sobras sur la Tero,
l' mondo plenas d' amo kun espero.

Saniĝo tra meditado

Estas grava la spirita glato,
ĉar ĝi al saniĝo profitdonas.
Meditadu ni en tranca stato,
kaj rezulte nia korpo bonas.

Kun vizi' de bel' ni enpensiĝas,
energi' ĉerpeblas por vitalo.
Forto san-spirita jen plenriĉas,
ni bonfartas nun laŭ idealo.

Flagras vervo dum la meditado,
sekve la animo jen puriĝas.
Pensmigrante tra serena pado,

kvazaŭ ĵus baptitaj ni feliĉas.

Meditad' profitas al bon-vivo
kun saĝeco de nov-perspektivo.

Bonstato

Pensmaniero
altgrade efikas sur
mensa prospero.

Ŝanĝebla vivo
dependas de vidkampo
de perspektivo.

Vera bonstato
dependas precipe de
spirita glato.

Ne l' mona sumo
la bonstaton alportas,
sed inspir-lumo.

Korharmonio
la bonfarton alportas
kun sankonscio.

Granda trezoro
heredebla ja estas
l' amo en koro.

Amon dividas
ni kun samideanoj,
kaj ŝancojn vidas.

En malfermita
menso troviĝas vera
bonstat' spirita.

Estas senlima
en bonfartanta korpo
saĝec' anima.

John Huang (Kanado)



poeto, John Huang

Kanado

Ja Kanado vastas kun sia pejzaĝ’:
Glaciejoj, lagoj, kaj arbar-miraĝ’.
Aŭroroj lumas, kaj brilas la ĉiel’,
Je liberaj sentoj plenas l’ aer’.

La naturaj mirindaĵoj sur la ter’
Alloge buntas en la landa sfer’.
Ni akordas inter malsam-kulturoj nun,
Kaj vivas fiere sub la favora sun’.

La Libro de Poezio

La Libro de Poezio kun belaj vortoj,
Rakontas pri antikvaj ĉinoj sen distordo.
En kampoj kaj urboj kantas poetoj,
Kaj la versoj legatas sen ajna tedo.

Antikva saĝo fluas tra generacioj,
eĥas la versoj en l’ antikvaj nacioj.
Ĝia arto ĝisvivas tra la tempriver’,
kaj disfloras tradicie en prosper’.

Esperanta fotisto

En lando fremda loĝas fotisto lerta,
Veninte de Ĉinio, kun vido tutcerta.
Pejzaĝojn mirindajn serĉas lia lens’,
Diversajn emociojn kaptas lia mens’.

Li vojaĝas de land’ al lando en la mond’,
La natur’ inspiras lin per ama ond’.
Amikojn li trovas en diversaj gentoj,
Li versas Esperante en ĉiuj momentoj.

Li faras fotojn sur kultur-grund’ sen limo,

Kaj liaj bildoj plenas je bela esprimo.
Kien ajn li iras, li trovas novan vojon,
Per pentrado de l' natur' li ĝuas ĝojon.

La flago verda brilas tra la lens',
En fotoj pompas l' amikeca dens'.
Fotisto esperantista en Kanado li
Ĉasas belajn momentojn kun pasi'.

Niagara akvofalo

Jen imponas Niagara Akvofalo,
Ĝi sin ĵetas potence al profunda valo.
Impetas l' akvo kun sonora bru',
Ja homoj miras ĉe la turbulanta flu'.

Disen ŝprucas akveroj en buntaj koloroj,
etaj ĉielarkoj ŝvebas el akva vaporoj.
Mirigas la pejzaĝ' homojn per plezuro,
Jen bela vidindaĵ' de l' potenca naturo.



Banff nacia parko

Banff, kun siaj montoj kaj lagoj puraj,
Pli belaj ol pentraĵoj en kadroj artaj.
Ĉirkaŭas ĉiel' kaj neĝo senmakula,
Arbaroj dense vastas, mirakla floraĵo.

La bestoj libere tra la vojoj vagas,
Kaj ripozas sub ĉiel' en tagoj varmaj.

Natura belo tie eterne regas,
En Banff troviĝas la harmonio rara.

La arkta glacimonto

En la norda maro flosas glacimonto,
Impona kvazaŭ blanka kastelo.
Ĝi drivas trankvile en oceano glacia,
Reflektante sunlumon en spegulo glacia.

La pingvenoj sin kaŝas ĉe ĝia flanko,
Kaj la vento kantas per malvarma zumo.
La akvo ludas ĉirkaŭ ĝia bazo,
Kaj la glacimonto restas kiel eternulo.

Jangzio

La Jangzio fluas al marborda land',
Ruliĝas, brilas sub la suna grand'.
Altmontoj fabelas pri ties glor',
Kaj ĝi kantas ritme dum miloj da jarar'.

Serena nokto

En la serena nokto la luno brilas,
En ĝia lumo la tero kvietas.
La vento susuras inter la folioj,
Kaj la naturo kantas dolĉajn melodiojn.

Sur la rivero la akvo mildas,
Reflektante la stelojn, kvazaŭ diamantojn.
Ĉiu ondo ŝajnas porti misteron
Pri la sekretoj de l' universo.

La koro sentas la ritmon de l' vivo,
En ĉi tiu trankvila, magia horo.
La ĉielo etendiĝas senfina kaj blua,
Kaj l' animo trovas pacon, pura kaj nova.

Bedo de Ĉinesko

Veĵdo (Ĉinio)



poeto, Veĵdo

Plantado de oro

Rakonto pri Afanti

—laŭ ĉinesko *Sopir-al-sudo**

Afanti
 sur sia azen'
 rajdis al la kamparo
 kun pruntita oro jen,
 poste ĉe sabla teren'
 kribadis sen ĝen'

la oron.
 Ĝuste por ĉaso
 la reĝo renkontis lin
 tie je preterpaso
 ĉe sablamaso.

“Afanti,
 kion faras vi?”
 ĉuis li miroplene,

“Ne tenu min ja sen sci’,
respondu al mi.”

Respondis
Afanti ruze,
“Mi plantas oron, Moŝto.”
Tio kirlis amuze
lin kaj konfuze.

La reĝo
jen demandis plu,
“Kial vi plantas oron?”
“Ĉu vi ne komprenas, fu?
Nur inter ni du!

Mi semas
ĝin en teron nun,
post zorgema kultivad’
mi rikoltos en tempum’
ĝin je granda sum’.

Ekbrilis
la okuloj de
la reĝ’ kaj li konsilis,
“Vi estas malriĉa tre
kaj or-manka, ve!

Se semus
vi pli da or’,
vi rikoltus pli multe.
Eĉ per penega labor’
vi povus, sinjor’,

ne grandan
profiton vere
ricevi el plantado!
Iru al palac’ prefere
kaj eĉ libere.

Vi rajtas
preni, kiom vi
volas. Ĉe rikoltado
la oron dividos ni.
Okdek procent mi

ricevos
kaj vi ja dudek!”
Afanti respondis do,
“Ha, vere bona ide”!
Ni tuj agu ek!”

Afanti
en la posta tag’
prenis du ĝinojn** da or’
el la palaca monlag’
por rikolta pag’.

Redonis
per la reĝa or’
li la pruntitan monon.
Temp’ rapide pasis for
ĝis rikolta hor’.

Denove
li prunteprenis
jen dek ĝinojn da oro,
al la reĝo alvenis,
ĝin antaŭtenis.

Kun ĝojo
la reĝ’ ridete
vidis la brilan oron,
decideme kubjete
volis pli prete.

Subuloj

sub lia ordon'
jen donis al Afanti
kestojn da or' el reĝ-dom'
por urĝa bezon'.

Afanti
post hejmenreven'
redonis la pruntitan,
disdonis oron kun ben'
al povruloj jen.

Post semajn'
li kun trist-mien'
iris viziti reĝon
malĝoja kun man-malplen',
dronante en splen'.

La reĝo
ĉuis avide,
"Kial ne venis ĉaroj
kun oro ja laŭvide?
Diru rapide!"

"Ve al mi!"
Afanti plore
diris, "Ĉu vi ne vidis,
ke ne pluvis favore
eĉ unuhore.

La oro
semita tute
mortis ja pro sekeco.
Ni perdos absolute
ĉion ĝisnude!"

Eksplodis
la reĝ' pro koler'
kaj kriis, "Sensencaĵo!

Min vi trompis per malver'
jen pro malsincer'.

Diru nun,
kiel povus or'
formorti pro sekeco?
Ĉi ne similas al flor'
sen pluva likvor'."

Afanti
diris trankvile,
"Vi ne kredas tion, ĉu?
Do, kial vi facile
kredas delire

kreskadon
de or' post semad'?"
La reĝo tuj mutiĝis
desaponta sen parad'
kun vanga skarlat'.

**Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksforna poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).*

*** ĉina mezurunuo de pezo egala al duona kilogramo*



Stanislao M Esposito (Italia)



poeto, Stannislao M Esposito

En la kvieto de la brakumo de la tagiĝo,
Kie flustroj de la nokto mallaŭte paliĝas,
Soleco staras, solena graco,
En la silenta baletto, kiun la ombroj ludas.

Ununura animo en kontemplado,
Meze de la senĉesa rapideco de la mondo,
Trovas konsolon en la senmova kreaĵo,
Kvieta, neĝenata spaco.

Soleco, silenta gardostaranto,
Gardante pensojn, kiuj liberaj vagas,
En la vasta katedralo de la menso,
Koro de ermito trovas sian hejmon.

Ne estas soleco, kiu loĝas ene,
Sed paca, elektita izoliteco,
Momento por pensi, por komenci,
Akcepti la trankvilan konversacion de si mem.

En la kompanio de la propra spirito,
Respondoj floras kiel floroj en la menso,
Kaj kvankam la mondo eble ne aŭdas ĝin,
En soleco ni trovas veran pacon.

kiam soleco renkontas amon
vi neniam estas sola



Luiza Carol (Israelo)

Saluto trans jarcentoj

(laŭ ĉinstila “7-silaba versoko”)

Inspirita de la poemo “Sur boato en luna nokto” de DAI Fugu*



Dai Fugu

En svisa Alpmontaro
 apud lag' mi sidiĝas.
 Sub la arĝenta luno
 la lag' spegula iĝas.
 Mia anim' salutas
 DAI Fugu-n trans la jaroj,
 trans lingvoj, trans landlimoj,
 trans montoj kaj trans maroj.

Revivigi antikvan
 kutimon de verkado
 ŝajnas al mi vojaĝo
 sur la transtempa pado,
 por renkonti animojn
 en malproksima loko.
 Fariĝas varmsaluto
 sepsilaba versoko.

* *DAI Fugu – ĉina poeto (1167-1252?). Lian nomon oni prononcas trisilabe: dai fu-gu. La lastaj du silaboj estas lia persona nomo, kiu signifas “revivigi antikvajn morojn”.*

Dai Fugu (1167 – 1248)

Sur boato en luna nokto

La boato saturita de lunlumo
 Dronas kvazaŭ en etero.
 La helverda akvo glate senondeta
 Spiras froston en aero.

Mia poezia patosemo flosas
 Ombre de la mastoj hante,
 Kaj la lirikismo drivas en la plaŭdo
 De remiloj songolande.

Tiuj surĉielaj steloj sin spegulas
 Sur freŝverda lago sole;
 Krias sovaĝaj anseroj en akv-herboj
 Kontraŭ la vento gakplore.

Kelkaj ŝiplanternoj flagras ĉe l' pramejo,
 Kiu de pratemp' ekzistas;
 Gutas rosoj de platanoj ĉe l' rompita
 Ponto, kiu ja persistas.

elĉinigiŝ Minosun

Vojaĝante en Rumanio, mia naskiĝlando

(laŭ ĉinstila "7-silaba versokvaro")

*Inspirita de la poemoj "Improvizaĵo pri rehejmiĝo" 1 kaj 2 de HE Zhizhang**



He Zhizhang

Amikino ĝojiĝas
 kaj ŝi min bonvenigas.
 Ni kune babiladas
 kaj ame nostalgias.

Mi ne ricevis floron
 kiu perdus koloron,
 poste velkus rapide,
 tristigus mian koron,

sed, kiel bonvensignon
 ricevis mi la tigon
 de ĉarma timiano.
 Ekhavos ĝi radikon

en la hotela taso,
 sur la hotelteraso.
 Mi povos ĝin karesi
 sen pensi pri forlaso,

ĉar kiam mi foriros,
 ni fakte ne disiĝos:
 ĉe mia hejm' radikojn
 la tig' evoluigos.

La ĝoj' de la vojaĝo
 plu vivos sen damaĝo
 pro delikata planto
 kun forto kaj kuraĝo.

** HE Zhizhang – ĉina poeto (659-744). Lian nomon oni prononcas trisilabe: ĥe ĝi-ĝang. La unua silabo estas lia familia nomo kaj signifas “gratulo”; la aliaj du silaboj estas lia persona nomo, kiu signifas “distingi inter delikataj objektoj”.*

He Zhizhang (659-744)

Improvizado pri rehejmiĝo

1.

Foriro en juneco, reven' en alta aĝo;
 Ŝanĝiĝis ĉio krom la akĉento de l' vilaĝo.
 Infanoj min ne konas kaj ride pridemandas:
 “De kie vi alvenas, aveto en vojaĝo?”

2.

De post forlas' de hejmo jam pasis multaj jaroj,
 Dum kiuj konsumiĝis plejparte homaj faroj.
 Nur l' antaŭporda lago ebena ne ŝanĝiĝis, -
 Ankoraŭ ĝin karesas printempaj ond-muaroj.

trad. Minosun

Songô pri mia kara forpasinta plantoterapiisto

(laŭ ĉinstila “5-silaba versokvaro”)

Inspirita de la poemo “Sensukcesa vizito al ermito” de JIA Dao*



En songô' li venis,
tetason tenis.
Li el nubinsul'
min ame benis.

Jia Dao

* JIA Dao – ĉina poeto (779-843). Lian nomon oni prononcas dusilabe: ĝja daŭ. La unua silabo estas lia familia nomo kiu signifas “komercisto” aŭ “komerco”. La dua silabo estas lia persona nomo, kiu signifas “insulo”.

Jia Dao (779-843)

Sensukcesa vizito al ermito

Sub pino mi demandas servoknabon,
Li diras: “Majstro iris al montaro
Kolekti drogoherbojn; vi ne povas
Lin trovi pro l’ profunda nubomaro.”

trad. Minosun



Rovere Emanuele (Italio)



tradukinto, Rovere Emanuele

Kvin kanttekstoj

Io stulta

Muziko / vortoj: C. Carson Parks

MI tenos vin ĉe l'telefono ĝis vi diros "kunestos ni dum vesper",
sed timas mi, ke, por vin akompani hejmen el dancejo, vanas l'esper'.
Prefere en drinkejo ĉarma sidos, frandos glason ni da dolĉa vin'
kaj poste ĉion fuŝos mi, dirante ion stultan kiel "mi amas vin".

Jes, mi scias, ke vi malestimas preskaŭ ĉion, kion faras mi por vi;
vi volas nur novaĵojn kaj vi diras, ke al mi eĉ mankas fantazi'.

Senĉese mi baraktas por elpensi por vi frazojn de belega signif',
sed poste ne kuraĝas ilin diri, eble taŭgus kelka nova modif'.
Perfektas nun l'etos', magia nokt', parfum' de floroj ebriiĝas min,
sed eble ĉion fuŝos mi, dirante la stultaĵon, ke mi amas vin.

Senĉese mi baraktas por elpensi belajn frazojn plensignifajn por vi,
sed poste ne kuraĝas ilin diri, restas ili, do, kaŝitaj en mi.

Perfektas nun l'etos', magia nokt', parfum' de floroj ebrigiigas
 min,
 sed eble ĉion fuŝos mi, dirante la stultaĵon, ke mi amas vin.
 Mi amas vin, mi amas vin...

Animo mia

Muziko / vortoj: I. Michetti

Nudpiede ŝi paŝadis sur la stratoj, la mondon rigardante kun defio,
 por enkateni virojn apud sin: min vidis, kvazaŭ ombro sekvis min.
 Enkore havis ŝi mevoflugadojn, surkorpe signojn de akra sufer',
 en la okuloj timon pri l' morgaŭo: naive mi enamiĝis kun sincer'.
 Kutimis dormi ŝi ĉe mia flanko, spirado ŝia fandiĝis kun la mia;
 vestaĵoj ŝiaj nun restas en la ŝranko, ankoraŭ ŝvebas la parfumo ŝia.

Animo mia, revenu vian hejmon,
 atendos mi ĝis ekĉerpiĝos mia forto.

(mi vin atendos ĝis mi havos vivoemon.)

Animo mia, en nia dormoĉambro
 la lito restas same kiel vi lasis ĝin.

Mi volus koni nur kie nun ŝi estas, ĉu trovis amon ŝi pli veran ol mi,
 ("vi" anstataŭ "ŝi")

ĉu, nokte, ankoraŭ ŝi malvarmon sentas, ĉu frizmanieron eble ŝanĝis
 ŝi.

("vi" anstataŭ "ŝi")

Animo mia, revenu nian hejmon,
 atendos mi ĝis elĉerpiĝos mia forto.

Animo mia, en nia dormoĉambro, la lito restas same kiel vi lasis ĝin.

Ĉu enamiĝi

Muziko / vortoj: E. Rovere (Manŭel)

Ĉu enamiĝi? Estas nenio por fari
 por ne resanigebla romantikul',
 kiu pri sentoj ne kapabkas avari
 kaj ĉiam restos idealisma bonul'.

Do, enamiĝi...La fato tiel decidis,
se li renkontas inon, kia vi,
en kiu li, kun naiveco, ekvidas
la ĉarmon de anĝelo de l'edeno.

Amoiluziigoj revekiĝos ĉiuj,
promesoj viaj al li ŝajnos pura roso.
Ĝis kiam pulsos kor', ĝis la plej lasta spir'
li estos la kaptito de via dezir':
vi l'ideal', plej bela rev' realiĝinta.

Enamiĝinta... Perfingre tuŝi l'ĉielon,
provi la plej mirindan, varman senton.
Li vidas lumon funde de tunelo,
cerbo kaj koro perdas la prudenton.

Projektoj por l'estont': vi estos lia mond',
en manojn viajn metos li siajn esperojn.
Sed se, hazarde, via koro perfidos lin,
ŝajnos al li, ke venos tuj la mondo fin',
li ne plu havos emon, ne kapablos plu

reenamiĝi... Alian fojon, neniam!,
ĉar vi forŝtelis la animon lian.
Li sentos sin estaĵo senvalora,
sen plu eĉ unu revo, malespera.

Sed tempo vundojn liajn resanigos,
l'espero vivovolon retrovigos,
ĉar elĉerpiĝos Amo, ja neniam!
Vivu la vivo, tamen bela ĉiam!

Pluvas

Muziko / vortoj: ED. Verde / D. Modugno

Mil violonoj ludataj de l'vento,
ĉiuj koloroj de l' ĉielarko

kuniĝas formi pluvon arĝentan,
sed pluvas, pluvas sur nian amon.

“Ciao, ciao * bambina”, ankoraŭ kison
poste por ĉiam mi perdos vin.
Kiel fabelo amo transiras,
ekzistis iam, jam nun ne plu.
Kio nun tremas sur viaj vangoj,
ĉu pluvo, larmoj? Klarigu al mi.
Mi volus trovi esprimojn novajn
sed, sub la pluvo, ploras kun vi.
“Ciao, ciao * bambina”, nun ne turniĝu,
mi volus diri: restu kun mi;
sed mi ne trovas la taŭgajn vortojn,
dum pluvas, pluvas sur nian amon.

**prononco: ĉjaŭ*

Mi vagabondo

Muziko / vortoj: D. Dattoli / A. Salerno

Mi plenkreskos iun tagon, la ĉielon de la vivo mi flugtuŝos.
Sed, infano, mi ne konis, ke ne ĉian realiĝas niaj revoj.
Poste mi ekiris mian vojon dum vesper’.
Venteto tra l’hararo, survizaĝe la brileto de la steloj;
tuj malaperis hejmo mia kaj la infano, kiu ludadis en ĝardeno.

Mi, vagabondo estas mi, vagabondo kaj nenio alia,
kun senmona poŝo mia, tamen min akompanas Dio.

Jes, la mondo min allogas, sed urbegoj al mi ŝajnas senanimaj.
La tempo memorojn miajn forviŝas, sed pri mia familio tute ne.
Poste mi vekigis dun decembra sunleviĝ’,
la fajro de kameno plivarmigas ol la suno de l’mateno:
sopiris mi al hejmo mia, tamen restas mi perdita tra la mondo.

Mi, vagabondo estas mi, vagabondo kaj nenio alia,
kun senmona poŝo mia, tamen min akompanas Dio.
Vagabondo, civitano de la mondo!
Esperantisto, ne kuracebla idealisto!

Zhao Yinghuan (1969-)



poeto, Zhao Yinghuan

*Zhao Yinghuan, nomata “poeto sur radseĝo” .
Kiam li estis 17-jara, li suferis de alta paraplegio.
Kaj li persistis en studado kaj verkado en malfacila
medio. Ĝis nun li jam verkis pli ol mil poemojn, kiuj
publikigis en diversaj revuoj.*

Pento

kiam mi estis burĝono
vi jam estis matura folio
vi soife atendis mian ovriĝon
sed miaj hontemaj petaloj ree femiĝis

dum atendo vi lante velkiĝis kaj falis
mi tamen fariĝis plej bela floro
abeloj alkroĉiĝeme kantis laŭdojn
papilioj leĝere dancis ĉirkaŭ mi

en ventpluvo mi larmis kun pentemo
ĉu vi scias pri miaj soleco kaj tristo
mi mistrafis hieraŭon kontraŭvole
morgaŭ mi velkos kaj enteriĝos

ni ĉagrene nun renkontiĝas sub la tero
sed vi jam ne estas vi, mi ne plu mi
ĉu vi ankoraŭ kovas pasintan amsenton
kaj pardonas al mi mian kulpon

Sentitole

alian nokton en sendormeco
mi kunas kun soleco

en kvieto mi rigardas al la ĉielo
kirliganta en sufoka aero

eĉ steloj sur nokta ĉielo
ŝirmiĝas per griza nubaro

nokta birdo alflugas
pripepante iom da forlasiteco

varma teo jam malvarmiĝis
neniu babilas kun mi en ĝojo

eĉ la lamplumo tra fenestro
verŝas palan tristecon

ĉi-nokte mi sendormas
mi diru bonan nokton al mi mem

senrezulto estas rezulto
neperfekteco estas perfekteco

Ĉar vi foras tre tre

ĉar vi foras tre tre
mi lasu tiun tufon da leontodoj
kreski ĉe la heĝo ekster la pordo
por bonvenigi vian hejmenrevenon

por bonvenigi vian hejmrevenon
ili kreskas tre tre rapide
ili floras kaj falas, denove floras kaj falas
ili jam kadukiĝas en amsopiro

ili jam kadukiĝas en amsopiro
ankoraŭ ne aŭdiĝas viaj paŝoj
mi soifas, ke venu la rapida vento
forportu tiun purblankan amsopiron
flugu al ĉiela ekstremo kaj mara fino
por vin serĉi

Ŝtormpluvo kaj kampuloj

Impetantaj sagoj pafiĝas al grenplantaĵoj. Tiuj ne havas rezistpovon kaj falas aron post aro!

La antaŭa inerta rojo nun laŭtigas sian bruon, furioze krianta kaj superverŝas la digon. La grenplantaĵoj estas eltirataj kaj ekzilataj.

Aĥ, rojo, kien via kutima mildeco perdiĝis?

Malsekaj vundoj kaj doloroj kovras la koron de kampuloj! Ili, ĉe la pordo de la domo, silente kuraĝigas tiujn kelkajn grenplantaĵojn, kiuj tuj falos. Kaj fine ili senforte falas teren.

Tiam ĉe tia sceno la kampuloj tre deziras, ke ili fariĝu alta digoj!

Ĉu nur genplantaĵoj dronas en sufero? Nuda grundo imagas silente pri sia antaŭa propra figuro.

Tiuj ravinoj sin montras kiel traŭmataj vundoj!

Granplantaĵoj estas sopiro de la tero, kaj la tero la espero de kampuloj, kiuj tre ĉagreniĝas fronte al la ruinigitaj tero kaj grenplantaĵoj!

Aĥ, ŝtormpluvo! vi povas ruinigi la teron kaj grenplantaĵojn, sed neniam la karakteron de la laboremaj kaj pendefiaj kampuloj!

La inklinemo al verdigo ĉiam loĝas en ilia koro!

Jen vidu. Dum mallonga tempo denove videblas la piedspuroj en la kampoj kaj iliaj figuroj irantaj tien kaj tien!

La kampuloj vere estas kampuloj. Ili scias, kion ili devas fari post ŝtormpluvo!

elĉinigis Yanke

Shu Ting (1952-)



poetino, Shu Ting

Al kverko

Se mi amas vin –
 Mi, absolute ne kiel grimpanta trumpetfloro,
 Paradas per viaj altaj frondoj;
 Se mi amas vin –
 Mi, rezolute ne kiel birdo freneze amanta,
 Ripetas monotonan kanton por verda ombro;
 Mi agas ne nur kiel fonto

Kiu portas dumjare friskan konsolon;
 Ne nur kiel pejzaĝa montpinto
 Kiu reliefigas vian alton kaj imponecon,
 Sed ankaŭ kiel sunradioj,
 Kaj kiel printempa pluvo.
 Ne, eĉ tiuj ankoraŭ ne sufiĉas!
 Mi devas esti kapokarbo ĉe vi,
 Kaj, kiel figuro de arbo, kune staras kun vi.
 La radikoj firme sin tenas subtere
 La folioj palpas sin ennube.
 En ĉiu trablovo
 Ili salutas unu la alian,
 Sed neniu
 Komprenas nian lingvon.
 Vi havas viajn kuprajn branĉojn kaj ferajn trunkojn,
 Kiel tranĉilojn, kiel glaĵojn,
 Ankaŭ kiel halebardojn;
 Mi havas miajn ruĝajn florojn grandajn
 Kiel pezan suspiron,
 Ankaŭ kiel bravajn flamantajn torĉojn.
 Ni dividu malvarman ondon, ŝtormon kaj fulmofajron;
 Ni kunĝuu nebulon, fluantan brumon kaj buntan ĉielarkon.
 Ni kvazaŭ estas eterne disigitaj,
 Sed dumvive ĉiam interdependaj.

Tio ja estas granda amo,
La lojaleco restas en tio: ne nur ami vian imponan korpon,
Sed ankaŭ la pozicion de vi okupitan kaj la teron sub viaj
piedoj.

Al la nordo

Unu frusomera rozo
Traplektrante la kordojn de la ondoj
Veladas al la neatingebla horizonto
La facio de la ĉielo
Estas plene kovrita de nigraj nuboj kiel favajoj
Sed aro da mevoj
Etendas por ŝi siajn purblankajn flugilojn
Alvelu
Mia malgranda suno dezirata
Se vi sinkos
Do dormu sur la sino de la maro
Sur la arĝenta baldakeno meduza
Eterne bruas verdaj ondoj
Lasu min ankaŭ alflasi
Lasu ke la vento kvietigita de la sunradioj
Leĝere min blovosendu
Laŭ la mara fluo
Al la nordo

Malfruaŭtuna vespero en Pekino

1

La nokto, etendiĝanta trans la kordonon de stratlampoj,
Sin ĵetas por estingi la konstelacion
Sekvas ĝin vento kaj, tremigante ĉiun areton da poploj,
Eligas bruon kvazaŭ de tajdo
Ankaŭ ni iru batali por la ĉielo
Aŭ esti peco de malgranda folio
Por eĥi la kanton de la arbaro

2

Mi ne timas, ke mi aspektas malforta antaŭ vi
Lasu, ke la altrapida aŭtofluo
Disrompu la dignon de la urbo
En la mondo sur via ŝultro
Estas sekura paco
La reflektoroj trapikas la nokton
Sur la oranĝa horizonto
Ni estas tre solaj
Kaj tamen ĝuste mia febla figuro
Staras kun vi

3

Kiam vi estas nur vi mem
Kaj mi nur mi mem
Ni kverelas
Kaj repaciĝas
Jen paro da ekstravagancaj amikoj
Kiam vi ne plu estas kia vi estis
Kaj mi ne plu kondutas kiel mi agis
Inter niaj brakoj
Ne estas breĉeto
Nek kontaktpunkto

4

Se ne ekzistus vi
Se mi ne estus en fremda lando
Pluva nebulo, falantaj folioj, piedaj sonoj
Se ne necesus klarigo
Se ne neprus sindefendo
Stratopalisoj, zebrostrioj, trafika bastono
Se ne estus intervidiĝo
Se renkontiĝo povus esti forgesita
Silento, ombro, longa tempo

5

Mi sentas: ĉi momento
Lante malaperas

Kaj iĝas paseo
Kaj memoro
Via rideto flagranta
Flosas en grandaj larmoj
Mi sentas: inter hodiaŭa kaj morgaŭa noktoj
Ekzistas longlonga vivo
Koro kaj koro, post kiom da jaroj da vojaĝo,
povos renkontiĝi en la alia fino de la mondo
Mi volas peti, ke vi haltu
Sub stratlampo
Mi silente nur deturnas mian vizaĝon

6

La nokto post vi kunfandiĝas
Vi iras al la nokta ĉielo
Kio fariĝas nesolvebla enigmo
Unu frosta larmoguto
Pendas sur la “eterna” vizaĝo
Kaj sin kaŝas en mia songo postvivanta

elĉinigi Minosun



Doruntina Ramadani



Mi kaj mia peza valizo

Ni foriras malrapide, ni kolektas miajn kozojn kaj ekiras kun malplena koro kaj larmaj okuloj!

Ankaŭ mi foriras, samkiel foriris mia patro, kun la koro pec-pece kaj sen ia fiero survojis plurfoje, pro kio mi ĉiam lin malbenis!

albana poetino Doruntina Ramadani

Hodiaŭ mi ekiras lian vojon, sed do kiu malbenos min?

Ankaŭ mi foriras, samkiel foriris ankaŭ mia amanto tra la mornaj senvivaj vojoj, laca kaj elĉerpita!

Kiam li estis foririnta, li kunportis korpecon mian, la alian pecon li ellasis, tial mi vagadis tien - ĉi tien ĝis kiam mi enpakigis la valizon kaj ekiris al lia direkto.

Ankaŭ mi foriras, kun diploma en la valizo, kun du tri atestiloj pri fremdlingvaj kursoj, kun riĉa CV kiujn ĉiujn mi esprimas per ununura vorto: "elmigranto".


Mi foriras kun la foto de mia patrino, kies aprobon mi ne kredis ke mi akirus forlasante ŝin, tamen mi decidis jam foriri!

Mi foriras, kun la kapo malsupren, ĉar mi lasas ĉi tie animpartojn, por kiuj mi ege aspiros!

Mi foriras por kreski, tion mi diras ĉar la homo eliras el sia hejmo nur kiam li sentas ke li povas sin vivteni kaj mi, por konsoli mian estaĵon, ne diras ke mi foriras por pli bona vivo.

Je diablo, mi foriras iom pro favoro kaj iom pro plezuro! Pardonu min por ambaŭ, sed mi sufiĉe multe vojaĝis dum la vivo kaj mia memo estas postulante alian kozon kaj mi tiel transdoniĝas al la vento!

Anita Hoxha



Tro malfrue

Al la amo, pri vi, mi skribas..

Ĉiu vorto, nostalgia larmero estas !

Bela, kiel viaj okuloj, la solecon mi pentras

Nia ĉirkaŭbrako, kvazaŭ ombro flirtas!

albana poetino Anita Hoxha

Mi ne benas la tagon, kiam vi revenis,
Nek mi enuas pro la tago, kiam vi foriris...
La vivo, kvazaŭ teatro, kurtenon sur nin aljetis,
Kaj la tempo, glacian muron starigis..!

Estas tro malfrue, mi ne plu povas ami vin!
Via voĉo en mia animo, estingiĝis kvazaŭ kandelon...
Vi, la kialo ke ĉi tiu mondo bela ŝajnis min,
La birdoj, kantas pri vi, pri mi, nostalgian kanzonon!

Noktaj memoraĵoj...

Delonge la gepatran domon mi vendis
Pensis mi, ili ne plu bezonas ĝin, ĉar elmigris...
Memorante, mi frostiĝis kaj ekploris!
Kia tristeco por la infanoj, kies gepatroj foriris!

La malnovan domon mi vendis por iun novan aĉeti,
Pensis mi, revenonte, ili feliĉaj tie vivi,
La ŝlosilojn al la novaj dommastroj, mi donis:
- Bonfartu vi, ili min aŭguris, ĝuu ĝin, mi rediris!

Pasis kelkaj tagoj kaj la telefonsonorilo
vekis min dum la noktomezo...
- Pardonu nin, mi aŭdis kaj restis mirigita..!
Diras la dommastro ke:- Ĉi tie ĉiunokte,
Eta knabino ploras, kvazaŭ ĵus vekigiĝinta!

Eble, pensis mi, dum momento, mia infanaĝeco,
Estas restinta tie, enŝlositaj, miaj vivjaroj...!
Kiom da memoraĵoj, alvokantaj el tiu vivo,
Kiom da nostalgio por la foririntaj gepatroj!

Al la gepatra domo, en la mallumo, mi hastas
-mi monon redonos, miaj amikoj, mi la domon bezonas..
Tiu eta knabino, ploranta ĉiunokte, mi ja estas
Kaj la aŭditaj paŝoj, la frato kaj miaj fratinoj estas..!

Tial oni ne povas peki kun la gepatra domo!
Mi neniam plu ĝin al iu ajn vendos,
Ĉar tra la ĉambroj vagadas mia infanaĝeco...
Kiomfoje mi nostalgios, tie mi ĝin vokos!

Se

Se mian parolon oni forprenos
Kaj mi paroli plu ne kapablos,
Al la mondo per la okuloj mi parolos...
Lumon de via okulo mi ricevos!
Se min de la korpo oni senigos,
Ke mi ne ekzistas min oni aldiros
Ne kredu ĝin, tio fablo estos...
Mi, ene de via korpo ja estos!
Se iutage oni min enmurigos
Al ŝtono, aŭ al roko, mi turniĝos,
Sed mi ne malaperos, ne forgesiĝos.
Animo en via animo mi fariĝos!

La gepatroj

Maljuniĝis la gepatroj, ili kliniĝis,
Ŝrumpis ili kaj unu mano restis...
La faltoj sur la frunto sin kaŝis
Kvazaŭ neĝo, la haroj blankiĝi,!
Maljuniĝis la gepatroj, al infanoj ili turniĝis
La tempo por ili ja ŝanĝiĝis
Mi ilin rememoras ĉiam, tiel junaj...
Kiam ankaŭ mi ĝoja infano ja estis!
Ĉi tiuj miklaceoj, de Dio kreitaj
Ĉi tiujn idoloj, al kiu ni preĝas ĉiutage
Ĉi tiuj grandiozuloj, kiuj niajn erarojn akceptis
Ĉi tiuj, kiuj la animon donace havas de la dioj!
Maljuniĝis la gefratoj, mi ne plu vidi ilin povas
Pro ĉiu ties faltoj, mi kulpulo sentiĝas ...
Ili anĝeloj ĉiutempe plurestos
Ankaŭ kiam la paradizo siajn pordojn por ili malfermos!

Mia patrino

Mia patrino rare, tre rare ridis
 Kiam ŝi ridis, nia hejmo je lumo pleniĝis!
 Kiam la sekigitaj floroj pro la vintro, vivenspiris...
 Per sia voĉo tutajn bonecojn ŝi disdonis.
 Mia patrino rare, tre rare ridis...
 Tiel kiel mi, vidi ŝin ridante, sopiris,
 Mia patrino kun flikita palto kaj maldika ŝalo...
 Ŝajnis kvazaŭ surkorpe ŝia vestita, estis la printempo!
 Mia patrino rare, tre rare ridis...
 Ŝia rideto eĥadas tra la malnova hejmo
 Mia patrino portis zorgojn surdorse, kvazaŭ monto!
 Tiom kiom ne sufiĉus jaroj por ilin surpaperigi.
 Ĉi tiuj folioj, falantaj unu post la alia al la fenestro
 En miaj memoroj restis tiu eta domo,
 Kiu, karesante mian hararon...ŝin portas
 Kiel sorĉeco, al mia animo, rara, gaja ŝi venas...!

Alskribu min leteron...

Alskribu min leteron, mi petas
 Estu ĝi simpla nur por mi volas...
 Kaj ne jetu ĵaluzdubojn en ĝin,
 Nur diru, ke vi sopiras kaj amas!

Alskribu min leteron, kelkaj literojn...kelkaj vortojn!
 Alskribu, en vicoj la animajn sopirojn...
 Por ke mi legu ĝin malrapide, dum mia soleco,
 Ĉe la fenestroj, dum la brua aŭtuna ekploredo!

Alskribu min letetron, laŭ via eblo
 Por ke mi pentru ne diritajn kisojn en la ĉirkaŭo...
 Kaj ne perdiĝu en la memoroj, kvazau infano,
 Alskribu min leteron, de foro...!



elalbanigis

Bardhyl Selimi (Albanio)

Li Qingzhao (1084-1151)



Sep ci-poemoj

Li Qingzhao (ĉingĝaŭ), fama ci-poetino de Song-dinastio, Ĉinio. Ŝiaj ci-poemoj karakteriziĝas per la stilo de subtileco kaj koncizeco kaj estis reprezentanto de la skolo de tia stilo en tiama poezia rondo.

ci-poetino, Li Ĉingĝaŭ

**Ci estas unika ĝenro kun fiksfirma skemo en ĉina antikva poezio. Ĝi aperis en Tang-dinastio (618-907) kaj prosperis en Song-dinastio (960-1279). Ci ĉiam tenas la formon de longaj kaj mallongaj verslinioj. Origine Ci povis esti enmetata en melodion por kantado. Post longa tempdaŭro la melodio perdiĝis kaj restis nur kantteksto—ci-poemo.*

Festo de Duobla Naŭo

—laŭ melodio *Ebrio sub ombro de floroj*

Densaj nuboj kaj nebul' maldensa
 ĉiam kloŝas en taglumo
 super mi kun ĝenaj splenoj.
 En la leon-forma incensujo fumo
 jen spiralas alten kun leĝero.
 Nun okazas Fest' de Duobla Naŭo*
 de ĉi tiu jaro per kultado en ofero.
 Porcelana kapkuseno,
 gaza kulvualo malvarmiĝas
 en meznokto kun fridflua veno.

Mi vespere trinkis vinon
 ĉe barilo orienta, kie floroj
 krizantemaj pompas,
 sur manikoj miaj bonodoroj

striaĵ kaŝe elspiriĝas.
 Sciu, fakte vere mi ja en sopiro
 al vi ĉiam kun suspiro.
 L' okcidenta vento levas
 pordkurtenon jen kaj jen
 kaj vidigas miajn vangojn
 pli malgrasajn ol flavfloroj en ĝarden'.

** La tago estas la naŭa de la naŭa monato laŭ la ĉina lunkalendaro. Dum tiu tago oni kultas al prapatroj kaj dediĉas respekton al maljunuloj.*

—laŭ melodio *Flutado sur teraso*

Incensiloj brulis jam ĝis cindro
 en la leonforma incensujo el metalo.
 Ruĝa litkovril' masiĝas onde en la lito
 kaj mi ja malemas fari kombon al hararo.
 La tualettabl' kovriĝas jam per polvo
 ŝajne forlasita en la buduaro.
 La sunlum' filtriĝas kaj prilumas
 jam sur hokojn de la kulvualo.
 Multe da kor-vortoj volas mi elverŝi,
 sed mi ne eldiri pro ĉagrena baro.
 Lastatempe malgrasiĝas mi ostece
 ne pro la drinkado gluta per pokalo,
 nek pro invadado de l' trista vento
 de l' aŭtuno kun susura folifalo.

Lasu do, ve, lasu do!
 Eĉ mi kantas fojojn mil kaj mil
 la kanzonon “*La ĉagreno de disiĝo*”,
 mi ne povas vin reteni de forir',
 ĉar vi devas ja plenumi l' devon.
 Mi sopiras al vi kun suspir'
 en malplena mia buduaro.
 Fiksrigardas mi la rojon, sen konsil',
 lirl-fluantan antaŭ la fenestro.
 Ĝi respondas nur al mia maltrankvil'
 pri vi en distanco malproksima.
 Mia spleno des pli kreskas kun kor-tril'.

—laŭ melodio *Branĉo da umefloro*

Ruĝaj lotusfloroj velkis
kaj forsvenis ĝis sen bonodor',
La bambua mat' elspiras la aŭtunan fridon,
kiu mordas min en ĉi-hor'.
Mi leĝere ŝanĝas veston
al maldika silka robo por
remi la boaton sola.
Kiu povus sendi al mi vorton
per numero el la for'?'
Kiam la sovaĝanser' revenas,
jam troviĝas etaĝdomo en lunglor'.

Floroj falas jen laŭplaĉe
kaj rivero fluas kontraŭ homa vol'.
Sopiremo samas en du lokoj,
sed ĉagrenojn vekas sen ignor'.
Mi neniel povas min senigi
je la spleno de disiĝ-dolor',
kiu ĵus vanuis el la frunto
kaj nun jam inundas en la kor'.

—laŭ melodio *Perdrika ĉielo*

Sunlum' de l' aŭtuno malvarma
surrampas la ŝprosojn jen ŝtele,
platan' senfolia malamas lastnoktan
blank-prujnon altrudan kruele.
Por teni min sobra mi emas
trinketi la dikan teakvon ja ebriopele.
Se mi, ve, vekigigas el songo rompita
preferas mi fumon incensan
pacigi trankvile tenere.

Aŭtun' al la fin' jam aliras,
sed same ja longas la tago.
Mi vere min sentas pli trista,

mizera ol la vagabondo en vago.
Volontas mi min ebrigi
plaŭplaĉe kun menso en svago,
alfronte al flavaj floretoj en pompo
ĉe l' heĝ' orienta kun arom-atako.

—**laŭ melodio *Lanta sontreniĝo***

Mi serĉas, serĉas kion jam perdiĝis,
en frido, en mallum' malplena.
Mi sentas min mizera, forlasita
kun koro afliktita kaj plenĝena.
Ankoraŭ la restanta frid' persistas,
malfacilas teni min bonfarta kaj sensplena.
Du aŭ tri tasoĵ da alkoholaĵ' neniel povas
rezisti kontraŭ l' vento rapid-vena.
Sovaĝanseroj preterflugas suden, kiuj
jam ne rekonas min en dolor' ĉagrena.

Velkintaj floroj amasiĝas sur la tero,
magriĝas ankaŭ mi kun sent' korsiĉa.
Kiu ankoraŭ emas pluki florojn
kun bonhumor' dezira?
Ĉe la fenestro mi pasigas tempon,
ĝis noktalveno en atendo maltrankvila.
Vespere pluvo batas la foliojn de platanoj,
tiktake kontraŭ mia koro jam subtila.
Kiel mi povus nomi tiun senton,
krom afliktiĝo, la ĉagren' suspira?

—**laŭ melodio *Budhista dancisto***

Vento milde blovas,
suno brilas pale,
fru-printempo ĵusas.
Mi min sentas joviale
bonhumora kun maldika vesto.
Post vekiĝo mi sentimentale
jen ekhavas malvarmeton,

l' umefloro interhare
 jam senvive velkis
 kaj ŝrumpiĝis ŝancel-stare.

Kie estas la hejmloko,
 ho, hejmloko mia kara?
 Nur ĝin mi forgesas,
 kiam mi senprepara
 ebriiĝas kiel maso.
 Incensfum' spirala
 dispeliĝas jam senspure,
 sed ankoraŭ la amara
 hejmsopiro dronas
 en alkoholaĵ' fatala.

—laŭ melodio *Kvazaŭsonĝe*

La ekskurs' al Fonto Xiting (*ŝiting*)
 ofte venas al mi en memor':
 mi min distris tie ĝis vespero,
 forgesante pri l' revena hor'.
 Kiam mi veturis per boato,
 vojeraris mi kun stupor'
 ja profunden inter lotusfloroj.
 Mi barakte remis jen per penlabor',
 forte remis, akvaj birdoj sur sablbenko
 en paniko flugis al ĉielo sor.

elĉinigis Eto



Xi Murong (1943—)



poetino, Xi Murong

Xi Murong naskiĝis en Sichuan-provinco, Ĉinio kaj plenkreskis en Tajvano de Ĉinio. Ŝi estas moderna fama pentristino, poetino kaj prozistino.

12 poemoj

Floranta Arbo

kiele renkontigi vin jen kun mi
en la momento kiam mi plej belas

por tion realigi
mi preĝis al Buda' jam kvin cent jarojn
por nia amligiĝo
Budao fine ŝanĝis min en arbon
kreskantan ĉe la vojo frekventita de vi

en la sunlumo
diskrete pompas floroj
—sopiroj miaj antaŭvivaj

proksimiĝante
vi aŭskultadu atenteme
foliojn tiujn tremetantajn
—atenda vervo mia

vi tamen preterpasis ignorante

la falintaĵojn post vi
amik'
aĥ, tiuj estas ne petaloj
sed mia koro velkiĝinta

Elekto

se mi venus al la mondo
nur por unufoja renkontiĝo kun vi
nur por la momento en dekmil lumjaroj
por la dolĉon, triston de l' momento ĝui

do, ĉio ĉi okazu
prezentiĝu dum momento
kapkline danku mi al ĉiuj steloj pro la helpo
por ke mi kaj vi renkontiĝiu
kaj jen disiĝu
laŭ la poem' far Dio
kaj maljuniĝu malrapide

Kredo

mi kredas ke l' esenc' de amo
egalas al pureco kaj mildec' de vivo
mi kredas jen al ĉiu
reflekt' kaj intersend' de lum' kaj ombro

mi kredas ke la floroj kovrantaj l' arbon
nur originas el la semo sola en glacineĝo
mi kredas ke en tri cent poemoj
nu, tio, kio prezentiĝas ripetfoje
'stas l' ununura vorto, kiun
ne elbuŝigis oni en juneco

mi kredas ĉion aranĝitan de l' Ĉielo
mi ankaŭ kredas, ke se vi volontos
postsekvi l' distan fonton de humilo
finfine ni interkomprenos

Kial

mi povas ŝlosi mian plumon. kial
ne povas ŝlosi amon kaj ĉagrenon

dum longa vivo, kial
ĉiam ĝoj' velkiĝas ĉe apero
la plej bela temp' forpasas plej rapide

Sopiro

fakte tio, kion mi sopiras
'stas nur tiu momenteto
mi neniam vin postulis
doni al mi vian tutan vivon

se ni renkontiĝus sur la montalio
plena je disfloraj gardenioj, se ni
havirus amon ardan foje antaŭ ol disiĝi
kiom ajn, do, longa vivo
estas nur nenio alia ol
la momento kurta
en rememoro nia

Adiaŭado

ne ĉiuj songoj jen sukcesas realiĝi
ne ĉiuj vortoj eblas aldiriti al vi
kaj memproĉo kaj pentado
profunde ĉiam plantiĝas en kore post forlaso via

laŭdire ĉiaj amvarioj en la mondo
finfine, ja malplenos
mi tamen penas tion perdi

kontraŭe tion ĉiam mi faradas
mistrafi jam morgaŭon disflorantan
kaj eble la hodiaŭon

hodiaŭ ripetiĝos la disiĝo sama
nekonatoj ni fariĝos poste
jen malproksime je mil lioj
en la krepusk' vespera
profunde mi la kapon klinos al vi

por mi prizorgu vin mem
ignoru l' onidiron, ke enmondaj amvarioj ĉiaj
finfine, finfine malplenos

Eterna disiĝo

Mi ne volas esti bariero
kaj ne volas
ke la larmoj
malsekigu tiujn plej karajn vangojn

do, en tiu ĉi malluma horo
mi kviete retiriĝas
pardonu, ke mi ne diris al vi adiaŭon
sed en la plej profundan kor-angulon
mi vin provas kaŝi
por ke neniu kaj nenia tempodaŭro
povu tuŝi vin
ĉe proksima la distanco

Jasmeno

jasmeno ŝajne
spitante ĉiajn sezonojn
ĉu tage aŭ ennokte

presentas kelkatempe siajn etajn
aromajn florburĝonojn

sopiro al vi
ŝajne en la sama maniero
ĉu tage aŭ ennokte
ekzistas en ĉiu
tranca penso

Vojkruciĝo

se mi vin amas el la koro
neniam mi forgesas

mi, kompreneble, devas
senemocie iri pluen
mi povas diri: kiel bela la vetero
la vent' karesas softe
kaj rideti lace povas ni en sunsubira lumo
mi povas diri: kiel ordinara l' vivo
sin trovas nek zigzagoj nek ĉagrenoj
sed se mi amas vin elkore
neniam mi forgesas

nu, ĝuste ĉe ĉi tiu vojkruciĝo
mi kaj vi, junaj, ŝvingis ĝisrevidon
por apartiĝi senrevenc

Artisto

penikon vi jam lavis pure per larmakvo via
por ke mi povu pentri pluvon sur lageto
ĉe tiu kor-angulo plena je aromo
lotuson nevelkeblan vi elĉizis por mi
homviv' similas songon ravan
mi amas
realon aŭ malplenon
nu, tio estas mia elekto

Senpenta homo

ŝi iam donis al mi
promeson dolĉan, mildan
la luno en la monto
prilumis, en l' arbaro, sian junan
kristalajn vangojn
per la moment' aroma, ŝi akiris ŝanĝe
solecon kaj melankolion mian nunan
en homamas' suferojn prikantanta
ĉu vere ŝi sciiĝas, ke mi restas
ankoraŭ tiu, kiu ja neniam pentas

Flora deksex-jara aĝo

en fremda urb' vekig'as mi
ĉe miaj lipoj via nom' ankoraŭ restas
jam mil-mil-mejlojn, kara mia, distas mi de vi
mi scias
nur unufoje okazas disflorad' dum la sezon' de deksex-jara
aĝo
sed mi alttaksas la pur-blankan baskon
la senton admiratan
dorlatan kaj konsolan
mi alte taksas la oritan song'anan reton
kiu min ŝirmas kontraŭ prujno en fremdloko
komprenas mi nun, amo estas vino
kiam vi drinkas, ĝi fariĝas kor-sopiro
en fremda urbo
mi levas vin-pokalon ĉiun nokte
min direktante al la aĝ' de dek ses jaroj

elĉinigi **Mandio** (*Ĉinio*)

Anonimulo

Najbaroj

plur-akta dramo

Ĉi rakonto okazas en la sama etaĝdomo rilatante al du najbaroj loĝantaj respektive sur la tria etaĝo. Supre loĝas Fangfang, sekretario de la ĉefo de kompanio. Ĉiutage ŝi revenas ebria tre malfrue en la nokto. Malsupre loĝas paro de novgeedzoj Roja kaj Brilo. Pro neŭrastenio Roja malfacile endormiĝas dum multaj jaroj. Roja havas problemon dum multaj jaroj. Kaj plie, se ŝi vekigās, ŝi ne plu povas eniri en la dormon. Fakte la najbaroj havas nenian rilaton, sed pro iliaj malsamaj situacioj okazas stranga afero.

Personoj:

Fangfang: ŝi povas fari ion ajn, se ŝi povas akiri monon. Ekster sia atendo ŝi enimplikiĝas en komploto kaj preskaŭ perdas sian vivon.

Roja: junulino gaja kaj aŭdaca, sed kun delikata penso.

Brilo: vera viro kun infaneca karaktero.

Granda frato, Drako kaj Oranĝo: friponoj laborantaj por iu organizaĵo.

Ĉefo: la estro de la kompanio, kie Fangfang laboras.

Sceno Unu

Personoj:

Fangfang

Roja

Brilo

Tempo: je la duono post la deka nokte

En la koridoro, ebria, Fangfang ŝancelpaŝe iras kun altkalkanaj ŝuoj, grimpas laŭ ŝtuparo al la kvara etaĝo, malfermas la pordon kaj eniras.

Malsupre en la loĝejo sur la tria etaĝo Roja kaj Brilo kuŝas sur la lito. Brilo jam endormiĝas, sed Roja, kun larĝigitaj okuloj, turniĝadas sur la lito, kovrante siajn orelojn per manoj pro sonoj elvenantaj el la kvara etaĝo. Kaj fine ŝi leviĝas al la sida pozo, sin ĵetas en klozeton, prenas ion malmolan kaj forte frapas la akvotubon kondukantan al la kvara etaĝo.

Tamen Fangfang ne zorgas pri la frapado. Kun bonhumoro ŝi eĉ ŝaltas muzikon kaj dancas kun kelkaj stumbloj sur mla planko. Ju pli Roja aŭskultas, des pli bruas la moviĝoj supre. Ĉe tio ŝi eksplodas de kolero. Ĵetante la eksteran veston sur la

ŝultrojn, ŝi elkuras ekstere.

Sceno Du

Personoj:

Fangfang

Roja

Tempo: je la deknua horo nokte

Ĉe la hejmo de Fangfang Roja brue frapas je la pordo. Pro sia ebrieco Fangfang senateneme malfermas la pordon.

Roja: Mi volas demandi, ĉu vi havas senton de publika moralo. Vi ne volas dormi, sed vi ne volas, ke aliaj ne dormu. Ĉiutage vi hejmenrevenas tre malfrue kaj faras grandan bruon. Ĉi-nokte vi agas troe, kaj vi eĉ dancas laŭ la muziko. Mi batas la akvotubon, sed vane. Mi vole nevole iras al via hejmo kaj ŝutas riproĉojn sur vi, ĉu vi sentas ĝojon pro tio?

Fangfang: (*eligas rukton*) Ho, estas vi, kiu frapas la akvotubon de mia hejmo dum ĉi tiuj tagoj, ĉu vi? Kial vi senĉese frapas la akvotubon? Ĉu vi estas ebria?

(*Roja estas ekster si de kolero, grimacante. Ŝi trenas Fangfang al la klozeto, malfermas duŝilon kaj ŝprucigas akvon sur ŝin, minace dirante, "Mi sobriĝu vin ebriulinon per malvarma akvo!"*)

Malsekigite de akvo, Fangfang jam estas preskaŭ mensklara. Ŝi puŝas Rojan eksteren kaj sidiĝinte sur la tero, eksplodas de ploro.

Roja ekstreme koleriĝas. Reveninte hejmen, ŝi prenis dormigan pilolon por paca dormo.)

Sceno Tri

Personoj:

Roja

Brilo

Tempo: je la duono post la deka de la sekvanta nokto

Roja paŝas tien kaj ĉi tien en la ĉambro, senĉese rigardante la horloĝon sur la muro, kvazaŭ atendante iun.

Brilo: Kara Roja, kio okazas al vi? Kial vi ankoraŭ ne enlitiĝas por dormo?

Roja: Ni atendu! Kial la virino supre ne faras sonojn ĉi-nokte?

Brilo: Ĉu ne estas pli bone, ke ŝi ne faras sonojn? Tiele vi povas havi bonan dormon. Ekde kiam ni transloĝiĝis ĉi tien, vi sendormas ĉiunokte. Hodiaŭ vi povas havi bonan dormon. Venu al la lito, bebo mia!

Roja: Neeble! Ni atendu ankoraŭ iom da tempo! Mi timas, ke, post kiam mi endormiĝos, se ŝi levos bruon, mi vekigōs kaj ne plu reendormiĝos. Hodiaŭ ni kune

rezistu kontraŭ la eventuala bruado, mia kara!

Brilo: Nu, vi atendas, mi iras prepari krevmaizo en mikroonda forno.

Kun levita kapo Roja atendas la bruon de supre. Post iom da tempo vere aŭdiĝas paŝbruo de kunŝuaj piedoj. Roja pensis en si, ke ŝia ĉambro estas tiom pura, kaj eĉ se ŝi invitas iun en sian ĉambro, ili devas demeti la ŝuojn. Ah, tiu abomeninda virino volas venĝi sin kontraŭ mi! Kia troa konduto! Ĝuste tiam subite aŭdiĝas inaj tragikaj krioj.

Tintas la mikroonda forno kaj la krevmaizo pretiĝas.

Sceno Kvar

Personoj:

Fangfang

Ĉefo de ŝia kompanio

Tempo: je la duono por la deka nokte

La aŭto de Ĉefo veturigas Fangfang Fangfang al la pordo de la etaĝdomo.

Ĉefo: Fangfang, ĉu vi jam ricevis, kion mi donis al vi antaŭ kelkaj tagoj?

Fangfang: Estu libera de zorgoj. Ĉion, kion vi konfidis al mi, mi plenumis bone. Jes, mi devas dankin pro mia promociiĝo. De nun mi ne plu estas la sekretario, kiu nur okupiĝas pri drinkado kun niaj klientoj!

Ĉefo: Estu trankvila. Kondiĉe, ke vi plenumas kion mi konfidas al vi fari, mi neniel profitigas vin malbone!

Fangfang: Dankon pro via aprezado al mi! (elaŭtiĝas.)

Sceno Kvin

personoj: ĉiuj roluloj escepte de Ĉefo

Tempo: je kvardek minutoj post la deka nokte

Malfermite la pordo, Fangfang demetis la ŝuojn kaj volante ĵeti la ŝuojn sur la tero, ŝi ekpensas pri la knabino, kiu loĝas sur la malsupra etaĝo. Ŝi malpeze metas la ŝuojn sur la teron. Ŝaltinte la lampon, ŝi trovis, ke la ĉambro estas traserĉita malorde, kaj ŝi pensas, ke ŝtelisto prirabis la ĉambron. Apenaŭ ŝi volas telefoni al la polico, elkuras tri viroj, unu el kiuj tenas pistolon. Ŝi eligas laŭtan krion pro konsterniĝo.

Aŭdinte la krion, Roja sentas, ke supraj moviĝoj pligrandiĝas kaj io malbona okazas. Kaj ŝi iras al la klozeto kaj aŭskultas, premante sian oreilon al la akvotubo.

Ĉe la pordo, manĝante krevmaizgrajnojn, Brilo ridas, rigardante Rojan.

Roja: Terure! Io malbona okazas supre!

Brilo: Kio okazas?

Roja: Venu kaj aŭskultu. Eble ŝtelisto trudas sin en ŝian hejmon. Ŝi trafos danĝeron!

Brilo ankaŭ iras aŭskulti. Lia esprimo iras de rido al streĉiteco kaj paniko.

Roja: Ni ne atendu. Mi devas supreniri por pririgardi.

Brilo: Ĉu vi frenezas? Ĉu vi volas riski vian vivon? Tre danĝere! Ni tuj telefonu al la polico.

Roja: Ja mi ankaŭ pensis pri tio. Imagu. Se policianoj venos kaj la sireno de policaŭto sonas, ili supre eble mortigos aŭ tenos ŝin kiel ostaĝon. Kia danĝero!

Brilo: Vi pravas! Sed vi mem ne povas supreniri. Tre danĝere! Mi nur zorgas pri vi.

Aŭ mi... mi supreniru anstataŭ vi!

Roja: Nu, ni kvietiĝu kaj pensu, kiel fari.

Sceno Ses

Personoj: Samaj personoj kiel en Sceno Kvin.

En hejmo de Fangfang. Ŝi kuŝas sur la lito, strikte ĉirkaŭligita. La tri ŝtelistoj traserĉas la ĉambro kun kolerema esprimo.

Granda Frato: Rapide eldiru, kien vi kaŝis la aĵon! Se vi ne dirus, mi turmentus vin al la morto! (*direktas la pistolon al Fangfang.*)

Drako: Rapide, rapide eldiru. Nia estro ne havas multan tempon malŝpari por ludi kun vi. (*frapas Fangfang.*)

Oranĝo: Jes ja, vi rapide eldiru, alie vi suferos de tio. Kio utilas, se vi kaŝas ĝin por li? Li vere utiligas vin. (ŝajne kun zorgema admonado.)

Fangfang: Mi ne scias, pri kio vi parolas. La ĉambrom vi jam traserĉis. Kion vi volas fari plu?

Frap! Drako donas al Fangfang vangofrapon.

Drako: Rapide eldiru, kien vi kaŝis la U-diskon.

Fangfang: Mi ne havas tian diskon, pri kia vi parolas, alie mortigu min! (kun sinteno ignori la morton.)

Brua frapado sur la pordo.

Granda Frato: Ŝŝ! Ne parolu. Iru rigardi. (*okulsignas al Drako.*)

Drako: Estas virino ekstere, Granda Frato.

Roja: Franjo, kion vi faras nun? Malfermu la pordon! Ĉu vi jam trovis la aĵon, kiun vi promesis al mi? Mia edzo atendas malsupre.

Granda Frato: Kia aĵo? (*demandas al Fangfang.*)

Fangfang tuj reagis, pensante, ke venas la ŝanco de savado.

Fangfang: Estas mia fratino, kiu volas prunti ion de mi.

Granda Frato: Kion ŝi volas pruntepreni de vi?

Fangfang ankoraŭ ne elpensas, kion diri. Voĉo venas el ekster la pordo.

Roja: Tuj malfermu la pordon. Mi nur prunteprenas de vi komputilon. Kial vi

montras vin tiel avara? Mia edzo sendis sian komputilon por riparo, alie mi ne volus pruntepreni la vian. Rapidu, nun li atendas malsupre kaj li tuj veturos al Shenzhen por negoci kun kliento.

Fangfang: Ho, jes, ŝi prunteprenis komputilon de mi dum la tago!

Granda Frato: Frato: Diru al ŝi, ke via komputilo paneas.

Fangfang: Neeble, ĉar mi promesis al ŝi, se ŝi ne atingas la celon, ŝi ne haltigas sian agon.

Oranĝo: Donu ĝin al ŝi, Granda Frato. Ĉu vi ne aŭdis, ke ŝia edzo atendas malsupre? Se ŝia edzo ankaŭ venos, nin trafos ĝenoj!

Granda Frato: Estu obeema. Se vi ludos ruzajon, mi mortigos vin! Malligu ŝin, Drako!

Drako (*malligas Fangfang*): Estu honesta. (*frapas Fangfang*.)

Trovinte la porteblan komputilon, Fangfang pretas malfermi la pordon. La tri ŝtelistoj sin kaŝas apud ŝi por preventi eventualaĵon. Ŝi nur duone malfermas la pordon. Vidante la knabinon loĝantan en la malsupra etaĝo, ŝi tre surpriziĝas.

Roja: Vi finfine malfermas la pordon. Kion vi faras ene, tiom malrapideme? (*senĉese direktas siajn okulojn en la ĉambron*.)

Fangfang baras ŝin kaj donis signon al ŝi per buŝo, ke ŝi voku la policon!

Roja: Ho, franjo, ĉu sonas akvotuboj en via hejmo nokte?

Fangfang: Akvotubo?

Roja okulsigas al Fangfang, frapante sian starigitan maldekstran brakon per la dekstra kaj ekmontrante la malsupran etaĝon.

Tuj kompreninte ŝian intencon, Fangfang forte ekbalancas la kapon, kun brilantaj okuloj.

Fangfang: La akvotuboj ĉiam sonas en mia hejmo. Kiam ni estos libera, ni iros pridemandi la administracion de la kvartalo.

Roja: Nu, mi iru unue. Mia edzo ankoraŭ atendas por veturi al Shenzhen je la deknua nokte. Morgaŭ li negocos kun kliento. (*Ŝi intence krias, ke ŝia edzo ne estas hejme*.)

Roja revenas hejmen kaj kurinte en la klozeton, ekfrapas la akvotubon.

Brilo: Kiel tie estas?

Roja: Vere mi divenis prave, ke io malbona okazas.

Aŭdinte la frapsonojn de la akvotubo el la malsupra etaĝo, Fangfang tuj elpensas trukon. Ŝi afektas havi stomakdoloron kaj eligas veajn suspirojn.

Granda Frato: Kio okazas al vi?

Fangfang: Granda Frato, mi havas stomakan doloron kaj mi volas iri al klozeto.

Apude, Drako, kiu pretas ligi ŝin, jetas ekrigardon al Granda Frato.

Granda Frato: Lasu ŝin iri!

Drako: Kia ĝenaĵo!

Fangfang eniris la klozeton kaj ŝlosas la pordon de interne. Preninte kelkajn profundajn enspirojn, ŝi akvopelas fekujon kaj malfermas la kranon. Ŝi kuras al la akvotubo kaj kaŭrinte malpeze krias.

Fangfang: He, ĉu min aŭdas vi en malsupra etaĝo?

Roja: Mi jam vin aŭdis. Kio okazas en via hejmo?

Fangfang: Aŭskultu. En mia hejmo troviĝas nun tri ŝtelistoj kaj unu el ili tenas pistolon. Tre danĝere! tuj alvoku la policon!

Roja: Alvoku la policon? Ĉu vi volas morti? Mi elpensos rimedon savi vin. Post kelka tempo faru tiele...

Fangfang: Se tiele, vi renkontos danĝero!

Roja: Ne zorgu pri mi. Agu tiel, kiel mi diras al vi!

Granda Frato: Tuj eliru! Ne ludu trukojn! (*frapas brue sur la pordo.*)

Post iom da tempo, Fangfang eliris.

Frap! frap! denove aŭdiĝas frapsonoj sur la pordo.

Granda Frato: Kiu diable estas tio? Drako, iru rigardi rapide!

Drako: Denove estas tiu virino!

Roja: Franjo, malfermu la pordon! Ĵus mi vidis vin teniĝi stranga. Ĉu vi kaŝas vian amaton ene? Kial vi ne lin prezentu al mi?

Granda Frato: Diru al ŝi, ke vi dormas!

Fangfang: Ha, estas miaj kolegoj. Hodiaŭ ni havas renkontiĝon en mia hejmo. Reiru. Ne min ĝenu!

Granda Frato terure koleriĝas, sed li ne kuraĝas eligi sonon.

Roja: Mi volas vian helpon. La kloako de mia hejmo estas ŝtopita. La fetoro morte strangolas min. Kaj mia edzo jam foriris. Bonvole petu viajn kolegojn helpi min!

Granda Frato: Tuj foririgu ŝin!

Oranĝo: Granda Frato, se ni ju malpli reagas ĉi-momente, des pli pasiva ni estas. Pro tio ŝia fratino ekhavas suspekton pri ni.

Granda Frato: Do iru trakti ŝin, Drako. Se ŝi kuraĝos ludi trukon, mortigu ŝin!

Drako: Estu trankvila, Granda Frato!

Roja: Mi ĝenas vin! Nun sekvu min!

Roja kondukas Drakon malsupreniri laŭ la ŝtuparo. Apenaŭ li eniras la ĉambron, li estas batita per bastono kaj svenis sur la tero.

Roja: Tuj trenu lin en la dormoĉambron.

Brilo trenas Drakon en la dormoĉambron, ligas lin kaj pretas ŝtopi lian buŝon per mantuko.

Roja: Ne per mantuko, sed per viaj malbonodoraj ŝtrumpetoj. (*ridaĉas.*)

Brilo: Haha, vi malbonas Roja! (*Li rapide prenas liajn stinkajn ŝtrumpetojn kaj*

ŝtopas la buŝon de Drako.)

Roja: Ankaŭ liajn okulojn ŝirmu. Trovu lian telefonilon kaj malŝaltos ĝin.

Brilo: Kaj poste?

Roja: Ni atendu.

Brilo: La virino supre estas tre danĝera, ĉu ne?

Roja: Mi pensas, ke ili ne estas ŝtelistoj, alie kial ili ankoraŭ foriras dum tiom da tempo, kaj plie ili lasis min pruntepreni la komputilon. Ĉu vi ne trovas tion stranga?

Brilo: Jes ja!

Roja: Se ili celas alian aferon, tio indikas, ke ili ankoraŭ ne ĝin plenumis.

Brilo: Aĥ, kara Roja, vi estas tre kapabla. De kie vi lernis tiun kapablon?

Roja: De detektiva romano.

Brilo malhavas vortojn por respondi.

En hejmo de Fangfang Granda Frato jam fariĝas senpacience pro malsukcesa traserĉo. Ĉu batado ĉu minaco ne efikas sur ŝi. La aĵon, kiun ili traserĉas, ili ne trovas. Drako malaperas senpure. Kaj lia telefonilo estas fermita. Videble Granda Frato iom konfuziĝas.

Oranĝo: Granda Frato, mi pensas, ke ni devas trovi lin malsupre, ĉar li estas tre senpripensema. Ni ankoraŭ ne plenumas nian taskon. Ni ne lasas lin fuŝi la aferon.

Granda Frato: Iru malsupren kaj vin gardu!

Brilo sidas sur la ŝtuparo kondukanta al la hejmo de Fangfang kaj atendas. Li kaj Roja tenas kontakton per telefonilo. Vidinte ke alia viro eliras el la ĉambro de Fangfang, li tuj informas Rojan, kiu atendas sur la teretaĝo, tenante saketon da trinkaĵo. Ĉe la informo Roja tuj supreniras laŭ la ŝtuparo.

Oranĝo, sciiginte, ke Roja loĝas en najbara etaĝdomo, iras serĉi. Kiam li iras al la dua etaĝo, li renkontas Rojan, kiu supreniras.

Oranĝo: He, vi estas ... nu, vi estas... Mia kolego iris kun vi al via hejmo por ripari la kloakon. Jam longa tempo pasis. Ni pretas foriri, sed lia telefonilo estas fermita. Jen mi eliras lin serĉi.

Roja: Ho, via kolego vere kapablas. Li estas laca kaj mi aĉetas trinkaĵon por li, lasante lin iom ripozi. La kloako jam finripariĝis. Sekvu min por renkonti lin.

Oranĝo: Via fratino diris, ke vi loĝas en la najbara etaĝdomo. Kial vi troviĝas ĉi tie? *(cerbumas singardeme kaj pretas reagi.)*

Roja: Ho, mia fratino incitetas vin. Ŝi plej ŝatas mistifiki homojn. Hehehe.

Oranĝo: Ĉu jes? Mi esperas, ke vi ne kondutas kiel ŝi. *(kun stranga esprimo.)*

Roja eksentas nervozecon, timante, ke li mortigos ŝin pro suspekto. Kiam ŝi malfermas la pordon, ŝi preskaŭ ne trovas la ŝlosiltruon. Feliĉe ŝi sukcesas malfermi la pordon. Ŝi kondukas Oranĝon en la ĉambron, kaj tiu estas batita per bastono.

Roja: Kiel danĝere! Li estas pli aŭ malpli saĝa, sed ja stulte reagas. Jen mi superruzas

lin!

Brilo: Nun restas unu ulaĉulo. Tamen li tenas pistolon. Kion ni devas fari?

Roja: Ne maltrankviliĝu. Kiam mi estis malsupre, mi jam pensis bone, kion ni faros. Ni nur...

Brilo: Ho, edzino mia, kiel saĝas vi estas! Kiel mi ne trovis vin tia antaŭe?

Roja: Vi malsaĝulo, ni estas geedzoj. Ĉu mi povus ludi ruzajon kontraŭ vi? Se tiel, mi vendus vin kaj vi kalkulus monbiletojn por mi!

Brilo: Ha ha (*feliĉe kun hontemo.*)

En la hejmo de Fangfang Granda Frato tute dronas en paniko kaj pretas fari lastan baraktadon. Li direktas pistolon al Fangfang, sed ŝi restas senemocia. Pro kolerego li kuras rekte al la pordo por vidi ĉu Drako kaj Oranĝo revenas aŭ ne. Tiam alŝvebas strio da densa fumo el la fendeto de la pordo, kaj li senĉese tusas pro sufoko. Ĵetinte ekrigardon eksteren, li trovas, ke la fumo regas plene en la koridoro.

Granda Frato: Hu, okazas fajrego!

Li rapidis en la banĉambron kaj malsekigas siajn vestojn, prete por sin ĵeti eksteren. por malsekigi siajn vestojn kaj estis preta rapidi. Tuj kiam li malfermas la pordon, Roja tuj ŝprucigas kontraŭatencan likvaĵon al liaj okuloj. Pro doloro li forĵetas sian pistolon, kianta, "Miaj okuloj, miaj okuloj!"

Brilo levprenas la pistolon kaj ligas Grandan Fratonaĵon per ŝnuro. Eble pro granda bruo kaj densa fumo la loĝantoj de la etaĝdomo eliras por vidi, kio okazis.

Brilo: Reiru por dormo, vi ĉiuj. La polico enketas pri kazo! (*fermas la pordon.*)

Roja: Alvoku la policon, niaj kamaradoj!

Brilo: Jes sinjorino!

Roja: Franjo, ĉu vi vin sentas bone? (*En ĉi tiu momento, Fangfang preskaŭ svenas pro la turmentado.*)

Fangfang: Mi estas en ordo. En mia barel-simila sako troviĝas sekreta kaŝejo, kie kuŝas U-disko registranta la informojn pri negoco inter nia kompanio kaj nigra bando. Ili estas tre gravaj. Vi nepre transdonu ĝin al policianoj... (*svenas.*)

Brilo prenas la sakon kaj pene malfermas la kaŝejon en la sako.

Roja: Ve, ĝi estas kaŝita tiel bone. Ne miras, ke oni ne povas trovi ĝin eĉ kiam la tuta ĉambro estis renversita. Ĉu vi povas pensi pri tio? (*demandas al Brilo.*)

Brilo: Ekster mia atendo!

Sceno Sep

Persono:

Roja

Brilo

Fangfang

Loko: en la hejmo de Roja

Fangfang: Bonege, mi fine sukcesas. Gustumu, vi ĉiuj. Mi ne kuiris dum longa tempo. Nun juĝu, ĉu la pladoj plaĉas al via palato.

Roja: Ha, franjo Fang. Via kuirarto estas tre bona. Vi lernis kuiradon en kurso, ĉu ne? Tiuj pladoj vere plaĉas al la palato!

Brilo: Jes, jes! Tre bongustaj. (*parolas kun manĝaĵo en la buŝo.*)

Fangfang: Miaj gepatroj mortis frue, kaj mi kuiras per mi mem, tial mi povas kuiru tiele. Feliĉe mi ne malesperigas vin hodiaŭ.

Roja: Franjo Fang, kion vi faros poste?

Fangfang: Pro tiu ĉi afero mi pensas multe. Tiuj ŝtelistoj estas arestitaj kaj la kompanio ankaŭ estas likvidiĝis pro la nigra negoco. Kvankam mi ne bezonas porti la leĝan respondecon, mi kaŭzis tiun incidenton pro mia avideco. Poste mi decidis ne plu ambiciaĉe grimpi altaĵon kiel fenikso staranta sur la alta branĉo. Mi volas paŝi sur la solida tero kaj serĉas laboron por honeste vivi.

Roja: Bone! Ni tostu je la vivo!

Brilo: Fangfang, ni tostu!



(La kurteno falas.)

elĉinigis Deng Lin